




ÖNB



+Z6044490X



Donaco de

franz Mink, Ranchevosth,
Austria

455/31

MANON LESCAUT

Literatura aldono de *Lingvo Internacia*.


700.038-B



ABATO PRÉVOST

MANON LESCAUT

(MANON LESKO)



TRADUKITA DE

D-ro VALLIENNE



PARIS

PRESA ESPERANTISTA SOCIETO

33, RUE LACÉPÈDE, 33

—
1908

ABATO PLEVOST

MADON LESTART

JMAYON LESTRO

UIN VALLIENE



PRINTED AND BOUND BY
J. W. BARNES



PARTO UNUA



Mi estas devigata suprenirigi mian leganton ĝis la tempo de mia vivo, en kiu mi unuafoje renkontis la kavaliron des Grieux¹. Tio okazis proksimume ses monatojn antaŭ mia veturado al Hispanujo. Kvankam mi malofte forlasis mian solecejon, tamen la amikeco, kiun mi sentas al mia filino, min kelkafoje devigis fari diversajn vojaĝetojn, kiujn mi kiel eble plej plimallongigis.

Iam mi revenis el Rouen², al kiu mi estis alirinta, *petite de ŝi*, por postuli intermeton de parlamento de Normandujo pri la heredo de kelkaj bienetoj, al kies posedo mi konsentis, ke ŝi estu rajtigita, ĉar ili devenis de mia patrino avo. Reveninte per la vojo al Evreux³, en kiu mi pasigis la unuan nokton, mi alvenis la morgaŭan tagon por la vespermanĝo en Pacy'on⁴, malproksimiĝantan de kvin aŭ ses mejloj. Kiam mi eniris en tiun urbeton, mi estis mirigita, vidante, ke ĉiuj loĝantoj mal-

1. Elparolu proksimume : *de Grie.*

2. Elparolu : *Ruen.*

3. Elparolu proksimume : *Evre.*

4. Elparolu : *Pasi.*

kvietiĝas. Ili rapidis for de siaj domoj, kaj alkuris are al malluksa gastejo, antaŭ kies pordo staris du kovritaj ĉaretoj. La ĉevaloj, kiuj estis ankoraŭ jungitaj kaj kiuj ŝajnis premegitaj de laceco kaj de varmeco, montris, ke tiuj du veturiloj estis alvenintaj nur de nelonge. Mi haltis momente por min informi pri la kaŭzo de tiu tumulto; sed min malmulte sciigis la scivola popolamaso, kiu neniel atentis al miaj demandoj, kaj ĉiam antaŭeniris al la gastejo, dum ĉiuj sin interpuŝis unu la alian kun multe da konfuzo. Fine, ĉar pafarkisto vestite de banduliero kaj havante musketon sur la ŝultro, aperis sur la sojlo de la pordo, mi per signo de mano lin venigis al mi. Mi petis de li, ke li al mi konigu la motivon de tiu puŝgado.

« Negravaĵo, sinjoro, li diris: dekdu da ĝojovirinoj, kiujn mi kondukas kun miaj kunuloj ĝis Havre-de-Grâce¹, kie ni ilin enŝipigos al Ameriko. Kelkaj inter ili estas beletaj; kaj kredeble tio ekscitas la scivolecon de tiuj bonaj vilaĝanoj. »

Mi estus transen irinta post tiu klarigo, se min ne estus haltigintaj ekkrioj de maljunulino, kiu eliris el la gastejo, plektante manojn kaj kriante, ke tio estas barbaraĵo, abomenaĵo, kompatindaĵo.

« Kio do okazas? mi diris al ŝi.

— Ha! sinjoro, eniru, ŝi respondis, kaj vidu ĉu tiu vidaĵo ne estas kapabla fendi koron. »

La scivolo min malsuprenirigis el mia ĉevalo, kiun mi lasis al mia ĉevalzorgisto. Mi malfacile eniris, borante la popolamason, kaj mi vidis efektive ion sufiĉe kortuŝantan.

Inter la dekdu knabinoj, kiuj estis katenitaj sesope per mezo de l' korpo, unu vidiĝis, kies mieno kaj

1. Elparolu: *Havr'-de-Gras'*.

vizaĝo konformiĝis kun ŝia nuna situacio tiel malbone, ke en ĉiu alia stato mi estus opiniinta, ke ŝi estas unuaranga persono. Ŝia malĝojeco, la malpureco de ŝiaj tolaĵoj kaj de ŝiaj vestaĵoj ŝin tiel malmulte malbeligis, ke ŝia vidaĵo al mi inspiris respekton kaj kompaton. Tamen ŝi penis sin deturni, tiom kiom ŝiaj katenoj tion ebligis, por ke ŝian vizaĝon ne povu rigardi la ĉeestantoj. La penado de ŝi farita por sin kaŝi estis tiel natura, ke ĝi ŝajnis deveni de sento de modesteco. Ĉar la ses gardistoj, kiuj akompanis tiun malfeliĉan bandon, estis same en la ĉambro, mi penis la ĉefon aparte, kaj petis de li klarigon pri la sorto de tiu bela knabino. Li povis min sciigi nur laŭ maniero tute ĝenerala.

« Mi ŝin eltiris el Hospitalo, li diris, laŭ ordonoj de lia polica generaleŭtenanta Moŝto. Verŝajne ŝi ne estis enfermita en ĝin por virtaĵoj. Kelkajn fojojn, mi ŝin demandis sur la vojo : sed ŝi obstine nenion respondis. Sed kvankam oni ne ordonis, ke mi indulgu al ŝi pli ol al la aliaj, tamen mi ŝin iom respektetas, ĉar ŝajnas al mi, ke ŝi valoras iom pli ol ŝiaj kunulinoj. Jen estas junulo, aldonis la pafarkisto, kiu povos multe pli bone ol mi vin instrui pri la kaŭzo de ŝia malfeliĉaĵo. Li ŝin akompanis de nia eliro el Parizo, kaj ne ĉesas plori, eĉ unu momenton. Devige li estas aŭ ŝia frato, aŭ ŝia amanto. »

Mi min turnis al la angulo, en kiu sidis tiu junulo. Li ŝajnis entombigita en profundan revadon. Neniam mi vidis figuron de doloro pli vivantan. Li estis tre simple vestita ; sed oni rimarkis, de la unua ekrigardo, ke li havas nobelnaskecon kaj bonedukitecon. Mi alproksimiĝis al li : li sin levis ; kaj mi malkovris en liaj okuloj, sur lia vizaĝo kaj en ĉiuj liaj movadoj ŝajnon tiel delikatan kaj tiel nobelan, ke mi sentis min nature eman utili al li.

« Mi ne vin konfuzu, mi diris, sidigante apud lin. Ĉu vi bonvolas kontentigi la sciemon, kiu min instigas koni tiun belan personon ; ĉar ŝi ne ŝajnas farita por la malĝoja stato, en kiu mi ŝin vidas ? »

Li respondis ĝentile, ke li ne povas min sciigi pri ŝia identeco kaj samtempe ne perfidi la sian, kaj ke li havas altvalorajn motivojn por deziri, ke li restu nekonita.

« Mi tamen povas diri tion, kion tiuj malboneguloj ne nescias, li daŭrigis montrante la ŝafarkistojn ; tio estas, ke mi ŝin amas per pasio tiel ardanta, ke ĝi igas min la plej malfeliĉa el ĉiuj homoj. Mi ĉion provis en Parizo, por ke oni donu al ŝi la liberecon. Klopodoj, lerteco, perforto estis neutilaj : mi decidis, ke mi akompanos ŝin, kiam eĉ ŝi irus ĝis la ekstremaĵo de l'mondo. Mi enŝipiĝos kun ŝi, kaj transiros al Ameriko. Sed, kaj tio estas malhumena, tiuj malkuraĝaj friponoj, li aldonis, parolante pri la ŝafarkistoj, ne volas permesi, ke mi alproksimiĝu al ŝi. Mi estis intencinta ilin ataki malkaŝe post kelkaj mejloj post Parizo. Mi kunuliĝis kun kvar viroj, kiuj estis promesintaj sian helpon por grandega monsumo. La perfiduloj min lasis sola por batali, kaj foriris kun mia mono. Ĉar mi ne povis sukcesi per la perforto, mi demetis miajn armilojn. Mi proponis al ŝafarkistoj, ke almenaŭ ili permesu, ke mi ilin akompanu, promesante, ke mi ilin rekompensos. Pro deziro al gajno ili konsentis al tio. Sed ili volis, ke mi ilin pagu, ĉiufoje kiam ili permesas, ke mi parolu kun mia amantino. Mia monujo tre rapide elĉerpiĝis : kaj nun, ĉar mi estas sen unu monero, ili montriĝas tiele kruelaj, ke ili min repuŝas brute, kiam mi faras unu paŝon al ŝi. Antaŭ momento, ĉar mi kuraĝis alproksimiĝi al ŝi, spite iliaj minacoj, ili fariĝis tiele insultemaj, ke ili levis kontraŭ mi la pinton de ŝafilo. Por kontentigi

ilian avarecon kaj daŭrigi la vojaĝon piede, mi estos devigata vendi ĉi tie malbonan ĉevalon, kiun ĝis nun mi uzis kiel rajdilon. »

Kvankam li ŝajnis fari tiun rakonton sufiĉe trankvile, li tamen, ĝin finante, lasis fali kelkajn larmojn. Tiu aventuro aperis al mi treege eksterordinara kaj treege kortuŝanta.

« Mi ne insistas, mi diris, por ke vi malkovru al mi la sekreton de viaj aferoj : sed se mi povas utili al vi iome, volonte mi prezentas min kiel helpanton.

— Ho ve ! li respondis, mi vidas nenium malfermaĵon al la espero. Necese estas, ke mi toleru la tutan kruelecon de mia sorto. Mi iros en Amerikon : almenaŭ tie mi estos libera kun la junulino, kiun mi amas. Mi skribis al unu el miaj amikoj, kiu sendos al mi kelkan helpaĵon ĉe Havre-de-Grâce. Mi estas embarasita nur por min konduki ĝis tie, kaj por doni al tiu kompatinda kreitaĵo, li aldonis, rigardante malĝoje sian amantinon, kelkajn dolĉaĵojn dum la vojiro.

— Nu, mi diris, mi ĉesigos vian embarason. Jen estas iom da mono ; kaj mi petas de vi, ke vi ĝin akceptu. Mi estas ĉagrena, ĉar mi ne povas vin utili alimaniere. »

Mi donis al li kvar luidorojn, zorgante, ke tion ne rimarku la gardistoj : ĉar mi bone komprenis, ke se ili sciis, ke li havas tian monsumon, ili vendus pli kare sian komplezon. Poste projekto eniris en mian cerbon, kontrakti kun ili la jenon : ili permesos, ke la juna amanto havu liberecon senĉese paroli ĝis Havre kun sia amantino.

Mi faris signon al la ĉefo, ke li alpaŝu ; kaj tion mi proponis al li. Li ŝajnis iom hontanta, spite sia senhonteco.

« Ni ne malkonsentas, sinjoro, li respondis kun

embarasita mieno, ke li parolu kun tiu knabino ; sed li volas senĉese esti apud ŝi : tio ĝenas nin ; kaj estas juste, ke li pagu pro tiu ĝeno. »

— Diru al mi, mi diris, kia monsumo estas sufiĉa por malebligi, ke vi sentu tiun ĝenon. »

Li kuraĝis peti de mi du luidorojn. Mi ilin donis tuje.

« Sed atentu, mi diris, kaj zorgu, ke vi ne preterlasu kelkan friponaĵon : ĉar mi donos mian adreson al tiu junulo, por ke li povu min informi : kaj estu certa, ke mi estas sufiĉe potenca por vin punigi. »

Tio do kostis al mi ses luidorojn. La ĝentileco kaj la ardenta dankeco per kiu la junulo min dankis, min tute elkonvinkis, ke li estas nobelrasa kaj meritas mian malavarecon. Mi ekelironte diris kelkajn vortojn al lia amantino. Ŝi respondis kun modesteco tiel dolĉa kaj tiel ĉarma, ke mi revenante ne povis ne fari milon da pripensoj pri la nekomprenebla karaktero de virinoj.

Ĉar mi revenis en mia solecejon, mi ne estis informita pri la sekvoj de tiu aventuro. Du jaroj pasis ; kaj pro tio mi estis tute forgesinta ĝin, kiam la hazardo naskis okazon, kiu ebligis, ke mi sciu ĝis fundo ĉiujn iliajn cirkonstancojn.

Revenante el Londono, mi alvenis Calais'on¹ kun la markizo de ..., mia lernanto. Ni loĝis, se mi tion bone memoras, en hotelo de Ora Leono, en kiu kelkaj motivoj nin devigis pasigi tutan tagon kaj sekvantan nokton. Alpaŝante sur stratoj, dum tagmezo, mi kredis ekvidi tiun saman junulon jam renkontritan en Pacy. Li estis tre malbone vestita, kaj ŝajnis multe pli pala ol kiam mi lin vidis, la unuan fojon. Li portis sur brako

1. Elparolu : *Kalc.*

malnovan vestkeston, kaj ŝajnis alveninta en urbon nur de unu momento. Tamen, ĉar li havis tro belan fizionomion, por ke oni ne lin rimarku, mi tuj rekonis lin.

« Necese estas, mi diris al la markizo, ke mi aliru al tiu junulo. »

Kiam li siavice min rekonis, lia ĝojo estis pli forta ol mi povus ĝin komprenigi.

« Ha ! sinjoro, li ekkriis, kisante miajn manojn, mi do povas ankoraŭ montri al vi mian eternan dankemon. »

Mi petis de li, de kie li venas. Li respondis, ke li alvenas per maro el Havre-de-Grâce, en kiu li enŝipiĝis, revenante el Ameriko antaŭ nelonge.

« Vi ne ŝajnas al mi tre monhava, mi diris : iru en hotelon de Ora Leono, en kiu mi loĝas ; mi vin retrovos post momento. »

Efektive mi revenis en ĝin, dezirante malpacience koni detalojn pri liaj malfeliĉaĵoj kaj pri la cirkonstancoj de lia vojaĝo al Ameriko. Mi faris al li milon da karesoj kaj ordonis, ke li estu senigita je nenio. Li ne atendis, ke mi insiste petu de li rakonton pri la historio de lia vivo.

« Sinjoro, li diris, vi agas kun mi tiel noble, ke mi kulpigus min de malnoblega maldankemo, se mi kaŝus al vi ian detalon. Mi al vi konigos ne nur miajn malfeliĉaĵojn kaj miajn ĉagrenojn, sed plie miajn malvirtaĵojn kaj miajn plej hontindajn malkuraĝaĵojn. Mi estas certa, ke, kvankam vi min kulpigos, vi tamen ne povos ne min plendi. »

Mi devas averti la leganton, ke mi skribis lian historion preskaŭ tuj kiam mi estis ĝin aŭdinta : do oni povas esti certa, ke nenio estas pli akurata kaj pli fidela ol tiu rakonto. Mi eĉ aldonas, ke ĝi estas fidela ĝis en la detaloj pri pripensoj kaj sentoj, kiujn la juna aventurulo esprimis per la plej plaĉinda ĝentileco. Jen estas

do lia rakonto, al kiu, ĝis la fino, mi miksis nenion, kio ne devenas de li.

« Mi estis deksepjara, kaj mi finis miajn studadojn de filozofio en Amiens¹, kien miaj gepatroj, kiuj apartenis al unu el la plej nobelaj familioj de P..., min estis sendintaj. Mi havis vivmanieron tiel saĝan kaj tiel bone ordigitan, ke miaj majstroj min prezentis kiel modelon al la kolegio. Tamen mi ne eksterordinare penadis por meriti tiun laŭdon ; sed mi havas karakteron nature mildan kaj trankvilan ; mi estis tre atenta al la studado per inklino ; kaj oni kalkulis ĉe mi kiel virtojn nur signojn de natura antipatio al la malvirto. Mia nobel-naskiĝo, la sukceso de miaj studadoj kaj kelkaj eksteraj agrablajoj min konigis kaj estimigis de ĉiuj honestaj homoj de la urbo. Mi finis miajn publikajn ekzercadojn meze de aprobo tiel ĝenerala, ke lia episkopa Moŝto, kiu ĉeestis ĉe ili, proponis al mi, ke mi eniru en Eklezian profesion, en kiu, li diris, mi nepre altiros al mi pli da distingajoj ol en la ordeno de Malte², al kiu min difinis miaj gepatroj. Jam ili portigis de mi la krucon kaj nomon de kavaliro des Grioux. Ĉar alvenis libertempo, mi min preparis por reveni al mia patro, kiu al mi promesis, ke baldaŭ li min sendos al akademio. Forlasante Amiens'on, mi bedaŭris nur unu aferon : lasi en ĝi amikon, kun kiu mi ĉiam estis simpatiege kunligita. Li estis pli maljuna ol mi je kelkaj jaroj. Ni estis edukitaj kune ; sed, ĉar la riĉeco de lia familio estis tre malgranda, li estis devigita sin turni al Eklezia profesio kaj resti en Amiens, dum mi ĝin forlasis, por fari en tiu urbo la studadojn,

1. Elparolu : *Amien*.

2. Elparolu : *Malt'*.

kiuj konvenas kun tiu profesio. Li havis mil bonajn kvalitojn. En la sekvo de mia historio, vi lin konos per la plej bonaj el ili, kaj precipe per sindonemo kaj malavareco por amiko, kiuj superas la plej famajn ekzemplojn de antikveco. Se tiam mi estus obeinta liajn konsilojn, mi ĉiam estus restinta saĝa kaj feliĉa. Se almenaŭ mi estus profitinta liajn riproĉojn, en la profundegaĵo en kiun miaj pasioj min fortiris, mi el la drono de mia riĉeco kaj de mia bonfamo estus savinta ian perditajon. Sed li nenian frukton ricevis de liaj zorgadoj, krom la ĉagreno, kiun li sentis, vidante ilin neutilaj kaj kelkfoje malafable rekompensitaj de maldankulo, kiu ofendiĝis pro ili kaj ilin konsideris kiel altrudaĵojn.

Mi estis markinta la tagon por mia foriro el Amiens. Ho ve ! kial mi ne markis la antaŭtagon ? Mi estus portinta al mia patro mian tutan senkulpecon. La hieraŭon de tago, en kiu mi estis elironta el tiu urbo, mi promenadis kun mia amiko, kiu nomiĝis Tiberge¹, kiam ni vidis alvenantan la publikan veturilon de Arras², kaj ni ĝin sekvis ĝis la enveturejo, en kiu maljungiĝas tiuj veturiloj. Ni havis neniun alian motivon de scivolo. El ĝi eliris kelkaj virinoj, kiuj foriris tuje. Sed unu restis, tre juna, kiu haltis sola en la korto, dum viro iom maljuna, kiu ŝajnis utili al ŝi kiel zorganto, klopodis por eltirigi el korboj ŝian pakajon. Ŝi ŝajnis al mi tiel ĉarma, ke mi, kiu ĝis nun neniam pensis al la diferenco de seksoj kaj neniam estis rigardinta knabinon iom atente, mi, diras mi, kies prudenton kaj konvenecon admiris ĉiuj homoj, tuj mi fariĝis flamiĝanta ĝis frenezeco. Mi estis kutime treege timema kaj facile timigebla:

1. Elparolu : *Tiberge*.

2. Elparolu : *Arras*.

sed tiam, ne nur tiu difekto ne min haltigis, sed kontraŭe mi aliris al la estrino de mia koro. Kvankam ŝi estis ankoraŭ pli juna ol mi, tamen ŝi akceptis miajn ĝentilaĵojn, ne ŝajnante embarasita. Mi petis de ŝi, kio ŝin altiris al Amiens, kaj ĉu ŝi havas en tiu urbo ian personon de ŝi konitan. Ŝi respondis simplanime, ke ŝi estis sendita en ĝin de siaj gepatroj, por fariĝi monaĥino. Nur de unu momento amo estis en mia koro, tamen ĝi min tiel klerigis, ke mi konsideris tiun projekton kiel baton pereigan por miaj deziroj. Mi parolis laŭ maniero, kiu komprenigis al ŝi miajn sentojn; ĉar ŝi estis multe pli sperta ol mi: malgraŭ ŝia malkonsento oni ŝin sendis al la monaĥinejo, kredeble por haltigi ŝian emon al plezuro, kiu jam estis montriĝinta, kaj kiu kaŭzis poste ĉiujn ŝiajn malfeliĉaĵojn kaj la miajn. Mi kontraŭbatalis la kruelan intencon de ŝiaj gepatroj per ĉiuj motivoj, kiujn al mi povis inspiri mia naskiĝanta amo kaj mia elokventeco skolastika. Ŝi neniel afektante montris nek severecon nek malŝaton. Ŝi diris, post momento de silento, ke ŝi tro antaŭvidas, ke ŝi estos malfeliĉa, sed kredeble tia estas la volo de ĉielo, ĉar ĝi liveras al ŝi neniun rimedon por tion eviti. La mildeco de ŝiaj rigardoj, la ĉarma mieno malgaja, kiun ŝi havis elparolante tiujn vortojn, aŭ prefere la supereco de mia fatalo, kiu min altiris al mia pereco, ne permesis, ke mi eĉ unu momenton ŝanceliĝu en mia respondo. Mi certigis al ŝi, ke se ŝi bonvolas iom konfidi al mia honoro kaj al la senfina amemo, kiun ŝi jam inspiris al mi, mi uzos mian vivadon por ŝin liberigi el la tiraneco de ŝiaj gepatroj, kaj ŝin feliĉigi. Kiam mi pripensas al tio, milfoje mi mire min demandas, de kie en tiu momento venis al mi tiom da maltimo kaj tiom da facileco por esprimi miajn sentojn: sed oni ne diigus amon, se ĝi ne farus miraklojn. Mi aldonis mil konvinkajn aferojn.

Mia bela nekonatino tre bone sciis, ke en mia aĝo oni ne estas trompema : ŝi konfesis, ke se ian tagon mi povus ŝin liberigi, ŝi kredus ŝuldi al mi ion pli karan ol la vivon. Mi ripetis, ke mi estas preta ĉion entrepreni: sed ĉar mi ne havis sufiĉe da sperteco por imagi tuje rimedojn kapablajn ŝin utili, mi ne eliris el ĝeneralaj kaj nur parolaj certigoj, kiuj povis multe helpi nek ŝin, nek min mem. Tiam ŝia maljuna arguso nin realiris, kaj miaj esperoj estis ekdronontaj, se ŝi ne estus havinta sufiĉe da spriteco por kompensi la senproduktecon de la mia. Kiam alvenis ŝia zorganto, mi miris, aŭdante, ke ŝi nomas min « ŝia kuzo », kaj ke, ne ŝajnante konfuza eĉ iomete, ŝi diras, ke, ĉar ŝi estas sufiĉe feliĉa por min renkonti en Amiens, ŝi prokrastos ĝis morgaŭ sian eniron en la monaĥinejon, por havi plezuron vespermanĝi kun mi. Mi tre bone komprenis la sencon de tiu ruzo kaj ĝin tuje partoprenis : mi proponis al ŝi, ke ŝi loĝu en gastejo, kies mastro, kiu sin lokis en Amiens, post kiam li estis longatempe veturigisto ĉe mia patro, estis tute sindonema al miaj ordonoj. Mi ŝin kondukis mem, dum la maljuna zorganto ŝajnis iom murmuri, dum mia amiko Tiberge, kiu nenion komprenis en tiu sceno, nin sekvis ne elparolante unu vorton. Li ne estis aŭdinta mian interparoladon, ĉar li restis en la korto kaj en ĝi promenadis, dum mi amparolis kun mia bela amatino. Ĉar mi timis lian prudenton, mi lin foririgis, petante de li, ke li bonvolu fari por mi komision. Do, mi havis plezuron, kiam mi alvenis en la gastejon, paroladi sola kun la reĝino de mia koro. Baldaŭ mi konstatis, ke mi estis malpli infano ol mi tion kredis. Mia koro malfermiĝis al mil sentoj de plezuro, kies ideon neniam mi estis havinta. Dolĉa varmo disversiĝis tra ĉiuj miaj vejnoj. Mi estis en speco de ekscitego, kiu, depreninte el mi dum kelka tempo la liberecon de la voĉo, povis esprim-

iĝi nur per miaj okuloj. Fraŭlino Manon Lescaut¹, ŝi diris al mi, ke tiel ŝi nomiĝas, ŝajnis tre kontenta, vidante tiun efikon de ŝiaj ĉarmoj. Mi kredis ekvidi, ke ŝi ne estis malpli kortuŝita al mi. Ŝi konfesis, ke ŝi trovas min aminda, kaj ke ŝi estus kontentega, se ŝi ŝuldus al mi sian liberecon. Ŝi volis scii, kiu mi estas kaj tiu scio pligrandigis ŝian amemon: kompreneble, ĉar ŝi devenis de malnobelnaskiĝo, ŝi estis flatita, akirinte amanton kiel min. Ni interparolis pri rimedoj taŭgaj por reciproke aparteni unu al alia. Post sennombraj pripensoj, ni trovis neniun alian vojon pli bonan ol forkuron. Necese estis trompi la viglecon de la zorganto, kiu, kvankam nur servisto, estis vere ne maltiminda. Ni decidis, ke dum la nokto mi preparigos poŝtĉaron kaj revenos morgaŭ tre frumatene, antaŭ kiam ŝi estos vekiĝinta: poste ni forkuros sekrete kaj veturos rekten ĝis Parizo, en kiu ni alvenante nin geedzigos. Mi havis proksimume kvindek skudojn, kiuj estis frukto de miaj ŝparaĵetoj; ŝi posedis ĉirkaŭe duoblon. Kiel nespertaj infanoj, ni imagis, ke tiu monsumo neniam finos, kaj ni ne malpli fidis al sukceso de aliaj entreprenotaĵoj.

Vespermanĝinte kun pli da kontento ol mi neniam estis sentinta, mi eliris por efektiviĝi nian projekton. Miaj aranĝoj estis des pli facilaj, ke, ĉar mi intencis reveni al mia patro la morgaŭan tagon, ju pli mia malgranda pakaĵo jam estis preparita. Do mi tre facile transportigis mian vojaĝkeston kaj dungis ĉaron, postulinte, ke ĝi estu preta je la kvina matene, horo en kiu la pordo de l'urbo malfermiĝas: sed mi trovis barilon, al kiu mi ne malfidis, kaj kiu preskaŭ rompis mian entreprenon.

Tiberge, kvankam pli maljuna ol mi nur de tri

1. Elparolu: *Lesko*.

jaroj, estis junulo havanta maturan prudenton kaj konduton tre bone ordigitan. Li amis min per eksterordinara amemo. La vidaĵo de junulino tiel beleta kiel fraŭlino Manon, mia fervoro por ŝin konduki, mia zorgo por min liberigi je li per forsendo al komisio, naskis en li kelkajn suspektojn pri mia amo. Li ne kuraĝis reveni al la gastejo, en kiu li min lasis, timante min ofendi per tiu reveno : sed li estis irinta al mia loĝejo, en kiu mi alvenante lin trovis min atendantan, kvankam estis la deka vespere. Lia ĉeesto min ĉagrenis. Li rimarkis facile la ĝenon, kiun ĝi kaŭzis al mi.

« Mi estas certa, li diris malkaŝe, ke vi meditas projekton, kiun vi volas kaŝi al mi : mi tion vidas en via mieno. »

Mi respondis malafable, ke mi ne estis devigata konigi al li miajn intencojn.

« Sendube, li respondis ; sed ĉiam vi agis kun mi same kiel kun amiko ; kaj tiu titolo konjektigas iom da fido kaj iom da kormalfermo. »

Li min premis tiel forte kaj tiel longatempe, por ke mi al li malkovru mian sekreton, ke, ĉar mi neniam estis havinta al li kaŝitaĵon, mi faris plenan konfidencion de mia pasio. Li ĝin akceptis kun ŝajno de malkontento, kiu min tremigis. Mi precipe pentis pro la maldiskreto per kiu mi al li malkovris mian projekton pri nia forkuro. Li diris, ke li estas tro perfekte mia amiko por ne tion malhelpi per sia tuta povo ; ke li volas unue montri al mi ĉion, kion li kredas kapabla min deturni el ĝi ; sed ke, se mi ne forlasas poste tiun malbonegan decidon, li avertos la personojn, kiuj povos ĝin haltigi laŭ maniero tute certa. Li faris pri tiu temo paroladon, kiu daŭris pli ol unu kvarono da horo, kaj kiu finis ankoraŭ per la minaco min denunci, se mi ne donas mian parolon, ke mi kondutos pli prudente kaj pli saĝe.



Mi malesperis, ĉar mi tiel neĝustatempe perfidis min. Tamen, ĉar de du aŭ tri horoj, amo treege malfermis mian spiriton, mi rimarkis, ke mi ne al li konigis, ke mia projekto estas fariĝonta la morgaŭan tagon : mi do decidis, ke mi lin erarigos per tiu dusencaĵo.

« Tiberge, mi diris, ĝis nun mi kredis, ke vi estas mia amiko, kaj mi volis vin provi per tiu konfidencio. Mi amas ; tio estas vera : mi ne vin trompis. Sed pri mia forkuro, tio ne estas entrepreno hazarde farota. Venu ĉe mi morgaŭ matene, je la naŭa : mi al vi montrós, se la afero estas ebla, mian amantinon, kaj vi juĝos se ŝi meritas, ke oni faru por ŝi tian entreprenon. »

Li lasis min sola post kelkaj amikaj elmontroj. Mi utiligis nokton por ordigi miajn aferojn, kaj kiam frumateniĝis, mi min direktis al la gastejo de fraŭlino Manon : mi ŝin trovis min atendantan. Ŝi estis en sia fenestro, kiu troviĝis sur la strato : pro tio, min ekvidinte, ŝi al mi malfermis mem. Ni eliris senbrue. Kiel pakajon ŝi havis nur sian tolaĵon, kiun mi mem prenis kaj portis. La ĉaro estis ekveturonta : tuj ni foriris for de urbo. Mi rakontos poste, kia estis la konduto de Tiberge, kiam li ekvidis, ke mi estis lin trompinta. Lia fervoro ne fariĝis malpli ardanta. Vi vidos ĝis kia troeco ĝi altiĝis, kaj kiajn larmojn mi devus verŝi, pensante al rekompensoj, kiujn li ĉiam pro tio ricevis.

Ni tiel rapide veturis, ke ni alvenis al Saint-Denis¹ antaŭ nokto. Mi galopis rajde flanke de la ĉaro ; pro tio, estis eblaj interparoloj inter ni, nur kiam oni ŝanĝis ĉevalojn : sed kiam ni vidis, ke ni tiel proksimiĝas Parizon, ke ni povas nin konsideri kiel savitaj, ni prenis tempon por nin sensoifigi, ĉar ni estis manĝintaj nenion

1. Elparolu : *Sin Deni*.

de nia eliro el Amiens. Kvankam mi estis pasiega al Manon, ŝi sciis min konvinki, ke ŝi ne estas malpli tia al mi. Ni estis tiel malmulte hontemaj en niaj karesoj, ke ni ne havis paciencon atendi, ke ni estu solaj. Niaj kondukistoj kaj niaj gastejmastroj nin rigardis admire: kaj mi rimarkis, ke ili estis mirigitaj, vidante du infanojn de nia aĝo, kiuj sin amis reciproke ĝis frenezeco. Niaj projektoj de geedziĝo estis forgesitaj en Saint-Denis : ni trompis rajtojn de Eklezio, kaj ni nin trovis geedzoj, ne pripensinte pri tio. Estas certe, ke kun la natureco amema kaj konstanta, kiu estas la mia, mi estis feliĉa dum mia tuta vivado, se Manon estis fidela. Ju pli mi konis ŝin, des pli mi malkovris en ŝi novajn amindajn kvalitojn. Ŝia spirito, ŝia koro, ŝia mildeco, ŝia beleco faris ĉenon tiel fortan kaj tiel ĉarman, ke mi estus metinta mian tutan feliĉecon en la neniam eliro el ĝi. Terura ŝanĝo ! Tio, kio faras mian malesperon, povis fari mian feliĉecon. Mi troviĝas la plej malfeliĉa el ĉiuj homoj, per tiu cirkonstanco, el kiu mi devis esperi la plej dolĉan el ĉiuj sortoj kaj la plej perfektajn rekompensojn de l'amo.

En Parizo, ni luprenis meblitan apartamenton. Ĝi estis en la strato V..., kaj por mia malfeliĉo apud la domo de Sinjoro de B..., fama ĝenerala farmoprenanto. Tri semajnoj pasis, dum kiuj mi estis tiel plenigita de mia pasio, ke mi malmulte estis pripensinta al mia familio kaj al la ĉagreno certe sentita de mia patro, pro mia foresto. Tamen, ĉar la diboĉo neniel partoprenis en mia konduto, ĉar Manon same kondukis kun multe da konveneco, la trankvileco en kiu ni vivis havis tiun rezultaton, ke ĝi iom post iom al mi rememorigis mian devon : kaj mi decidis, ke mi paciĝos kun mia patro, se la afero estas ebla. Mia amatino estis tiel aminda, ke mi ne dubis, ke ŝi plaĉus al li, se mi trovus rimedon

por al li konigi ŝian prudenton kaj ŝian meriton : unuvorte mi esperegis, ke mi ricevos de li permeson edziĝi kun ŝi, ĉar mi ne esperis plu povi tion fari sen lia konsento. Mi konigis al Manon tiun projekton, kaj al ŝi komprenigis, ke, krom motivoj de amo kaj de devo, en tiu projekto eniris iom da neceseco : ĉar nia monsumo estis tre plimalgrandigita, kaj mi ekforlasis opinion, ke ĝi estas neelĉerpebla. Manon akceptis malvarme tiun proponon. Tamen, ĉar la malfacilaĵoj, kiujn ŝi kontraŭmetis kontraŭ mia decido, devenis nur de ŝia amemo kaj de la timo, ke ŝi min perdus, se mia patro ne partoprenus mian projekton, post kiam li estus koninta la lokon en kiu ni ambaŭ rifuĝis, mi havis neniun suspekton pri la kruela bato, per kiu oni sin preparis min frapi. Al la kontraŭparolo pri la neceseco, ŝi respondis, ke restas ankoraŭ sufiĉe da mono por vivi kelkajn semajnojn, kaj ke poste ŝi trovos provizojn, dank' al la amikeco de kelkaj provincaj parencoj, al kiuj ŝi skribos. Ŝi dolĉigis sian rifuzon per karesoj tiel amemaj kaj tiel pasiaj, ke mi, kiu vivis nur en ŝi, kaj kiu ne havis eĉ la plej etan malfidon pri ŝia koro, mi aplaudis al ĉiuj ŝiaj respondoj kaj al ĉiuj ŝiaj decidoj. Mi al ŝi lasis disponon de nia monujo kaj la zorgon pagi nian ordinaran elspezon. Mi ekvidis iom poste, ke nia manĝotablo estis pli bone provizita, kaj ke ŝi pagis al si kelkajn multekostegajn tualetaĵojn. Ĉar mi sciis, ke devis resti apenaŭ dekdu aŭ dekkvin monpistojoj, mi montris mian miron pro tiu ŝajna pligrandigo de niaj riĉaĵoj. Ŝi ridante petis de mi, ke mi ne malkvietiĝu.

— Ĉu mi ne promesis, ŝi respondis, ke mi havos provizojn ? »

Mi amis ŝin tro simplanime por facile min maltrankviligi.

Ian tagon, mi estis elirinta dum la tagmezo, kaj

mi avertis ŝin, ke mi restos ekstere pli longatempe ol kutime. Kiam mi revenis, mi miris, ĉar oni min atendigis du aŭ tri minutojn antaŭ la pordo. Ni estis servitaj nur de knabino, kiu estis proksimume samjara kiel ni. Kiam ŝi malfermis, mi petis de ŝi, kial ŝi malfruiĝis tiel longatempe. Ŝi respondis kun embarasita mieno, ke ŝi ne aŭdis min frapintan. Mi estis frapinta nur unu fojon ; do mi diris :

« Sed se vi ne min aŭdis, kial do vi venis malfermi ? »

Tiu demando ŝin konfuzis tiel forte, ke, ĉar ŝi ne havis sufiĉe da spiritĉeesto por respondi al ĝi, ŝi ekploris, certigante, ke ŝi ne estas kulpa, sed ke ŝia sinjorina Moŝto permesis, ke ŝi malfermu la pordon, nur kiam Sinjoro de B... estos elirinta per la alia ŝtuparo, kiu rilatas kun la tualetejo. Mi estis tiel konfuza, ke mi ne havis forton por eniri en la apartamenton. Mi decidis , ke mi malsupreniros, pretekstante aferon, kaj mi ordonis al tiu knabino, ke ŝi diru al ŝia mastrino, ke mi revenos post unu momento, sed ke ŝi ne konigu, ke ŝi al mi parolis pri Sinjoro de B...

Mia konsterno estis tiel granda, ke mi verŝis larmojn, malsuprenirante ŝtuparon, nesciante ankoraŭ de kia sento ili devenis. Mi eniris en la unuan kafejon, kaj sidiĝinte apud tablo, mi apogis mian kapon sur miajn ambaŭ manojn por ekzameni tion, kio okazas en mia koro. Mi ne kuraĝis rememori tion, kion mi ĵus estis aŭdinta. Mi volis konsideri tion, kiel iluzion : kaj dufoje, trifoje mi min preparis returni al la loĝejo, ne vidiginte, ke mi atentis al tio. Ŝajnis al mi tiel neeble, ke Manon min perfidas, ke mi timis ŝin ofendi, ŝin suspektante. Mi ŝin adoris, tio estis certa ; mi ne donis al ŝi pli da pruvoj de amo, ol mi estis ricevinta de ŝi ; kial mi ŝin kulpigus, ke ŝi estas malpli

sincera kaj malpli konstanta ol mi? Kian motivon ŝi havus por min trompi? Nur tri horojn antaŭe ŝi min premegis per plej amemaj karesoj, kaj ŝi ricevis la miajn kun plezurego : mi ne konis ŝian koron pli bone ol la la mian.

« Ne, ne, mi daŭrigis, neeble estas, ke Manon min perfidas. Si scias, ke mi vivas nur por ŝi. Si scias tro bone, ke mi ŝin adoras. Tio ne estas motivo por min malami. »

Tamen la vizito kaj la eliro kaŝita de Sinjoro de B... al mi kaŭzis embarason. Mi memoris ankaŭ la malgrandajn aĉetaĵojn de Manon, kiuj ŝajnis superi niajn nunajn riĉaĵojn. Tio videble divenigis malavarecon de nova amanto. Kaj tiu konfido, kiun ŝi montris antaŭ mi pri provizoj, kiuj estis nekonitaj de mi. Mi malfacile donis al tiom da enigmoj sencon tiel favoran, kiel mia koro ĝin deziris. Aliparte de kiam ni estis en Parizo, ŝi preskaŭ neniam troviĝis for de miaj rigardoj. En okupadoj, promenadoj, amuzadoj, ĉiam ni estis unu apud la alia. Dio mia! unu momento de disiĝo nin tro estus ĉagreninta. Senĉese ni bezonis diri al ni, ke ni amas nin reciproke ; sen tio, ni estus mortintaj pro maltrankvileco. Do mi ne povis imagi unu solan momenton, en kiu Manon estus povinta sin okupi de viro alia ol mi. Fine mi kredis, ke mi trovis klarigon de tiu mistero.

« Sinjoro de B..., mi diris al mi, estas homo, kiu faras gravegajn aferojn, kaj kiu havas grandajn komercrilatojn ; la parencoj de Manon uzis tiun homon kiel perulon por sendi al ŝi kelkajn provizojn. Eble ŝi jam ricevis de li iom da ĝi. Kredeble ŝi, por sin amuzi, volas min agrable mirigi. Eble ŝi estus parolinta pri tio, se mi estus enirinta kiel kutime, anstataŭ veni ĉi tien por min ĉagreni. Almenaŭ ŝi ne tion kaŝos, kiam mi mem parolos al ŝi pri tio. »

Mi min plenigis tiel forte de tiu opinio, ke ĝi estis sufiĉe potenca por multe malpligrandigi mian malĝojon. Tuje mi revenis al la loĝejo. Mi kisis Manon'on kun mia kutima amemo. Ŝi min akceptis tre bone. Mi unue estis tentita malkovri al ŝi miajn konjektojn, kiujn mi ĉiam pli kaj pli konsideris kiel certaĵojn : mi detenis min, esperante, ke eble ŝi min antaŭiros, al mi sciigante ĉion, kio okazis. Oni servis al ni vespermanĝon. Ni sidiĝis al tablo kun mieno tre gaja : sed pro la lumo de la kandelo, kiu estis inter ŝi kaj mi, mi kredis ekvidi malĝojecon sur la vizaĝo kaj en la okuloj de mia kara amatino. Tia penso min same malĝojigis. Mi rimarkis, ke ŝiaj rigardoj alligiĝis al mi laŭ maniero alia ol ili faris kutime. Mi ne povis malkonfuzi, ĉu tio estas amo aŭ kompatato, kvankam ŝajnis al mi, ke tio estas sento dolĉa kaj sopiranta. Mi ŝin rigardis per sama atento : kaj eble ŝi havis ne malpli da malfacileco por juĝi en miaj rigardoj la staton, de mia koro. Ni pensis nek al paroladoj nek al manĝado. Fine mi vidis larmojn, kiuj falis el ŝiaj belaj okuloj : perfidajn larmojn !

« Ha Dio ! mi ekkriis, vi ploras, mia kara Manon : vi estas tiel ĉagrena, ke vi ploras ; kaj vi ne diras al mi unu vorton pri viaj ĉagrenoj. »

Ŝi respondis nur per kelkaj sopiroj, kiuj pligrandigis mian malkvietecon. Mi min levis tremante : mi ŝin petegis kun ĉiuj fervoraĵoj de l'amo, ke ŝi malkovru la kaŭzon de siaj ploroj : mi mem verŝis larmojn, viŝante la ŝiajn : mi estis pli malviva ol viva. Barbarulon estus kortuŝinta la elmontroj de mia doloro kaj de mia timo. En momento kiam mi estis tiel tute okupita pro ŝi, mi aŭdis bruon faritan de kelkaj personoj, kiuj supreniris la ŝtuparon. Oni frapis malforte sur la pordon. Manon donis al mi kison ; kaj sin ŝovante for de miaj brakoj, ŝi rapide eniris en la tualetejon, kiun ŝi tuje fermis

post si. Mi imagis, ke, ĉar ŝia tualetto estas iom malordigita, ŝi volis sin kaŝi el okuloj de la fremduloj, kiuj estis frapintaj. Mi iris malfermi mem. Apenaŭ mi estis malferminta, mi vidis min ekkaptita de tri viroj; mi rekonis, ke ili estas lakeoj de mia patro. Ili ne faris al mi perforton; sed dum du inter ili min mantenis per miaj brakoj, la tria vizitis miajn poŝojn kaj eltiris el ili malgrandan tranĉilon, kiu estis la sola ferilo, kiun mi portis sur mi. Ili petis de mi pardonon, ĉar ili estis devigitaj min malrespekti: ili diris, ke kompreneble ili agis laŭ ordonoj de mia patro, kaj ke mia pli maljuna frato min atendas malsupre en karoso. Mi estis tiel konfuzita, ke mi lasis konduki min ne kontraŭbatalante kaj ne respondante. Efektive mia frato min atendis. Oni min metis en la karoson apud li: kaj la veturigisto, kiu havis ordonojn, nin kondukis rapidege ĝis Saint-Denis. Mia frato min kisis ameme, sed li ne parolis kun mi; pro tio, mi havis la tutan libertempon, kiun mi bezonis, por revadi al mia malfeliĉaĵo.

Unue mi trovis en ĝi tiom da mallumaĵoj, ke mi vidis neniun malfermaĵon al ia konjekto. Mi estis kruele perfidita; sed per kiu? Tiberge estis la unua homo, kiu sin prezentis al mia spirito.

« Perfidulo! mi ekkriis, cia vivo estas finita, se miaj konjektoj troviĝos ĝustaj. »

Tamen mi pripensis, ke li ne konas la lokon de mia loĝejo, sekve ke oni ne povis ĝin koni per li. Kulpigi Manon'on? mia koro ne kuraĝis ŝin igi kulpa pri tio. Tiu eksterordinara malĝojeco, per kiu mi vidis ŝin kva-zaŭ premegitan, ŝiaj larmoj, la amema kisado, kiun ŝi donis al mi elirante, certe aperis kiel enigmo: sed mi sentis, ke mi inkliniĝis tion klarigi per antaŭsento de nia komuna malfeliĉeco; kaj en la momento, en kiu mi malesperis pro la okazintaĵo, kiu min fortiregis for de

ŝi, mi estis sufiĉe kredema por imagi, ke ŝi estas pli plendinda ol mi. La rezultato de mia meditato estis min konvinki, ke sur la stratoj de Parizo mi estis ekvidita de kelkaj min konantaj personoj, kiuj avertis mian patron. Tiu penso min konsolis. Mi esperis, ke ĉio estos finita post kelkaj riproĉoj aŭ kelkaj suferajoj, kiujn mi estos devigata toleri de la patra aŭtoritato. Mi decidis, ke mi suferos ilin pacience, ke mi promesos ĉion, kion oni postulos de mi, por tiamaniere faciligi la okazon, kiu ebligos, ke mi revenu pli rapide al Parizo, por redoni vivon kaj ĝojon al mia kara Manon.

Ni alvenis al Saint-Denis post malmulte da tempo. Mia frato, mirante pro mia silento, imagis, ke ĝi devenis de mia timado. Li penis min konsoli, certigante, ke la severeco de mia patro neniel estas timinda por mi, se mi intencas reveni senribele al devo kaj meriti la amemon, kiun li sentas al mi. Li igis min pasigi nokton en Saint-Denis, zorgante, ke la tri lakeoj kuŝiĝu en mia ĉambro. Tio, kio min multe ĉagrenis, estis, ke mi vidis min en la sama gastejo, en kiu mi loĝis kun Manon, kiam mi revenis el Amiens al Parizo. Gastejmastro kaj servistoj min rekonis kaj divenis samtempe veron pri mia historio. Mi aŭdis la mastron dirantan :

« Ha ! li estas tiu beleta sinjoro, kiu pasis antaŭ ses semajnoj kun fraŭlineto, kiun li amis tiel forte. Kiel ŝi estis ĉarma ! Kiel sin reciproke karesis tiuj kompatindaj geinfanoj. Je Dio ! estas domaĝe, ke oni ilin disigis. »

Mi ŝajnigis nenion aŭdi, kaj mi lasis vidi min kiel eble plej malmulte. Mia frato havis en Saint-Denis ĉaron por du personoj en kiu ni foriris frumatene ; kaj ni alvenis hejmen la morgaŭan tagon dum vespero. Li vidis mian patron pli frue ol mi, kaj, por lin malseverigi, parolis pri mi favore, al li konigante la facilecon kun

kiu mi lasis min konduki : pro tio mi estis akceptita malpli malmole ol mi opiniis. Li kontentiĝis, farante kelkajn ĝeneralajn riproĉojn pri la kulpo de mi farita, ĉar mi forestis sen lia permeso. Pri tio, kio koncernis mian amatinon, li diris, ke mi juste meritis tion, kio al mi estis okazinta, ĉar mi liveris min al nekonatino ; ke li plibone opiniis pri mia prudento ; sed ke li esperas, ke tiu aventureto min igos pli saĝa. Mi akceptis tiun paroladon nur laŭ la senco, kiu akordiĝis kun miaj ideoj. Mi dankis mian patron pri lia boneco, ĉar li bonvolis min pardoni, kaj mi promesis, ke mi havos konduton pli obeeman kaj pli bone ordigitan. Funde de mia koro mi triumfis : ĉar laŭ la maniero per kiu aranĝiĝis aferoj, mi ne dubis, ke mi havos liberecon forkuri el la domo eĉ antaŭ kiam finiĝos nokto.

Oni altabliĝis por vespermanĝi : oni min mokis pri mia akiro de Amiens kaj pri mia forkuro kun tiu fidela amantino. Mi akceptis batojn tre ĝentile. Mi eĉ estis ĉarmita, ke al mi estu eble interparoli pri tio, kio konstante okupis mian spiriton. Sed, pro kelkaj vortoj preterlasitaj de mia patro, mi streĉis mian orelon kun plej granda atento. Li parolis pri perfido kaj pri profita servo farita de Sinjoro de B... Mi restis konfuza, aŭdante, ke li elparolas tiun nomon, kaj petis de li humile, ke li pli plene klarigu sian sciigon. Li sin turnis al mia frato kaj petis de li, ĉu li ne rakontis al mi la tutan historion. Mia frato respondis, ke mi ŝajnis tiel trankvila dum la vojaĝo, ke li ne kredis, ke mi bezonas tiun kuracilon por min resanigi de mia frenezo. Mi rimarkis, ke mia patro ŝanceliĝas, ĉu li plenigos sian klarigon. Mi lin petegis tiel insiste, ke li min kontentigis aŭ prefere min mortigis kruele per la plej abomena el ĉiuj rakontoj.

Unue li petis de mi, ĉu mi ĉiam estis tiel naiva, ke mi kredis min amita de mia amatino. Mi diris sen-

ŝancele, ke pri tio mi estas certa, kaj ke nenio estas kapabla min iomete dubigi.

« Ha ! ha ! ha ! li ekkriis ridegante, tio estas bonega. Ci estas rimarkinda naivegulo ; kaj min plezurigas cin vidi en tiaj sentoj. Estas domaĝe, mia kompatinda kavaliro, ke ci eniras en la ordenon de Malte ; ĉar ci havas multe da inklinoj por fari edzon pacienceman kaj malĝenantan. »

Li aldonis mil samspecajn mokadojn pri tio, kion li nomis mia malsaĝeco kaj mia kredemo. Fine, ĉar mi restis silentanta, li daŭrigis, dirante, ke, laŭ la kalkulo, kiun li povis fari pri la tempo de mia eliro el Amiens, Manon estis min aminta dum dekdu tagoj ĉirkaŭe.

« Ĉar, li aldonis, mi scias, ke ci eliris el Amiens la 28-an de alia monato : ni estas en la 29-a de la nuna : jam de dekunu tagoj Sinjoro de B... skribis al mi : mi konjektas, ke li bezonis ok tagojn por plene konatiĝi kun cia amatino : do se oni eltiras dekunu kaj ok el tridek unu tagoj, kiuj fluis de la 28-a de la unua monato ĝis la 29-a de la alia, restas dekdu, iom pli iom malpli. »

Post tio ridegoj rekomencis. Mi ĉion aŭdis kun korpremeĝo, kontraŭ kiu mi timis, ke mi ne povos kontraŭbatali, ĝis la fino de tiu malĝoja komedio.

« Do ci scios, daŭrigis mia patro, ĉar tion ci ne scias, ke sinjoro de B... gajnis la koron de cia princino : ĉar li min mokas, kiam li pretendas min konvinki, ke nur pro malprofita fervoro li volis ŝin formeti el ci. Ĉar de homo tia, kia li estas, de kiu cetere mi ne estas konita, oni ne povas esperi tiel noblajn sentojn. Li sciis per ŝi, ke ci estas mia filo : kaj por sin liberigi el ciaj altrudaĵoj, li konigis al mi skribe la lokon en kiu ci loĝis kaj la malordon en kiu ci vivis, al mi komprenigante, ke mi bezonus fortan helpadon por cin ekkapti.

Li sin proponis por faciligi al mi la rimedojn, per kiuj mi pli facile metus mian manon al cia kolumo : se cia frato povis surprizi cin neatenditan, tio okazis nur, ĉar li lin direktis, li kaj cia amatino. Nun gratulu cin pri la daŭrado de cia triumfo. Ci scias venki sufiĉe rapide, kavaliro ; sed ci ne scias konservi ciajn akirojn. »

Mi ne havis sufiĉan forton por subporti pli longatempe paroladon, kies ĉiu vorto traboris mian koron. Mi min levis el tablo, kaj mi ne estis ankoraŭ farinta kvar paŝojn por eliri el la manĝoĉambro, kiam mi falis sur plankon sen sento kaj sen konscio. Oni min rekonsciigis per rapida flegado. Mi malfermis la okulojn por verŝi torenton da ploroj, kaj la buŝon por eligi plendojn plej malĝojajn kaj plej kortuŝantajn. Mia patro, kiu ĉiam min amis profunde, uzis sian tutan korelokventecon por min konsoli. Mi lin aŭskultis, sed ne lin aŭdis. Mi min ĵetis antaŭ liajn genuojn : mi lin petegis, kunplektinte manojn, ke li lasu min reveni Parizon, por ke mi povu ponarfrapi B...on.

« Ne, mi diris, li ne gajnis la koron de Manon : ĉi faris al ŝi perforton ; li ŝin delogis per sorĉo aŭ per veneno : li eble ŝin brute malrespektis. Manon min amas. Ĉu mi ne scias tion ? Li ŝin minacis per ponardo en la mano por ŝin devigi min forlasi. Kion li ne faris por ŝteli al mi tiel ĉarman amatinon. Ho, dioj ! dioj ! ĉu estus eble, ke Manon min perfidis, ke ŝi ĉesis min ami ? »

Ĉar mi ĉiam diris, ke mi rapide revenos Parizon ; ĉar eĉ mi min levis ĉiumomente por tion efektiviĝi, mia patro bone vidis, ke en la ekscitego, en kiu mi troviĝis, nenio estus kapabla min haltigi. Li min kondukis en altan ĉambron, en kiu li lasis kun mi du servistojn por min okulgardi. Mi ne min posedis plu. Mi estus doninta mil vivojn por esti en Parizo dum unu kvarono

da horo. Mi komprenis, ke, ĉar mi konigis miajn intencojn tiel malkaŝe, oni ne al mi permesus facile, ke mi eliru el mia ĉambro. Mi okule mezuris la altecon de la fenestro ĝis la tero. Ĉar mi vidis neniun eblecon de forkuro per tiu vojo, mi min turnis milde al miaj du servistoj. Mi promesegis per mil ĵuradoj, ke iam mi faros ilian fortunon, se ili volus konsenti, ke mi forkuru. Mi ilin premis, ilin karesis, ilin minacis : sed tiu provo estis ankaŭ senutila. Tiam mi perdis ĉiun esperon : mi decidis, ke mi mortos, kaj mi ĵetis min sur la liton, intencante ĝin forlasi nur samtempe kun vivo. Mi pasigis nokton kaj sekvantan tagon en tiu stato. Mi rifuzis la nutraĵon, kiun oni alportis la morgaŭan tagon. Mia patro min vizitis dum tagmezo. Li havis bonecon flati miajn ĉagrenojn per la plej dolĉaj konsoloj, kaj al mi ordonis tiel absolute, ke mi manĝu ion ajn, ke mi tion faris pro respekto al liaj ordonoj. Kelkaj tagoj pasis, dum kiuj mi englutis nenion, escepte en lia ĉeesto kaj por lin obei : li ĉiam daŭrigis alporti al mi motivojn, kiuj povis min rekonduki al la saĝo, kaj inspiri al mi malŝaton al la malfidela Manon. Estas certe, ke mi ne ŝin estimis plu : ĉu mi povis estimi la plej malkonstantan kaj la plej perfidan el ĉiuj kreitaĵoj ? Sed ŝia vizaĝo, ŝiaj ĉarmaj trajtoj, kiujn mi portis funde de mia koro, ĉiam en ĝi persistis. Mi min sentis tre bone.

« Mi povos morti, mi diris ; mi eĉ devus tion fari, post tiom da hontoj kaj tiom da doloroj : sed vane mi suferus mil mortojn, mi tamen ne povus forgesi la maldankeman Manon'on. »

Mia patro miris, vidante, ke mi estas ĉiam tiel forte tuŝita : li sciis, ke mi havas principojn de honoro, kaj ne povis dubi, ke ŝia perfido ŝin malestimigis de mi : li imagis, ke mia konstanteco devenis malpli de tiu speciala pasio ol de ĝenerala inklino al virinoj. Li tiel al-

ligiĝis al tiu penso, ke, aŭskultante nur sian grandan amemon, li iam faris tiun proponon :

« Kavaliro, li diris, ĝis nun mi intencis, ke ci portu la krucon de Malte ; sed mi vidas, ke ciaj inklinoj ne sin turnas al tiu flanko. Ci amas beletajn virinojn. Mi intencas serĉi unu, kiu plaĉos al ci. Kompreneble klarigu al mi tion, kion ci opinias pri tio. »

Mi respondis, ke mi ne vidis ian diferencon inter ĉiuj ajn virinoj, kaj ke, post malfeliĉo al mi okazinta, mi ilin ĉiujn malamas egale.

« Mi serĉos unu, daŭrigis mia patro ridetante, kiu similos al Manon, sed kiu estos pli fidela.

— Ho ! se vi havas kelkan bonecon por mi, mi diris, estas ŝi, kiun vi devus redoni. Estu certa, mia patro, ke ŝi ne min perfidis ; ŝi ne estas kapabla de tiel nigra kaj tiel kruela malkuraĝaĵo. Estas la perfida B..., kiu nin trompas, vin, ŝin kaj min. Se vi scius, kiel ŝi estas amema kaj sincera, se vi ŝin konus, vi mem ŝin amus.

— Vi estas infano, respondis mia patro. Ĉu estas eble, ke vi blindigas vin ĝis tia grado, aŭdinte ĉion, kion mi al vi rakontis pri ŝi. Estas ŝi mem, kiu vin liveris al via frato. Vi devus forgesi eĉ sian nomon, kaj profiti, se vi estas prudenta, la malseverecon, kiun mi havas por vi. »

Mi tro klare rekonis, ke li estas prava. Nur senvola ekmovo min instigis al defendo de mia malfidelulino.

« Ho ve ! mi diris, post momento da silento, tro vere mi estas la malfeliĉa objekto de la plej malkuraĝa el ĉiuj perfidoj. Jes, mi daŭrigis, verŝante larmojn de kolerĉagreno, mi bone vidas, ke mi estas nur infano. Mia kredemo estis por ili tro facila trompeblaĵo. Sed mi bone scias tion, kion mi faros, por min venĝi. »

Mia patro volis scii, kia estis mia intenco.

« Mi iros Parizon, mi diris ; mi metos fajron en la domon de B..., kaj mi bruligos vivantajn lin kaj la perfidan Manon'on. »

Tiu kolerego ridigis mian patron, kaj havis kiel rezultaton, ke oni min gardis pli mallarĝe en mia malliberejo.

Mi en ĝi pasigis ses plenajn monatojn : dum la unua, en miaj inklinoj la ŝanĝoj montriĝis malmultaj. Ĉiuj miaj sentoj estis nur senĉesa alterneco de malamo kaj de amo, de espero kaj de malespero, laŭ la ideo sub kiu Manon prezentigis al mia spirito. Jen mi konsideris en ŝi nur la plej amindan el ĉiuj knabinoj ; kaj mi sekiĝis pro deziro ŝin revidi : jen mi vidis en ŝi nur malkuraĝan kaj perfidan amatinon, kaj mi faris mil ĵuradojn, ke mi serĉos ŝin nur por ŝin puni. Oni donis al mi librojn, kiuj min utilis, redonante al mia animo iom da trankvileco. Mi relegis ĉiujn miajn verkistojn. Mi akiris novajn konojn. Min reprenis grandega ŝato al la studado. Vi vidis, kian grandan utilon tio havis por mi pli poste. La lumoj, kiujn mi estis ricevinta de amo, klarigis por mi multajn lokojn de Horacio kaj de Virgilio, kiuj antaŭe al mi ŝajnis malklaraj. Mi faris aman komenton pri la kvara libro de Eneido : mi intencas ĝin meti en lumon, kaj mi esperas, ke la publiko estos kontenta.

« Ho ve ! mi diris, ĝin farante, amanton havantan koron similan al la mia bezonis la fidela Dido. »

Iam Tiberge venis min viziti en mia malliberejo. Min mirigis la fervoro per kiu li min kisis. Ĝis nun mi ne ankoraŭ havis pruvojn de lia amemo, kiuj povus ĝin konsiderigi de mi alie ol kiel simplan amikecon de kolegio, kiel ĝi formiĝas inter junuloj, kiuj estas proksimume samaĝaj. Mi trovis lin tiel ŝanĝitan kaj tiel viriĝintan, de kvin aŭ ses monatoj, dum kiuj mi ne lin vidis, ke lia vizaĝo kaj la tono de lia parolo inspiris al mi

respekton. Li parolis kun mi pli kiel prudenta konsilanto ol kiel lerneja amiko. Li min plendis, ĉar mi estis falinta en eraron. Li min gratulis pro mia resaniĝo, kiun li kredis preskaŭ finita : fine li min admonis, ke mi profitu tiun eraron de juneco por malfermi okulojn al la vanteco de plezuroj.

Mi lin rigardis kun miro. Li tion ekvidis.

« Mia kara kavaliro, li diris, mi diras al vi nenion, kiu ne estas firme vera, kaj pri kiu mi ne estas konvinkita per serioza ekzameno. Mi havis tiom da emo al volupto, kiom vi ; sed la ĉielo al mi donis samtempe emon al virto. Mi utiligis mian prudenton por kompari inter ili fruktojn de unu kaj de alia ; kaj mi ne bezonis longan komparon por malkovri iliajn diferencojn. Ĉielo kuniĝis kun miaj pripensadoj por min helpadi. Mi sentis al la mondo malŝaton, al kiu nenio egalas. Ĉu vi divenus tion, kio min detenas en ĝi, li aldonis, kaj kio malhelpas, ke mi alkuru al soleco ? Ĝi estas nur la kora amikeco, kiun mi sentas al vi. Mi konas la bonegecon de via koro kaj de via spirito : estas nenia bonaĵo, de kiu vi ne povas fariĝi kapabla. La veneno de plezuro vin deklinigis for de la vojo. Kia perdo por la virto ! Via forkuro el Amiens kaŭzis al mi tiom da doloro, ke mi ne sentis, de tiu tago, eĉ unu minuton de kontento. Tion juĝu per la klopodoj, kiujn ĝi al mi farigis. »

Li rakontis, ke, ekvidinte, ke mi estis trompinta lin kaj elirinta kun mia amatino, li prenis ĉevalon kaj min sekvis rajde : sed, ĉar mi lin antaŭiris de kvar aŭ kvin horoj, estis neeble, ke li min realiru : tamen li alvenis al Saint-Denis unu duonhoron post mia eliro : ĉar li estis certa, ke mi rifuĝis en Parizon, li tie pasigis ses semajnojn, min serĉante senutile : li iris en ĉiujn lokojn, en kiuj li esperis min renkonti, kaj fine ian tagon li rekonis mian amatinon en la komediejo : ŝi en ĝi troviĝis

sub tualetoj tiel luksega, ke li divenis, ke ŝi devis tiun riĉecon al nova amanto : li sekvis ŝian karoson ĝis ŝia domo, kaj li sciis per servisto, ke ŝian luksvivadon pagis la malŝparaĵoj de Sinjoro de B...

« Mi ne ĉesigis tie mian enketon, li daŭrigis. Mi revenis en ŝian domon, la morgaŭan tagon, por scii de ŝi mem tion, kio vi estis fariĝinta : aŭdinte, ke mi parolas pri vi, ŝi min tuje forlasis ; kaj mi estis devigata reveni en provincon, ricevinte neniun klarigon. Tie mi konis vian aventuron, kaj la ĉagrenegon, kiun ĝi kaŭzis al vi : sed mi ne volis vin vidi, antaŭ kiam mi estus certa, ke mi trovos vin pli trankvila.

— Do, vi vidis Manon'on, mi respondis sopirante. Ho ve ! vi estas pli feliĉa ol mi, kiu estas kondamnita neniam ŝin revidi. »

Li min riproĉis pro tiu sopiro, kiu montris, ke mia malforta koro ankoraŭ inkliniĝas al ŝi. Li min flatis tiel lerte pri la boneco de mia karaktero kaj pri miaj emoj, ke li naskigis en mi, de tiu unua vizito, fortan deziron forlasi, kiel li, ĉiujn plezurojn de tiu jarcento, por eniri en eklezian profesion.

Mi tiel ŝatis tiun ideon, ke, kiam mi troviĝis sola, mi min okupis nur pri tiu afero. Mi memoris la paroladojn de lia Amiens'a episkopa Moŝto, kiu donis al mi samajn konsilojn, kaj la feliĉajn antaŭsignojn de li montritajn al mi, se okaze mi akceptus tiun decidon. La pieco ankaŭ miksiĝis kun tiuj konsideroj.

« Mi direktos mian vivon saĝe kaj kristane, mi diris ; mi min okupos per studado kaj religio, kiuj ne ebligas, ke mi pensu al la danĝerplenaj plezuroj de l'amo. Mi malŝatos tion, kion admiras la plimulto da homoj ; kaj, ĉar mi sufiĉe sentos, ke mia koro deziras nur tion, kion ĝi estimas, mi havos tiom malmulte da maltrankvilaĵoj kiom da deziroj. »

Mi antaŭtempe imagis pri tio sistemon de vivo trankvila kaj sola. En ĝin mi enirigis domon formetitan for de tumultaĵoj, kun malgranda arbareto kaj rivereto el dolĉa akvo funde de ĝardeno, biblioteko farita el libroj elektitaj, malmulto da amikoj virtemaj kaj prudentemaj, manĝotablo konvena sed simpla kaj modera. Al ĝi mi aldonis literaturajn interrilatojn kun amiko, kiu loĝus en Parizo, kaj min informus pri la publikaj novaĵoj, malpli por satigi mian sciemon, ol por min distri el malprudentaj agitaĵoj de homoj.

« Ĉu mi ne estos feliĉa, mi aldonis ; ĉu ĉiuj miaj deziroj ne estos efektivigitaj ? »

Estas certe, ke tiu projekto tre kontentigis miajn inklinojn. Sed, por tute plenigi tiel saĝan aranĝon, mi sentis, ke mia koro atendis ankoraŭ alian aferon, kaj ke, por ke mi havu nenion dezirindan en la plej ĉarmoplena solecejo, necese estis, ke mi en ĝi vivadu kun Manon.

Tamen, ĉar Tiberge daŭrigis min ofte vizitadi, por min kuraĝigi en la decido inspirita de li, mi profitis okazon por tion konigi al mia patro. Li certigis, ke li intencas lasi siajn filojn liberaj en la elekto de iliaj profesioj, kaj ke, kia ajn estu la maniero, laŭ kiu mi volas disponi de mi, li al si rezervas nur la rajton min helpi per siaj konsiloj. Tiuj konsiloj estis tre prudentaj, kaj malpli celis min tedigi pro mia projekto, ol min instigi al la plenumo de ĝi, ĝin pli bone konigante al mi. La renoviĝo de la skolastika jaro alproksimiĝis. Tiberge kaj mi interkonsentis, ke ni nin metos kune en la seminarion de Saint-Sulpice¹, li por fini siajn studadojn de teologio, kaj mi por komenci la miajn.

1. Elparolu : *Sin Sulpis*.

Pro lia merito, kiu estis konita de l'eparhio, li ricevis de tiu prelato beneficion, antaŭ kiam ni eliros.

Mia patro, kiu kredis min tute resanigita el mia pasio, faris neniun malfacilecon por lasi min eliri. Ni alvenis en Parizon. Eklezia vesto anstataŭis la krucon de Malte, kaj la nomo de abato des Grioux tiun de kavaliro. Mi alligis min al la studado per tia fervoro, ke, dum malmulte da monatoj, mi faris eksterordinarajn progresojn. Mi uzis parton de nokto kaj ne perdis unu momenton de tago. Mia bonfamo havis tian helecon, ke jam oni min gratulis pri la rango, kiun mi devige estis ricevonta : kaj kvankam mi ne tion postulis, mia nomo estis kuŝigita sur la paperfolion de beneficioj. Samtempe pieco ne estis malzorgita : mi havis fervoron por ĉiuj ekzercoj. Tiberge estis kontentega pro tio, kion li rigardis kiel sian agon, kaj multajn fojojn mi vidis, ke li verŝis larmojn, sin aplaŭdante pri tio, kion li nomis mia konvertiĝo. Ke homaj decidoj estas ŝanĝemaj, tio neniel mirigos iun ; ia pasio ilin naskas, pasio alia povas ilin detruiri : sed kiam mi pensas al la sankteco de tiuj, kiuj min kondukis al Saint-Sulpice, al la interna ĝojo, kiun ĉielo al mi gustumigis, dum mi plenumis ilin, mi estas terurita, vidante, kiel facile mi povis ilin rompi. Se estas vere, ke ĉielaj helpoj havas ĉiumomente forton egalan al tiu de pasioj, oni do klarigu al mi, kial pereiga ensorĉaĵo min subite forportis for de mia devo, kaj min igis tute nekapabla kontraŭbatali iomete kaj eksenti ian konscienciproĉon. Mi kredis min absolute liberigita el malfortecoj de l'amo. Ŝajnis al mi, ke mi estus preferinta legadon de Sankta-Aŭgustino aŭ kvaronon da horo de kristana meditado al ĉiuj plezuroj de sentoj, ne esceptante tiujn, kiuj estus prezentitaj de Manon. Tamen unu malfeliĉa momento min refaligis en la profundegaĵon, kaj mia falo estis des pli neriparebla, ke, ĉar

mi subite min trovis en la sama grado de profundeco, el kiu mi estis elirinta, la novaj malordaĵoj, en kiujn mi falis, min portis multe pli malproksimen en la fundon de l'abismo.

Mi pasigis preskaŭ unu jaro en Parizo, ne farante esploron pri la aferoj de Manon. En la unuaj momentoj, por mi estis vera penego fari tian perforton al miaj sentoj : sed la konsiloj de Tiberge ĉiam ĉeestantaj kaj miaj propraj pensadoj al mi donis la venkon. La lastaj monatoj fluis tiel trankvile, ke mi kredis min ekforgesonta tiun ĉarman kaj perfidan kreitaĵon. Tempo alvenis, en kiu mi estis disputonta pri publika ekzercado en la teologia lernejo : mi petis de kelkaj konsiderindaj personoj, ke ili min honoru per sia ĉeesto. Pro tio mia nomo estis dissemita tra ĉiuj kvartaloj de Parizo : ĝi iris ĝis oreloj de mia malfidelulino. Si ne lin rekonis kun certeco sub la titolo de abato, sed restaĵo de scivolo aŭ eble ia pento pro ŝia perfido al mi (mi neniam povis malkonfuzi, kiu el tiuj du sentoj superis) ŝin interesigis pri nomo tiel simila al la mia. Si venis en Sorbonon kun kelkaj aliaj sinjorinoj. Si ĉeestis ĉe mia ekzercado, kaj verŝajne ŝi havis malmulte da malfacileco por min rekonu.

Mi havis neniun konon pri ŝia vizito. Oni scias, ke troviĝas en tiuj lokoj privataj kameroj por sinjorinoj, en kiuj ili ĉeestas nevideblaj malantaŭ pendanta kaŝilo. Mi revenis al Saint-Sulpice kovrite de gloro kaj ŝargite de komplimentoj. Estis la sesa vespere. Oni min avertis, unu momenton post mia reveno, ke ia sinjorino petis por min vidi. Mi iris al la parolejo. Dio ! kia surprizanta aperaĵo ! Mi en ĝi trovis Manon'on. Ĝi estis ŝi, sed pli aminda kaj pli brila ol mi iam ŝin vidis. Ŝi estis en sia dekoka jaro. Ŝiaj ĉarmoj preteriris ĉion, kion oni povas priskribi. Si havis mienon tiel delikatan,

tiel mildan, tiel plaĉindan, la mienon de l'amo mem !
Sia tuta vizaĝo ŝajnis al mi ensorĉaĵo.

Sin vidante, mi restis konfuza ; kaj, ĉar mi ne povis konjekti, kia estas la celo de ŝia vizito, mi atendis kun okuloj mallevitaj kaj kun tremado, ke ŝi komencu klarigon. Ŝia embaraso estis dum kelka tempo egala al la mia : sed, vidante, ke mia silento daŭras, ŝi metis manon antaŭ siajn okulojn por kaŝi kelkajn larmojn. Ŝi diris per tono timema, ke ŝi konfesis, ke ŝia malfideleco meritas mian malamon, sed ke, se estas vere, ke mi sentis kelkan amemon al ŝi, mi miavice estis tre kruela, lasinte pasigi du jarojn kaj ne zorgante ŝin informi pri mia sorto, kaj ke mi ankoraŭ min montras tre malmola, ŝin vidante en la stato, en kiu ŝi estas en mia ĉeesto, kaj ne dirante unu parolon. La malordo de mia animo, dum mi ŝin aŭskultis, ne povus esti esprimita.

Ŝi sidiĝis, sed mi ne ; kaj mi restis kun korpo oblikve staranta, ne kuraĝante ŝin rigardadi rekte. Mi pli ol unu fojon komencis respondon, kiun mi ne povis fini pro manko de forto. Fine mi faris ekpenon, kaj ekkriis dolore :

« Perfida Manon ! Ha ! perfida ! perfida ! »

Ŝi ripetis, ploregante varmajn larmojn, ke ŝi ne pretendas justigi sian perfidon.

« Kion do vi pretendas ? mi ekkriis ankoraŭ.

— Mi pretendas morti, ŝi respondis, se vi ne redonas al mi vian koron, sen kiu estas neeble, ke mi vivu.

— Petu do mian vivon, malfidela, mi daŭrigis, verŝante mem larmojn, kiujn mi vane penadis deteni, petu mian vivon, la solan aferon, kiu restas oferebla de mi : ĉar mi ne ĉesis aparteni al ci. »

Apenaŭ mi estis fininta tiujn lastajn vortojn, ke ŝi sin levis kun ekscitego, kaj venis al mi por min kisi. Ŝi min premegis per mil pasiaj karesoj. Ŝi min

nomis per ĉiuj vortoj, kiujn elpensas amo por esprimi siajn plej ardantajn korszentojn. Ĝis nun mi respondis al ili nur malarde. Efektive kia transiro el la trankvila situacio, en kiu mi estis, al la tumultoplenaj movadoj, kiujn mi sentis renaskiĝi. Mi estis terurita pro tio. Mi tremetis, kiel okazas, kiam oni troviĝas nokte en nekonita kamparo : oni kredas sin transportita en novan ordon de aferoj ; oni estas kaptita de sekreta teruro, el kiu oni sentas sin liberigita, nur kiam oni longatempe observis la ĉirkaŭaĵojn.

Ni sidiĝis unu apud la alia. Mi prenis ŝiajn manojn en la miajn.

« Ha ! Manon, mi diris, ŝin rigardante per okulo malgaja, mi ne atendis la nigran perfidon, per kiu vi pagis mian amon. Estis al vi tre facile trompi koron, kies absoluta regantino vi estis, kaj kiu sin sentis vere feliĉa, nur kiam ĝi al vi plaĉis kaj obeis. Diru nun, ĉu vi trovis aliulon tiel ameman kaj tiel submetitan. Ne, ne ; la naturo ne faras multajn korojn sammaniere trempitajn kiel la mian. Diru, ĉu almenaŭ vi kelkafoje ĝin bedaŭris. Kian konfidon mi devas havi en tiu realiro de boneco, kiu vin revenigas hodiaŭ por ĝin konsoli. Mi tro vidas, ke vi estas pli ĉarma ol vi iam estis : sed, je la nomo de ĉiuj doloroj, kiujn mi por vi suferis, bela Manon, diru, ĉu vi estos pli fidela ? »

Ŝi respondis aferojn tiel kortuŝantajn pri ŝia pento, kaj ŝi promesis fidelecon per tiom da protestoj kaj tiom da ĵuradoj, ke ŝi min emociis laŭ neimagebla grado.

« Kara Manon, mi diris per profana miksaĵo de amaj kaj teologiaj esprimoj, ci estas tro adorinda por esti simpla kreitaĵo. Mi sentas mian koron forportitan de venkinta delectacio. Ĉio, kion oni diras pri libereco en Saint-Sulpice, estas ĥimero. Mi ekperdos mian riĉecon kaj mian bonfamon por ci ; mi tre bone tion antaŭ-

vidas, mi legas mian fatalon en ciał belaj okuloj : sed el kiał perdaĵoj mi ne estos konsolita, havante ciał amon. Favoroj de riĉeco ne min kortuŝas ; gloro ŝajnas al mi fumo ; ĉiuj miaj projektoj de eklezia vivado estis frenezaj imagaĵoj ; fine ĉiuj bonaĵoj, kiuj diferencas el tiuj, kiujn mi esperas ricevi de ci, estas malŝatindaj bonaĵoj, ĉar ili ne scius kontraŭbatali en mia koro, dum unu momento, kontraŭ unu sola el ciał rigardoj. »

Sed, kvankam mi al ŝi promesis ĝeneralan forgeson de ŝiaj kulpoj, mi volis tamen esti informita per kiał maniero, ŝi lasis sin delogi de B... Ŝi min sciigis, ke li, ŝin vidinte en ŝia fenestro, fariĝis pasiema al ŝi ; ke li faris sian amkonfeson kiel ĝenerala farmoprenanto, tio estas, konigante en letero, ke la pago proporciigos kun la favoroj ; ke ŝi unue kapitulacis, sed havante nenian alian intencon ol eltiri el li grandegan monsumon, kiu povus utili por nin vivi pli facile ; ke li ŝin blindigis per tiel mirindaj promesoj, ke ŝi iom post iom sin lasis ŝanceli ; ke tamen mi devis juĝi ŝiajn konscienciproĉojn per la doloro, kies atestojn ŝi al mi vidigis, la antaŭtagon de nia disiĝo ; ke malgraŭ la lukseco, en kiu li ŝin dorlotis, neniam ŝi sentis feliĉon kun li, ne nur, ĉar ŝi ne trovis en li, ŝi diris, la delikatecon de miaj sentoj, sed ĉar, en mezo mem de plezuroj, kiujn li senĉese malŝparis al ŝi, ŝi sentis funde de ŝia koro la memoron de mia amo kaj la konscienciproĉojn de sia malfideleco. Ŝi parolis pri Tiberge, kaj pri la fortega konfuzo, kiun lia vizito kaŭzis al ŝi.

« Frapo de spado en koron, ŝi aldonis, estus malpli movinta mian sangon. Mi turnis al li mian dorson, ne povante toleri lian ĉeeston, eĉ unu momenton. »

Ŝi daŭrigis, rakontante per kiał rimedoj ŝi estis sciigita pri mia ĉeesto en Parizo, pri la ŝanĝo de mia situacio, kaj pri miaj ekzercadoj en Sorbono. Ŝi certigis,

ke ŝi estis tiel emociita dum la disputado, ke ŝi tre mal-facilige detenis ne nur siajn larmojn sed eĉ siajn ĝemojn kaj siajn kriojn, kiuj pli ol unu fojon preskaŭ eksplodis. Fine ŝi diris, ke ŝi el tiu loko estis elirinta la lasta, por kaŝi sian konfuzon, kaj ke, obeinte nur ekinstigon de sia koro kaj ardegecon de siaj deziroj, ŝi estis veninta rekte al seminario, decidinte, ke ŝi mortos en ĝi, se ŝi ne trovas min bonvolantan ŝin pardonni.

Kie trovi barbarulon, kiun ne estus kortuŝinta tiel viva kaj tiel amema pento? Pri mi, mi sentis en tiu momento, ke mi estus oferinta por Manon ĉiuj episkop-ejojn de kristana mondo. Mi petis de ŝi, kia nova aranĝo ŝi opinias taŭga por ordigi niajn aferojn. Ŝi respondis, ke necese estas, ke ni eliru tuje el la seminario, kaj ke ni diskutos pri aranĝaĵoj en loko pli senriska. Mi konsentis ĉiujn ŝiajn voladojn, ne protestante. Ŝi eniris en sian karoson, por min atendi ĉe angulo de la strato. Mi foriris post momento, ne ekvidite de la pordisto. Mi enkarosiĝis kun ŝi. Mi aliris al vestovendejo. Mi reprenis galonojn kaj spadon. Manon pagis la elspezon, ĉar mi estis sen unu monero: timante, ke mi trovos baron por eliri el Saint-Sulpice, ŝi ne volis, ke mi reeniru, eĉ momenton, en mian ĉambron, por preni en ĝi mian monon. Cetere mia trezoro estis malgranda, kaj ŝi estis sufiĉe riĉa pro la malavaraĵoj de B... por malŝati tion, kion ŝi de mi forlasigis. Ni diskutis ĉe la vestovendisto mem pri la decido, kiun ni ekprenos. Por pli valorigi antaŭ mi la oferon, kiun ŝi al mi faris, forlasante B... 'on, ŝi decidis, ke ŝi ne konservos por li eĉ la plej malgrandan afablecon.

« Mi volas lasi al li liajn meblojn, ŝi diris, ĉar ili al li apartenas: sed mi kunprenos, kiel juste, juvelojn kaj preskaŭ sesdek mil frankojn, kiujn mi eltiris el li dum du jaroj. Mi donis al li neniun povon sur min, ŝi

aldonis ; do mi povas sentime resti en Parizo, luprenante oportunan domon, en kiu ni vivos feliĉaj. »

Mi al ŝi rimarkigis, ke se troviĝas neniu danĝero por ŝi, ĝi kontraŭe estas grava por mi, kiu neeviteble iom pli frue iom pli malfrue estos rekonita ; tiam senĉese mi riskos la malfeliĉon, kiun mi jam suferis. Ŝi al mi divenigis, ke ŝi ne forlasus Parizon sen bedaŭro. Mi tiel timis ŝin ĉagreni, ke ekzistis nenioj hazardoj, kiujn mi ne malŝatus, por plezurigi al ŝi. Tamen ni trovis konvenan konsenton ; ĝi estis lupreni domon en ia vilaĝo apud Parizo, el kiu estus facile al ni iri al la urbo, kiam plezuro aŭ bezono nin al ĝi vokus. Ni elektis Chaillot'on¹, kiu ne estas malproksima. Manon revenis tuje al sia hejmo. Mi iris ŝin atendi ĉe la pordeto de Tuileries². Ŝi revenis post unu horo, en dungita karoso, kun knabino, kiu ŝin servis, kaj kelkaj vojaĝkesto, en kiuj ŝiaj vestaĵoj kaj ĉiuj multekostaĵoj al ŝi apartenantaj estis enfermitaj.

Ni senprokraste aliris al Chaillot. La unuan nokton, ni loĝis en gastejo, volante doni al ni la tempon necesan por serĉi domon aŭ almenaŭ oportunan apartamenton. De la morgaŭa tago, mi trovis loĝejon tute ŝatindan.

Unue mia feliĉeco ŝajnis starigita laŭ neŝancelebla maniero. Manon estis la dolĉeco kaj la komplezo mem. Ŝi havis por mi atentaĵojn kaj delikataĵojn tiajn, ke mi kredis min plene pagita pri ĉiuj miaj ĉagrenoj. Ĉar ni ambaŭ estis akirintaj iom da sperteco, ni rezonis pri la firmeco de nia riĉeco. Sesdek mil frankoj, kiuj faris la fundamenton de nia havaĵo, ne estis monsumo povanta

1. Elparolu : *Sajo*.

2. Elparolu : *Tuileries*.

daŭri tiel longatempe kiel la fluo de longa vivado. Cetere ni ne intencis tro malvastigi niajn elspezojn. La unua kvalito de Manon kiel de mi ne estis ŝparemo. Jen estas la plano, kiun mi proponis :

« Sesdek mil frankoj, mi diris, povas nin subteni dum dek jaroj. Du mil skudoj sufiĉas ĉiujare, se ni daŭras vivi en Chaillot. Ni en ĝi havos vivmanieron konvenan sed simplan. Nia sola elspezo estos por dungo de karoso kaj por teatroj. Ni nin reguligos. Vi amas Operon ; ni iros en ĝi du fojojn ĉiusemajne. Pri ludo, ni nin tiel limigos, ke niaj malgajnoj neniam preteriros du monpistoilojn. Estas neeble, ke, dum intertempo de dek jaroj, ia ŝanĝo ne okazos en mia familio : mia patro estas maljuna ; li povas morti. Tiam mi havos heredaĵon ; kaj ni estos liberigitaj el ĉiuj timadoj al estonteco. »

Tia aranĝo ne estus estinta la plej freneza ago de mia vivo, se ni estus estintaj sufiĉe prudentaj por nin submeti konstante sub ĝin. Sed niaj decidoj apenaŭ daŭris pli ol unu monaton. Manon estis pasia al plezuro ; mi same, por ŝin plezurigi. Ĉiumomente naskis novaj okazoj de elspezo ; kaj ne nur mi ne bedaŭris la monsumojn, kiujn ŝi kelkafoje elspezis tro malŝpareme, sed plie mi unua al ŝi donacis ĉion, kion mi kredis kapabla plaĉi al ŝi. Nia loĝejo de Chaillot eĉ komencis fariĝi por ŝi ŝarĝo. La vintro alproksimiĝis ; ĉiuj homoj revenis al urbo, kaj la kamparo fariĝis senhoma. Ŝi proponis, ke ni reluprenu domon en Parizo. Pri tio mi ne konsentis ; sed por plezurigi al ŝi iome, mi diris, ke ni povas lui meblitan apartamenton, en kiu ni pasigos la nokton, kiam okaze ni tro malfrue forlasos la kunvenon, en kiun ni iris kelkajn fojojn dum semajno : ĉar tre maloportuniĝis reveni tiel malfrue al Chaillot, tia estis la preteksto, kiun ŝi alportis por voli ĝin forlasi. Tiamaniere ni donis al ni du loĝejojn, unu en urbo, unu sur kamparo. Tiu

ŝanĝo metis en niajn aferojn la plej grandan malordon kaj naskis du aventurojn, kiuj kaŭzis nian ruinon.

Manon havis fraton, kiu estis korpogardisto. Bedaŭrinde li loĝis en Parizo, en la sama strato kiel ni. Li rekonis sian fratino, ŝin vidante, ian matenon, en ŝia fenestro. Li eniris en nian ĉambron, terure blasfemante; kaj, ĉar li konis parton de aventuroj de sia fratino, li ŝin premegis per insultoj kaj riproĉoj. Mi estis elirinta unu momenton antaŭe: sendube tio estis feliĉa por li aŭ por mi, kiu ne tute min sentis ĉu ricevi insulton. Mi revenis hejmen nur post lia eliro. La malĝojeco de Manon al mi juĝigis, ke io eksterordinara okazis. Ŝi rakontis la bedaŭrindan disputon, kiun antaŭ momento ŝi estis suferinta, kaj la maldelikategajn riproĉojn de sia frato. Tio min tiel koleregis, ke mi tuje estus alkurinta al la venĝo, se ŝi ne estus haltiginta min per siaj larmoj. Dum mi interparolis kun ŝi pri tiu aventuro, la korpogardisto reeniris en la ĉambron, en kiu ni estis, ne sin anonciginte. Mi ne estus akceptinta lin tiel ĝentile, kiel mi faris, se mi estus koninta lin: sed, nin salutinte kun ridanta mieno, li havis tempon diri al Manon, ke li venas por peti senkulpigojn pri lia malmodereco; ke li kredis ŝin en malordo, kaj ke tiu opinio ekbruligis lian koleron; sed ke, sin informinte al unu el niaj servistoj pri mia estmaniero, li estis eksciinta aferojn tiel ŝatindajn pri mi, ke pro tio li deziris bone vivadi kun mi. Kvankam tiu informo, kiu venis el unu el niaj lakeoj, enhavis ion strangan kaj ŝokindan, mi ricevis afable lian komplimenton. Mi kredis plezurigi al Manon. Ŝi ŝajnis kontentega, vidante lin ĉu al paciĝo. Ni lin konservis por vespermanĝi. Post kelkaj momentoj, li fariĝis tiel senĝena, ke, aŭdinte, ke ni parolis pri nia reveno al Chaillot, li volis absolute nin akompani. Ni estis devigitaj doni al li lokon en nia karoso. Tio far-

iĝis elokupado : ĉar baldaŭ li kutimis nin vidi tiel plezure, ke li agis en nia hejmo kiel en la sia, kaj post kelke da tempo sin faris kvazaŭa mastro de ĉio nin apartenanta. Li vokis min sia frato, kaj, pretekstante la fratan liberecon, li sencere monie enkondukis ĉiujn siajn amikojn en nian domon de Chaillot, kaj ilin regalas per niaj elspezoj. Li sin belege vestigis per nia mono. Li eĉ nin admonis, ke ni pagu liajn ŝuldojn. Mi fermis okulojn pri tiu tiraneco, por ne malplaĉi al Mannon ; mi eĉ ŝajnigis ne ekvidi, ke li eltiris el ŝi de tempo al tempo gravegajn monsumojn. Verdire, ĉar li estis tre ludamanta, li havis sufiĉe da honesteco por redoni al ŝi parton, kiam lia fortune lin favoris : sed la nia estis tro malvasta por satigi longatempe elspezojn tiel malmulte moderajn. Mi estis ekdiskutonta kun li pri tiu punkto, por nin liberigi el liaj altrudaĵoj, kiam pereiga okazintaĵo senutiligis tiun tedaĵon, kaŭzante alian, kiu nin enabismigis, nin lasante sen ia provizo.

Ian tagon, ni estis restintaj en Parizo por en ĝi pasigi nokton, kiel tio tre ofte okazis. La servistino, kiu, en tiuj okazoj, restis sola en Chaillot, venis matene min averti, ke fajro ekbruliĝis dum nokto en mia domo, kaj ke oni estis havinta multe da malfacileco por ĝin estingi. Mi petis de ŝi, ĉu niaj mebloj estis suferintaj kelkan damaĝon : ŝi respondis, ke estis tiel granda la konfuzo kaŭzita de la multeco da fremduloj, kiuj estis alkurintaj por helpi, ke ŝi povis nenion certigi. Mi tremis pro nia mono, kiu estis enfermita en malgranda kaso. Mi rapide aliris al Chaillot. Senutila rapideco ! jam la kaso estis malaperinta. Mi sentis tiam, ke oni povas ŝati la monon, kvankam oni ne estas avara. Tiu perdo min penetris de tiel viva doloro, ke mi kredis perdi prudenton. Mi tuj komprenis la novajn malfeliĉaĵojn, de kiuj mi estis minacita. La malriĉeco estis la plej malgrava el ili. Mi

konis Manon'on : mi jam tro provis, ke, kvankam ŝi estis tre fidela kaj tre koralligita al mi en bona fortuna, tamen mi ne devis konfidi al ŝi en mizereco. Ŝi tro amis sufiĉegon kaj plezurojn por ilin oferi al mi.

« Mi ŝin perdos, mi ekkriis. Malfeliĉa kavaliro ! ci do ankoraŭ ekperdos ĉion, kion ci amas ! »

Tiu penso min ĵetis en konfuzon tiel teruran, ke mi ŝanceliĝis dum unu momento, ĉu mi ne agus pli bone, finante ĉiujn miajn malbonaĵojn per morto. Tamen mi konservis sufiĉe da spiritĉeesto por voli ekzameni antaŭe, ĉu restas al mi neniu helprimedo. Ĉielo naskigis en mi ideon, kiu haltigis mian malesperon. Mi kredis, ke ne estus neeble, ke mi kaŝu nian perdon al Manon, kaj ke per industrio aŭ per ia favoro de l'hazardo, mi povu liveri la monon necesan al ŝia vivado sufiĉe large, por malhelpi, ke ŝi sentu bezonon.

« Mi kalkulis, mi diris por min konsoli, ke dudekmil skudoj al mi sufiĉos dum dek jaroj : ni supozu, ke la dek jaroj estis fluintaj, kaj ke en mia familio okazis neniuj el ŝanĝoj de mi esperitaj. Kian decidon mi prenis ? Tion mi ne scias tre bone ; sed tion, kion mi estus farinta, kio min malhelpas fari hodiaŭ ? Kiom da personoj en Parizo vivas, kiuj havas nek mian spiriton nek miajn naturajn kvalitojn, kaj kiuj tamen ŝuldas siajn vivrimedojn al siaj talentoj, kiaj ajn ili estu ? Ĉu Providenco, mi aldonis, pripensante pri diversaj statoj de vivo, ne aranĝis aferojn tre prudente ? Plimulto el altranguloj kaj el riĉuloj estas malsprituloj. Tio estas klara, por tiu, kiu iom konas la socion. Sed kuŝas funde de tio ĉi admirinda justeco. Se ili jungus spritecon kun riĉeco, ili estus tro feliĉaj, kaj la cetero de homoj tro mizera. Kvalitoj de korpo kaj de animo estas donacitaj al ĉi tiuj lastaj, kiel rimedo, por ke ili povu sin eltiri el mizereco kaj el malriĉeco. Unuj partoprenas al riĉaĵoj de alt-

ranguloj : servante iliajn plezurojn, ili igas ilin siaj moktrompitoj : aliaj servas ilian instruadon ; ili penadas por ilin honestigi : verdire ili sukcesas tre malofte : sed tio ne estas la celo de dia saĝeco : ĉiam ili eltiris frukton el siaj klopodoj, tio estas : vivi per la mono de tiuj, kiujn ili instruas : kia ajn estas la maniero per kiu oni tion rigardas, estas bonega fonto de rentoj por malalt-ranguloj la malspriteco de riĉuloj kaj de altranguloj. »

Tiuj pensoj iom reordigis mian koron kaj mian kapon. Mi decidis unue, ke mi konsiliĝos kun sinjoro Lescaut, la frato de Manon. Li perfekte konis Parizon : kaj mi estis havinta tro da okazoj, por rekoni, ke nek el sia posedaĵo nek el la soldo de la reĝo li eltiris sian plej gravan renton. Restis al mi apenaŭ dudek monpistoloj, kiuj feliĉe estis troviĝintaj en mia poŝo. Mi montris al li mian monujon, klarigante mian malfeliĉon kaj miajn timaĵojn ; kaj mi petis, ĉu ekzistas alia decido elektota de mi, aŭ morti de malsato, aŭ rompi mian kapon pro malespero. Li respondis, ke rompi sian kapon estas rimedo por malsprituloj : pri la morto per malsato, multegaj sprituloj al ĝi estas dediĉitaj, kiam ili ne volas utiligi siajn talentojn ; mi devis ekzameni, pri kio mi estas kapabla ; kaj li certigis sian helpadon kaj siajn konsilojn en ĉiuj miaj entreprenoj.

« Tio estas tre malpreciza, sinjoro Lescaut, mi diris : miaj bezonoj postulas rimedon pli urĝan ; ĉar kion vi volas, ke mi diros al Manon ?

— Pri Manon, li respondis, kio vin embarasas ? Ĉu vi ne havas per ŝi rimedon, por fini viajn maltrankvilecojn, kiam vi volas ? Knabino kiel ŝi devus nin vivigi ĉiujn, vin, ŝin kaj min. »

Li haltigis la respondon, kiun meritis tia malkonvenaĵo, kaj daŭris, dirante, ke li garantias antaŭ vespero mil skudojn dividotajn inter ni, se mi volas plenumi lian

konsilon : li konas sinjoregon tiel malavaran pri ĉapitro de plezuroj, ke li estas certa, ke mil skudoj al li mal multe kostus, por ricevi favorojn de knabino kiel Manon. Mi lin haltigis.

« Mi havis pli bonan opinion pri vi, mi respondis : mi imagis, ke la motivo, kiun vi havis por doni al mi vian amikecon, estis sento tute kontraŭa al tiu, en kiu vi estas nun. »

Li konfesis senhonte, ke ĉiam li opiniis sammaniere : ĉar lia fratino unufoje malrespektis la leĝojn de sia sekso, kvankam ŝi tion faris por favori la viron, kiun li plej amas, tamen li paciĝis kun ŝi, nur ĉar li esperis, ke li eltiros profiton el ŝia malbona konduto. Al mi estis facile juĝi, ke ĝis nun ni estis estintaj liaj mok-trompitoj. Tamen, kvankam tiu parolado min multe emociis, ĉar mi bezonis lin, mi estis devigata respondi ridante, ke lia konsilo estas lasta rimedo, kiun oni devas uzi nur ekstreme. Mi petis, ke li malfermu alian vojon. Li proponis, ke mi profitu mian junecon kaj la agrablan vizaĝon, kiun mi estis ricevinta de naturo, por min kunigi kun ia sinjorino maljuna kaj malavara. Mi same ne ŝatis tiun proponon, kiu min estus malfideliginta al Manon. Mi parolis pri la ludado, kiu ŝajnis la plej facila kaj la plej taŭga en mia situacio. Li diris, ke vere la ludado estas vivrimedo, sed tio petas klarigojn : entrepreni ludadon simplan, kiam oni havas nur komunajn esperojn, estas vera rimedo por rapidigi sian pereon ; pretendi, ke mi ekzercos sola, kaj ne helpite, la malgrandajn rimedojn, kiujn uzas sperta homo por korekti fortunon, estas metio tro danĝeroplana : ekzistas tria vojo, kiu estas tiu de interligo ; sed li timis, ke pro mia juneco la sinjoroj interligitaj opinios, ke mi ne havas ankoraŭ kvalitojn taŭgajn por interligo. Tamen li promesis, ke li parolos al ili pri mi favore ; kaj (tion mi ne

estus esperinta) li proponis al mi kelkan monon, se mi troviĝus premata de bezono. La sola servo, kiun mi petis de li en tiuj cirkonstancoj, estis, ke li neniel sciigu Manon'on pri la perdo de mi farita kaj pri la temo de nia interparolado.

Mi eliris el lia hejmo malpli kontenta ankoraŭ ol mi estis, kiam mi eniris en ĝin. Mi eĉ pentis, ĉar mi konfidis mian sekreton. Li estis farinta por mi nenion, kion mi ne estus ricevinta sen tiu konfidencio; kaj mi morte timis, ke li ne plenumos la promeson, kiun li faris al mi: nenion malkovri al Manon. Mi ankaŭ havis motivojn por timi, post la malkovro de liaj sentoj, ke li ne intencos eltiri profiton el ŝi, laŭ liaj propraj terminoj, ŝin formetante el miaj manoj aŭ almenaŭ konsilante al ŝi, ke ŝi min forlasu, por sin alligi al amanto pli riĉa kaj pli feliĉa. Mi faris pri tio mil pripensojn, kiuj havis kiel rezultaton nur min turmenti kaj renovigi la malesperon, en kiu mi troviĝis dum mateno. Multajn fojojn venis en mian spiriton ideo, skribi al mia patro kaj ŝajnigi novan konvertiĝon, por ricevi de li ian monhelpadon: sed mi tuj memoris, ke, malgraŭ lia granda boneco, li min enfermis dum ses monatoj en mallarĝa malliberejo, pro unua kulpo: mi estis certega, ke, post skandalo tia, kian devige estis kaŭzinta mia forkuro el Saint-Sulpice, li agos kun mi multe pli severege. Fine tiu konfuzo de pensoj produktis unu ideon, kiu remetis trankvilecon en mian spiriton; kaj mi miris, ke mi ne estis havinta ĝin pli frue. Tio estis, min turni al mia amiko Tiberge, en kiu mi estis certa, ke mi ĉiam retrovos la saman fundamenton de amikeco. Nenio estas pli admirinda kaj pli honoras virton, ol la konfido, kun kiu oni sin turnas al personoj, kies senartifikecon oni perfekte konas. Oni sentas, ke ne estas riskoj minacantaj: se tiuj personoj ne estas ĉiam kapablaj liveri helpadon,

oni estas certa, ke oni almenaŭ ricevos bonecon kaj kompaton. La koro, kiu tiel zorge fermiĝas antaŭ ceteraj homoj, nature malfermiĝas en ilia ĉeesto, kiel floro sub la lumo de suno, de kiu ĝi atendas nur feliĉan influon.

Mi rigardis kiel efikon de la protekto de ĉielo tion, ke mi tiel ĝustatempe memoris pri Tiberge ; kaj mi decidis, ke mi serĉos rimedon por lin vidi antaŭ fino de l'tago. Mi tuj revenis hejmen por skribi al li vorton kaj proponi lokon konvenan por nia interparolado. Mi al li rekomendis silenton kaj diskretecon, kiel unu el la plej gravaj servoj, kiujn li povus fari al mi en la stato de miaj aferoj. La ĝojo, kiun inspiris al mi espero, ke mi lin revidos, formetis postsignojn de ĉagreno, kiujn devige Manon estus ekvidinta sur mia vizaĝo. Mi parolis pri nia malfeliĉo en Chaillot kiel pri bagatelo, kiu ne devis ŝin maltrankviligi : ĉar Parizo estis la loko de la mondo, en kiu ŝi plej plezure sin vidis, ŝi ne estis ĉagrena, aŭdante min dirantan, ke estis oportune loĝi en ĝi, ĝis kiam estos riparitaj en Chaillot kelkaj malgravaj efikoj de la brulado. Post unu horo, mi ricevis la respondon de Tiberge, kiu promesis, ke li aliros al la loko montrita. Mi senpacience al ĝi alkuris. Tamen mi sentis ian honton, min montrante antaŭ la okuloj de amiko, kies sola ĉeesto devis esti riproĉo pro miaj malordoj ; sed la opinio, kiun mi havis pri la boneco de lia koro, kaj la profito de Manon subtenis mian malfortecon.

Mi estis petinta de li, ke li troviĝu en la ĝardeno de Palais-Royal¹. Pli frue ol mi li en ĝi estis. Tuj kiam li min ekvidis, li venis min kisi. Longatempe li tenis min premitan inter siaj brakoj, kaj mi sentis mian vizaĝon malsekigitan de liaj larmoj. Mi diris al li, ke nur

1. Elparolu : *Palais-Royal*.

kun multe da konfuzo mi prezentas min antaŭ lin, kaj ke mi portas en mia koro vivan senton de mia maldankemo ; ke la unua afero, kiun mi de li petegas, estas scii, ĉu estas ankoraŭ permesate al mi lin rigardi kiel amikon, post kiam mi tiel juste meritis perdi lian estimon kaj lian amemon. Li respondis per plej kora tono, ke nenio estas kapabla forlasigi el li tiun titolon, ke miaj malfeliĉoj mem, kaj (ĉu mi permesos, ke li tion diru) miaj kulpoj kaj miaj malordoj pligrandigis lian amemon al mi; sed ke tiu amemo estas miksitita kun la plej viva doloro, tiel kiel oni sentas al karega persono, kiun oni vidas kurantan al ĝia pereco, ne povante ĝin helpadi.

Ni sidiĝis sur benkon.

« Ho ve ! mi diris, kun sopiro, eltirita el fundo de mia koro, via kompato devas esti grandega; mia kara Tiberge, se vi certigas, ke ĝi egalas miajn ĉagrenojn. Mi hontas, ilin vidigante al vi; ĉar mi konfesas, ke la kaŭzo ne estas glora; sed la efiko estas tiel malĝoja, ke ne estas bezone min ami, tiel kiel vi faras, por esti kortuŝita. »

Li petis de mi, ke signe de amikeco mi rakontu sen ia mensogo tion, kio okazis post mia eliro el Saint-Sulpice. Mi lin kontentigis: kaj ne nur mi ne falsis la veron eĉ iomete, ne nur mi ne malpligrandigis miajn kulpojn por ilin opiniigi pli senkulpigeblaj, sed mi parolis pri mia pasio laŭ la tuta fortikeco, kiun ĝi inspiris al mi. Mi ĝin prezentis kiel unu el tiuj frapoj de fatalo, kiu alkroĉiĝas al ruino de mizerulo, kaj el kiu estas tiel neeble al virto sin defendi, kiel estis al prudento ĝin antaŭvidi. Mi faris al li vivan pentraĵon de miaj agitaĵoj, de miaj timoj, de la malespero, en kiu mi estis du horojn antaŭ kiam mi lin vidis, kaj de la malespero en kiu mi refalos, se mi estas forlasita de miaj amikoj tiel senkompate kiel de fortuna; fine mi tiel kortuŝis bonan

Tiberge'on, ke mi vidis lin tiom malĝojan per kompato, kiom mi estis per la sento de miaj ĉagrenoj. Li ne lacigis, min kisante, kaj min admonante, ke mi prenu kuraĝon kaj konsolon : sed, ĉar li ĉiam konjektis, ke unue oni devas min eligi el Manon, mi senkonfuze komprenigis al li, ke tiun eligon mem mi konsideris kiel la plej grandan el miaj malfeliĉaĵoj, kaj ke mi estis preta suferi ne nur la plej ekstreman mizeregecon, sed eĉ la plej kruelan morton, antaŭ kiam mi akceptos kuracilon pli netolereblan ol ĉiujn miajn kuniĝintajn malbonaĵojn.

« Klarigu do viajn dezirojn, li diris : kian specon da helpado mi estas kapabla doni, se vi ribelas kontraŭ ĉiuj miaj proponoj ? »

Mi ne kuraĝis diri, ke nur lian monujon mi bezonis. Fine li komprenis ; kaj konfesinte, ke li kredas min diveni, li restis kelkan tempon ŝanceliĝanta, kun ŝajno de persono, kiu balanciĝas.

« Ne kredu, li baldaŭ rediris, ke mia revado devenas de malvarmiĝo en fervoro kaj en amikeco. Sed al lia alterneco vi min devigas, se estas necese, ke mi rifuzu la solan helpon, kiun vi volas akcepti, aŭ ke mi vundu mian devon, ĝin malrifuzante ? Car ĉu ebligis, ke vi persistos en viaj malordoj, ne estas ilin partopreni ? Tamen, li daŭrigis, pripensante dum unu momento, mi imagas, ke eble la perforta stato, en kiun vin ĵetas malriĉeco, ne lasas al vi sufiĉe da libereco por elekti la plej bonan decidon : oni bezonas trankvilan spiriton por ŝati saĝecon kaj veron. Mi trovos rimedon por havigi al vi kelke da mono. Permesu, mia kara kavaliro, li aldonis min kisante, ke mi almenaŭ postulu unu kondiĉon ; tio estas, ke vi konigos al mi la lokon de via loĝejo, kaj toleros, ke almenaŭ mi penadu por vin rekonduki al virto, kiun vi amas, mi tion scias, kaj el kiu vin formetas nur la perforto de viaj pasioj. »

Mi sincere konsentis ĉion, kion li deziris ; kaj mi petis de li, ke li kompatu pri la krueleco de mia sorto, kiu tiel malbone igis por mi profitaj la konsilojn de tiel virta amiko. Li tuj min kondukis al bankiero konita de li, kiu al mi pruntedonis cent monpistoĵojn, interŝanĝe de lia garantibiletoto: ĉar li ne havis monon tuje disponeblan. Mi jam diris, ke li ne estis riĉa. Lia benefico valoris mil skudojn ; sed, ĉar li ĝin posedis nur de la nuna jaro, li ne ankoraŭ enkasigis la renton : sur la fruktoj estontaj li faris tiun antaŭpagon.

Mi sentis la tutan valoron de lia malavareco. Mi estis tiele kortuŝita, ke mi bedaŭris la blindigon de fatala amo, kiu min devigis malrespekti ĉiujn miajn devojn. La virto havis sufiĉe da forto por kontraŭstari en mia koro, dum kelkaj momentoj, kontraŭ mia pasio : kaj mi almenaŭ ekvidis, en tiu luma momento, la honton kaj la malindecon de miaj katenoj. Sed tiu batalo estis negrava, kaj ne longatempe daŭris. La vidaĵo de Manon min estus rapidiginta el ĉielo : kaj mi miris, min retrovante apud ŝi, ke mi povis akcepti eĉ unu momenton, ke honta estas amemo tiel justa al tiel ĉarmoplena objekto.

Manon estis kreitaĵo havanta eksterordinaran karakteron. Neniam knabino havis pli da malŝato al mono ol ŝi ; sed ŝi ne povis esti trankvila eĉ unu momenton, dum ŝi timis, ke ĝi mankos al ŝi. Nur plezurojn kaj distraĵojn ŝi bezonis. Neniam ŝi estus volinta tuŝi moneron, se ŝi estus povinta sin amuzi, ne elspezante ion. Ŝi ne sin informis, kia estas la fundamento de niaj riĉaĵoj ; sufiĉis, ke ŝi povu agrable pasigi la tagon. Tiamaniere, ĉar ŝi estis nek senmodere pasia al la ludado, nek kapabla fariĝi allogigita de la luksego kaj sekve de grandaj elspezoj, nenio estis pli facila ol ŝin kontentigi, naskigante ĉiutage amuziĵojn laŭ ŝia gusto. Sed esti okupita de

plezuro estis por ŝi afero tiel necesa, ke, se ĝi mankus al ŝi, neniel oni povus konfidi al ŝia karaktero kaj al ŝiaj inklinoj. Kvankam ŝi min kore amis, kvankam mi estis la sola, kaj pri tio ŝi volonte konsentis, kiu povas perfekte sentigi al ŝi la dolĉaĵojn de l'amo, mi estis preskaŭ certa, ke ŝia amemo ne starus senmova kontraŭ iaj timadoj. Ŝi estus preferinta min al la tuta mondo kun malgranda riĉeco; sed mi ne dubis, ke ŝi min forlasos por ia nova B..., se mi havus por doni al ŝi nur konstantecon kaj nur fidelecon. Mi do decidis, ke mi tiel bone reguligos mian propran elspezon, ke mi ĉiam estos kapabla liveri la monon necesan al ŝiaj bezonoj, kaj ke mi senigos min eĉ je necesaj aferoj, prefere al ŝin limigi eĉ pri la malnecesaj. La karoso min timigis pli ol la tuta restaĵo, ĉar ne estis verŝajne, ke mi povu nutri ĉevalojn kaj pagi veturigiston. Mi malkovris mian embarason al sinjoro Lescaut. Mi ne estis kaŝinta, ke mi ricevis cent monpistolojn de amiko. Li ripetis, ke, se mi volus provi hazardon de ludado, li esperis, ke, se mi bonvole elspezus centon da frankoj por regali liajn interligitojn, mi estos akceptita, dank'al lia rekomendo, en la ligo de l'industrio. Kvankam trompi min forte tedegis, mi lasis min fortiri pro kruela neceseco.

Sinjoro Lescaut min prezentis la vesperon mem, kiel unu el liaj parencoj. Li aldonis, ke mi estis des pli deziranta sukcesi, ke mi ju pli bezonis la plej grandajn favorojn de fortuno. Tamen por konigi, ke mia mizero ne estis tiu de malnobela viro, li diris al ili, ke mi intencis doni vespermanĝon. La propono estis akceptita. Mi ilin luksege regalis. Oni longatempe parolis pri la beleteco de mia vizaĝo kaj pri miaj feliĉaj kvalitoj. Oni pretendis, ke mi multe povis esperi pri mi, tial ke, ĉar mi havis en fizionomio ion, kio odoras honestan viron, neniu malfidos pri miaj artifikaĵoj. Fine oni dankis sinjoron

Lescaut, ĉar li havigis al la ordeno novicon tiel meritplenan kiel min ; kaj oni komisiis unu el kavaliroj, por ke, dum kelkaj tagoj, li donu al mi la necesajn instruadojn. La precipa teatro de miaj heroaĵoj devis esti la hotelo de Transilvanujo, en kiu troviĝis tablo por faraono en ĉambro, kaj diversaj aliaj ludejoj por kartoj aŭ ludkuboj en la galerio. Tiu akademio agis por la profito de lia R... 'a princa Moŝto, kiu en tiu tempo loĝis en Clagny¹ : kaj la plimulto da liaj oficiroj apartenis al nia socio. Ĉu mi tion diros, malgraŭ mia honto ? post malmulte da tempo mi profitis la lecionojn de mia majstro. Mi precipe akiris multe da lerteco por fari kartreturnigon kaj por preterlasi la karton ; kaj min helpante per paro da longaj manikoj, mi ĝin malaperigis en ilin sufiĉe lerte, por trompi la plej observemajn okulojn kaj ruinigi sen malnatureco multajn honestajn ludantojn. Tiu eksterordinara lerteco tiel forte rapidigis la progreson de mia riĉeco, ke mi, post kelkaj semajnoj, havis grandegajn monsumojn, krom tiuj, kiujn mi honeste partoprenis kun miaj kunligitoj. Tiam mi ne timis malkovri al Manon nian perdon de Chaillet ; kaj por ŝin konsoli, konigante al ŝi tiun bedaŭrindan novaĵon, mi luprenis meblitan domon, kaj ni nin lokis en ĝin kun ŝajno de riĉeco kaj de senriskeco.

Dum tiu tempo, Tiberge ne forgesis fari al mi oftajn vizitojn. Liaj moralajoj ne finiĝis. Senĉese li rekomencis, montrante la domaĝon, kiun mi faras al mia konscienco, mia honoro kaj mia riĉeco. Mi ricevis liajn admonojn amike ; kaj kvankam mi neniel intencis ilin obei, tamen mi lin gratulis pro lia fervoro, ĉar mi konis ĝian fonton. Kelkafoje mi lin agrable moketis en la ĉe-

1. Elparolu : *Klanji*.

esto de Manon, kaj mi petegis de li, ke li ne estu pli skrupulema ol multaj episkopoj kaj aliaj pastroj, kiuj tre bone scias akordigi amatinon kun beneficio :

« Vidu, mi diris, montrante la okulojn de mia amatino, kaj diru, ĉu ne estas kulpoj senkulpigeblaj de tiel bela motivo. »

Li havis paciencon. Eĉ li ĝin puŝis sufiĉe malproksimen : sed kiam li vidis, ke miaj riĉaĵoj pligrandiĝas, kaj ke, ne nur mi al li redonis liajn cent monpistoilojn, sed ke, lupreninte novan domon kaj duobliginte mian elspezon, mi denove estis min tremponta en plezurojn pli ol iam mi faris, li tute ŝanĝis sian tonon kaj siajn manierojn. Li plendis pro mia konsciencmalmoleco ; li min minacis de punoj de ĉielo, kaj antaŭdiris parton de malfeliĉaĵoj, kiuj alvenis post nelonga tempo.

« Estas neeble, li diris, ke la riĉaĵoj, kiuj al vi utilas por daŭrigi viajn malordojn, estas venintaj per rajtaj vojoj. Vi ilin maljuste akiris : sammaniere ili estos al vi ŝtelitaj. La plej terura puno de Dio estus lasi vin ĝui trankvile de ili. Ĉiuj miaj konsiloj, li aldonis, estis senutilaj : mi do antaŭvidas, ke baldaŭ ili por vi estos trudemaj. Adiaŭ, maldankema kaj malfortema amiko. Povu viaj krimaj plezuroj vaporigi kiel ombro ! Povu via riĉeco kaj via mono senespere pereĵ ! Povu vi resti sola kaj nuda, por senti la vantecon de bonaĵoj, kiuj vin malsaĝe ebriigis. Tiam vi min trovos pretan vin ami kaj vin servi ; sed hodiaŭ mi rompas ĉian rilaton kun vi, kaj mi malamas la vivmanieron, kiu estas la via. »

En mia ĉambro, antaŭ okuloj de Manon, li faris al mi tiun apostolan paroladon. Li sin levis elironte. Mi volis lin deteni ; sed mi estis detenita de Manon, kiu diris, ke li estas freneza, kaj ke mi devas lasi lin eliri.

Tamen lia parolado faris sur mi iom da impresoj. Mi tiel rimarkigas la diversajn okazojn, en kiuj mia

koro sentis revenon al bono, ĉar al tiu memoro mi poste devis parton de mia forto en la plej malfacilaj cirkonstancoj de mia vivo. La karesoj de Manon vaporigis momente la ĉagrenon, kiun kaŭzis al mi tiu sceno. Mi daŭrigis havi vivadon tute faritan de plezuro kaj de amo. La pligrandigo de miaj riĉaĵoj duobligis nian reciprokan amemon. Venuso kaj Fortuno ne havis sklavojn pli feliĉajn kaj pli amoplenajn. Dioj ! kial nomi la mondon loko de mizeraĵoj, kiam oni povas gustumi en ĝi tiel ĉarmajn ĝuadojn. Sed ve ! ilia esenco estas pasi tro rapide. Ĉu oni volus proponi al si alian feliĉecon, se ili havus kiel naturecon ĉiaman daŭradon ? La niaj havis komunan sorton ; tio estas, ili daŭris malmulte, kaj estis sekvitaj de maldolĉegaj bedaŭroj. Mi estis farinta en la ludado grandegajn gajnojn, kaj mi pensis procentĉedoni parton de mia mono. Miaj servistoj konis miajn sukcesojn, precipe mia ĉambristo kaj la ĉambristino de Manon, antaŭ kiuj ni interparolis ofte, ne malfidante. Tiu knabino estis beleta. Mia servisto ŝin amindumis. Ili havis kiel gemastrojn homojn junajn kaj facilajn, kaj ili imagis, ke ili povos ilin trompi facile. Ili intencis tion fari kaj tion plenumis tiel malfeliĉe por ni, ke ili nin metis en staton, el kiu neniam ni povis nin eltiri. /

Ian tagon sinjoro Lescaut donis al ni vespermanĝon : estis proksimume noktomezo, kiam ni revenis hejmen. Mi vokis mian serviston kaj Manon sian servistinon. Oni diris, ke, de la oka, ili ne estis viditaj en la domo, kaj ke ili eliris, transportiginte kelkajn kestojn, por obei ordonojn, kiujn, laŭ ilia diro, ili estis ricevintaj de mi. Mi antaŭsentis parton de la vero, sed mi formis neniujn suspektojn, kiuj ne estis preteriritaj de tio, kion mi ekvidis, kiam mi eniris en mian ĉambron. La seruro de mia tualetejo estis rompita, kaj mia mono formetita kun ĉiuj miaj vestoj. Dum mi pripensis sola pri

tiu akcidento, Manon venis tute timigita sciigi al mi, ke oni faris la saman rabadon en ŝia apartamento. La frapo ŝajnis al mi tiel kruela, ke nur eksterordinara ekpeno malhelpis, ke mi ne min liveru al krioj kaj al ploroj. Sed, timante komuniki al Manon mian malesperon, mi ŝajnigis afekte trankvilan vizaĝon. Mi diris petolante, ke mi min venĝos sur ian moktrompilon en hotelo de Transilvanujo. Tamen ŝi ŝajnis tiel sentema al nia malfeliĉo, ke ŝia malĝojo havis pli da forto por min ĉagreni, ol mia malvera ĝojo enhavis da ĝi por malhelpi ŝian senkuraĝigon.

« Ni estas pereontaj, ŝi diris kun larmoplenaj okuloj. »

Vane mi penis ŝin konsoli per miaj karesoj. Miaj propraj ploroj perfidis mian malesperon kaj mian konserton. Efektive ni estis ruinigitaj tiel absolute, ke restis al ni eĉ neniu ĉemizo.

Mi decidis, ke tuj mi venigos sinjoron Lescaut. Li konsilis, ke mi min turnu senprokraste al liaj policleŭtenanta kaj Pariza ĉefprevota Moŝtoj. Mi iris al ili : sed tio kaŭzis mian plej grandan malfeliĉon : ĉar ne nur miaj klopodoj kaj tiuj, kiujn mi farigis al tiuj du justecaj oficiroj, nenion produktis, sed mi donis al Lescaut la tempon interparoli kun lia fratino, kaj inspiri al ŝi dum mia foresto teruran decidon. Li parolis al ŝi pri sinjoro de G... M..., maljuna voluptemulo, kiu malavarege pagis siajn plezurojn, kaj al ŝi montris tiom da profitoj, se ŝi akceptus lian soldon, ke, konfuzita kiel ŝi estis pro nia malfeliĉaĵo, ŝi partoprenis ĉiujn projektojn, pri kiuj li penis ŝin konvinki. Tiu honorinda vendokontraĵo estis konkludita antaŭ mia reveno, kaj la plenumo prokrastita ĝis la morgaŭa tago, post kiam Lescaut estos avertinta sinjoron de G... M... Mi trovis lin, kiu min atendis hejme ; sed Manon enlitiĝis en sia apartamento, kaj ŝi ordonis al sia lakeo, ke li diru al mi, ke, bezonante

iom da ripozo, ŝi petis de mi, ke mi lasu ŝin sola dum tiu nokto. Lescaut min lasis, proponinte al mi kelkajn monpistoĵojn, kiujn mi akceptis. Estis preskaŭ la kvara matene, kiam mi enlitiĝis ; kaj, ĉar mi en ĝi longatempe pripensis pri la rimedoj necesaj por restarigi mian havaĵon, mi ekdormis tiel malfrue, ke mi povis vekigi nur je la dekunua aŭ dekdua. Mi ellitiĝis rapide por min informi pri la farto de Manon : oni diris, ke ŝi estis elirinta antaŭ unu horo kun ŝia frato, kiu estis veninta ŝin preni en dungita karoso. Kvankam tiu promenado farita kun Lescaut ŝajnis al mi mistera, tamen mi min kontraŭbatalis por haltigi miajn suspektojn. Mi lasis flui kelkajn horojn, kiujn mi pasigis legante. Fine, ĉar mi ne estis plu la estró de mia maltrankvileco, mi promenadis grandpaŝe en niaj apartamentoj. Mi ekvidis en tiu de Manon sigelitan leteron, kiu kuŝis sur la tablo. Adreso estis por mi, kaj la skribado de ŝia mano. Mi ĝin malfermis kun morta tremeto. Ĝi estis redaktita laŭ jenaj terminoj.

« Mi al ci ĵuras, mia kara kavaliro, ke ci estas la
 « idolo de mia koro, kaj ke cin solan en la mondo mi
 « povas ami, laŭ la maniero per kiu mi cin amas. Sed
 « ĉu ci ne vidas, mia kara animo, ke en la stato en kiu
 « ni estas premegataj, fideleco estas malsprita virto. Ĉu
 « ci kredas, ke oni povas esti tre amoplena, kiam pano
 « mankas ? La malsato kaŭzus al mi ian fatalan eraron :
 « iam mi elspirus mian lastan spiron, kredante, ke ĝi
 « estas ama sopiro. Mi cin adoras ; estu certa pri tio :
 « sed lasu al mi por kelke da tempo la mastradon de
 « niaj posedaĵoj. Malfeliĉon al kiu falos en miajn retojn :
 « mi laboras por fari mian kavaliron riĉa kaj feliĉa. Mia
 « frato sciigos al ci novaĵojn pri cia Manon, kaj diros,
 « ke ŝi ploris, cin forlasante. »

Post tiu legado, mi restis en stato, kiun mi malfacile povus priskribi ; ĉar hodiaŭ eĉ mi ne scias ankoraŭ

de kiu speco da sentoj mi estis tiam agitita. Tio estis unu el tiuj situacioj, al kiuj oni neniam sentis ion, kio estas simila : oni ne povus ilin klarigi al aliaj homoj, ĉar ili havas neniun ideon pri tio ; kaj oni tre malfacile povas ilin klarigi al si mem, tial ke, ĉar ili estas solaj en sia speco, tio rilatas kun nenio en la memoro, kaj eĉ ne povas esti komparita kun ia konita sento. Tamen, kia ajn estu la natureco de la miaj, estas certe, ke en ili devis eniri doloro, kolerĉagreno, ĵaluzeco kaj honto. Feliĉa mi estus estinta, se en ili ne estus enirinta pli ankoraŭ da amo ! /

« Si amas min, mi volas tion kredi ; sed ĉu ne estus necese, mi ekkriis, ke ŝi estu monstrino por min malami. Ĉu iu havis iam sur koron de virino rajtojn, kiujn mi ne havas sur la sian ? Kio restas farebla de mi por ŝi, post ĉio, kion mi al ŝi oferis ? Tamen ŝi min forlasas ! Kaj la maldankulino sin kredas ŝirmata kontraŭ miaj riproĉoj, dirante, ke ŝi ne ĉesis min ami. Si timas malsaton ; granda Dio ! kia maldelikateco de sentoj, kaj kiel ĝi malbone respondas al mia delikateco. Mi ne ĝin timis, mi, kiu tiel volonte ĝin riskas por ŝi, forlasante la riĉecon kaj la dolĉecon de la patra domo, mi, kiu senigis min eĉ je necesajoj, por kontentigi ŝiajn malgrandajn humorojn kaj ŝiajn kapricojn. Si min adoras, ŝi diras. Se ci min adorus, maldankema, ci bone sciis de kiu ci estus petinta konsilon, almenaŭ ci ne estus min forlasinta, ne dirinte al mi adiaŭ. Estas mi tiu, kiun oni devas demandi pri la kruelaj ĉagrenoj, kiujn oni sentas, sin disigante el tio, kion oni adoras. Necese estus, ke oni estu perdinta la saĝon, por tion riski volonte. »

Miaj plendoj estis interrompitaj per vizito, kiun mi ne atendis. Ĝi estis la vizito de Lescaut.

« Ekzekutisto, mi diris, metante spadon en mian manon, kie estas Manon ? kion ci faris de ŝi ? »

Tiu ekmovo lin timigis : li respondis, ke se tiama-niere mi lin ricevas, kiam li venis konigi al mi la plej grandan servon, kiun li povis fari, li tuj ekeliros kaj neniam remetos la piedojn en mian hejmon. Mi kuris al la pordo de la ĉambro, kiun mi zorge fermis.

« Ne imagu, mi diris, min turnante al li, ke ci povos ankoraŭ agi kun mi kiel kun moktrompito, kaj min erarigi per fabeloj. Necese estas, ke ci defendu cian vivon, aŭ al mi retrovigu Manon'on. »

Nu, nu, kiel vi estas vivega, li respondis. Tio estas la sola celo de mia vizito. Mi venas anonci al vi feliĉecon, al kiu vi ne pensas, kaj por kiu vi eble rekonos, ke vi ŝuldas al mi iom da dankeco. »

Mi volis esti klarigita tuje. Li rakontis, ke Manon, ne povante toleri timon al mizereco, kaj precipe ideon, ke ŝi estos devigita plimalgrandigi subite sian luksvivadon, petis de li, ke li ŝin rilatigu kun sinjoro de G... M..., kiun la famo diris malavara. Kompreneble li zorge kaŝis, ke tiun konsilon li estis doninta kaj estis preparinta vojon, antaŭ kiam li ŝin kondukos al li.

« Mi ŝin kondukis tiumatene, li daŭrigis ; kaj tiu honesta viro estis tiel ĉarmita de ŝia merito, ke li unue ŝin invitis, ke ŝi kun li sociiĝu en lia kampodomo, en kiun li iris pasigi kelkan tempon. Mi, aldonis Lescaut, kiu tuje divenis la grandan profiton, kiun tio povis enhavi por vi, mi lerte al li komprenigis, ke Manon estis suferinta gravegajn malgajnojn ; kaj mi tiel instigis lian malavarecon, ke komence li faris al ŝi donacon da du cent monpistojoj. Mi diris, ke unue tio estas konvena, sed ke estonteco alkondukos al mia fratino grandajn bezonojn ; ke ŝi cetere devas zorgadi pri juna frato, kiu estas restinta sur niaj brakoj post la morto de niaj gepatroj ; kaj ke se li kredis ŝin inda je sia estimo, li ne lasos ŝin suferi pro tiu kompatinda infano, kiun ŝi

rigardas kiel duonparton de sia estaĵo. Kompreneble tiu rakonto lin kortuŝis. Li promesis, ke li luos oportunan domon por vi kaj por Manon; ĉar estas vi mem tiu kompatinda orfa frateto: laŭ lia promeso li donos al vi meblojn taŭgajn kaj pagos ĉiumonate kvar cent bonajn monfuntojn, kiuj fariĝos, se mi ĝuste kalkulas, kvar mil ok cent frankoj fine de ĉia jaro. Li lasis ordonojn al sia intendanto, antaŭ kiam li aliris al sia kampodomo, ke li serĉu domon, kaj ĝin igu preta, por kiam li revenos. Tiam vi revidos Manon'on, kiu al mi komisiis, ke mi vin kisu milfoje por ŝi, kaj al vi certigu, ke ŝi amas vin pli ol neniam ŝi faris. »

Mi sidiĝis, revante al tiu stranga dispono de mia sorto. Mi troviĝis en divido de sentoj kaj sekve en necerteco tiel malfacile finiĝebla, ke mi longatempe restis ne respondante al multegaj demandoj, kiujn Lescaut faris unuj post aliaj. En tiu momento, honoro kaj virto al mi ankoraŭ sentigis pikojn de konscienciproĉo; kaj mi sopirante ĵetis rigardojn al Amiens, al la domo de mia patro, al Saint-Sulpice, kaj al ĉiuj lokoj, en kiuj mi estis vivinta en senkulpeco. Per kiu grandega interspaco mi estis nun disigita el tiu feliĉa stato? Mi ĝin vidis nur de malproksime, kiel ombron, kiu altiris ankoraŭ miajn rigardojn kaj miajn dezirojn, sed kiu estis tro malforta por eksciti miajn penadojn.

« Per kia fatalo, mi diris, mi estas fariĝinta tiel krima? Amo estas senkulpa pasio: kial do ĝi por mi ŝanĝiĝis en fonton de mizeroj kaj de malordoj? Kiu malhelpis, ke mi vivu trankvile kaj virte kun Manon? Kial mi ne edziĝis kun ŝi, antaŭ kiam mi estus ricevinta ion de ŝia amo? Ĉu mia patro, kiu min amis tiel kore, ne estus konsentinta tion, se mi estus lin peteginta per rajtaj motivoj? Ha! mia patro mem estus ameginta ŝin kiel ĉarmoplenan filinon, tro indan fariĝi edzino de

lia filo ; mi estus feliĉa kun amo de Manon, kun amik-eco de mia patro, kun estimo de honestaj homoj, kun bonaĵoj de riĉeco kaj trankvileco de virto. Pereiga malprospero ! Kia estas la malnoblega persono, kiun oni ekproponas al mi ? Kio ! Mi konsentus partigi...? Sed ĉu mi povas ŝanceliĝi, se Manon tion decidis, kaj se mi perdas ŝin sen tiu komplezo ? — Sinjoro Lescaut, mi ekkriis, fermante okulojn, kvazaŭ mi volus forigi tiel ĉagrenigajn pripensojn, se vi intencis min servi, mi dankas vin. Vi povis uzi pli honestan vojon : sed tio estas afero finita kredeble : do ni pensu nur profiti viajn klopodojn kaj plenumi vian projekton. »

Lescaut, al kiu mia kolero sekvita de longega silentado kaŭzis ian embarason, estis kontentega, vidante, ke mi prenis decidon tute malsimilan al tiu, kiun sendube li timis : li tute ne estis brava, kaj pri tio mi havis plej bonajn pruvojn poste.

« Jes, jes, li rapide respondis : tio estas tre bona servo, kiun mi faris al vi ; kaj vi vidos, ke ni eltiros el ĝi pli da profitoj ol vi esperas. »

Ni interdecidis, per kia maniero mi povus antaŭbatali la malfidojn, kiujn sinjoro de G... M... kredeble eksentos pri mia frateco, vidante min iom pli altkreskan kaj iom pli maljunan, ol eble li imagis. Ni trovis neniun alian rimedon ol preni antaŭ li simplan kaj provincan ŝajnon, kaj al li kredigi, ke, intencante eniri en eklezian profesion, mi ĉiutage iras pro tio en kolegion. Ni decidis ankaŭ, ke mi min vestos tre malbone, la unuan fojon, kiam mi estos permesita al la honoro lin saluti. Li revenis urbon post tri aŭ kvar tagoj. Li kondukis mem Manon'on en la domon, pri kies preparo zorgis lia intendanto. Si tuj avertigis Lescaut'on pri lia reveno ; kaj, ĉar tiu ĉi min sciigis pri tio, ni ambaŭ aliris al ŝia hejmo. Jam la maljuna amanto estis elirinta el ĝi.

Malgraŭ la rezignacio kun kiu mi submetiĝis sub ŝiaj voladoj, mi ne povis, ŝin revidante, silentigi murmurojn de mia koro. Mi ŝajnis al ŝi malgaja kaj maldardanta. La ĝojo sentita pro ŝia retrovo ne tute superis la ĉagrenon pro ŝia malfideleco. Ŝi kontraŭe, min revidante, ŝajnis kontentega pro plezuro. Ŝi riproĉis al mi mian malvarmecon. Mi ne povis malhelpi, ke mi ne preterlasu nomojn « perfidulino » kaj « malfidelulino », kiujn akompanis tiom da sopiroj. Ŝi unue min moketis pri mia simpleco : sed kiam ŝi vidis, ke miaj rigardoj ĉiam malĝoje alligiĝas al ŝi, kaj ke mi ne povas sen grandaj malfacilecoj digesti ŝanĝon tiel kontraŭan al mia humoro kaj al miaj deziroj, ŝi eniris sola en sian tualetejon. Mi ŝin sekvis post momento. Mi ŝin trovis kovrita de ploroj. Mi petis de ŝi, kio ilin kaŭzas.

« Estas al ci tre facile tion vidi, ŝi diris : kiamaniere ci volas, ke mi vivu, se mia vidaĵo estas kapabla okazigi ĉe ci mienon nur malluman kaj ĉagrenan. De unu horo, kiam ci estas tie ĉi, ci faris al mi nenian kareson, kaj ci ricevis la miajn kun majesteco de Granda Turko en lia virinejo.

— Aŭskultu, Manon, mi respondis, ŝin kisante, mi ne povas kaŝi, ke mi havas koron morte malĝojan. Mi ne parolas nun pri la timadoj, en kiujn min ĵetis via ne antaŭvidita forkuro, nek pri la krueleco, kiun vi havis, min forlasante sen unu vorto de konsolo, post kiam vi estis pasiginta nokton en lito alia ol la mia. La ĉarmo de via ĉeesto al mi forgesigus plion. Sed ĉu vi kredas, ke mi povas pensi sen sopiroj kaj eĉ sen larmoj al la malĝoja kaj malfeliĉa vivo, kiun vi volas altrudi al mi en tiu domo ? Mi lasu aparte mian nobel-naskiĝon kaj mian honoron ; tiel malfortaj motivoj ne povas konkurenci amon tian, kia estas la mia : sed ĉu vi imagas, ke tiu amo mem ne ĝemas, vidante, ke ĝi

estas tiel malbone komprenita kaj tiel kruele manumita de maldankema kaj malkompatema amatino. »

Si min interrompis.

« Nu, ŝi diris, kavaliro mia, estas senutile min turmenti per riproĉoj, kiuj traboras mian koron, kiam ili devenas de vi. Mi vidas tion, kio vin vundas. Mi esperis, ke vi konsentos projekton de mi elpensitan por iom restarigi nian riĉecon : por ne kontuzi vian delikatecon, mi komencis ĝian plenumon, ne vin partoprenigante en ĝi : sed, tial ke vi ne ĝin aprobas, mi ĝin forlasos. »

Si aldonis, ke ŝi petas nur iom da komplezo dum la restaĵo de l'tago ; ke ŝi jam ricevis du cent monpistolojn de sia maljuna amanto ; ke li promesis, ke li alportos al ŝi belan kolringon el perloj kaj aliajn juvelojn, kaj plie la duonon de la pensio, kiun li al ŝi promesis.

« Lasu nur al mi tempon necesan, ŝi diris, por ricevi liajn donacojn ; mi ĵuras, ke li ne povos fanfaroni pri profitoj, kiujn mi donis al li sur mia persono, ĉar ĝis nun mi lin prokrastis, ĝis kiam li estos reveninta urben. Estas vere, ke li kisadis miajn manojn pli ol unu milionon da fojoj : estas juste, ke li pagu tiun plezuron ; kaj ne estas troo kvin aŭ ses mil frankoj, se ni proporcias la prezon kun liaj riĉaĵoj kaj lia aĝo. »

Sia decido estis por mi multe pli agrabla, ol espero al kvin mil frankoj. Mi havis okazon rekoni, ke mia koro ne estis ankoraŭ perdinta ĉian senton al honoro, tial ke ĝi estis tiel kontenta foriri for de malnobleco. Sed mi estis markita por mallongaj ĝojoj kaj longaj doloroj. Fortuno min liberigis el profundegaĵo, nur por min faligi en alian. Kiam mi estis montrinta al Manon per mil karesoj, kiom mi min kredis feliĉa pro ŝia ŝanĝiĝo, mi diris, ke nun necese estas, ke mi informu pri tio sinjoron Lescaut, por ke niaj mezuroj estu prenitaj akorde. Li unue murmuris ; sed la kvar aŭ kvin mil monfuntoj

tuje pagotaj lin ĝoje enirigis en niajn vidmanierojn. Do estis konsentite, ke ni ĉiuj troviĝos ĉe vespermanĝo kun sinjoro de G... M..., kaj tio por du motivoj : la unua, por doni al ni plezuron de agrabla sceno, dum mi kredigos min lernanto, frato de Manon ; la dua, por malhelpi, ke tiu maljuna malĉastulo agu kun mia amatino tro senĝene, pro rajto, kiun li kredis esti akirinta, paginte antaŭtempe tiel malavare. Ni devis eliri, Lescaut kaj mi, kiam li supreniros al la ĉambro, en kiu li esperis pasigi nokton ; kaj Manon, anstataŭ lin sekvi, promesis, ke ŝi foriros kaj venos ĝin pasigi kun mi. Lescaut prenis sur sin la klopodon havi akurate karoson ĉe la pordo.

Kiam alvenis horo por vespermanĝo, sinjoro de G... M... ne sin atendigis longatempe. Lescaut estis kun sia fratino en la manĝoĉambro. La unua komplimento de l'maljunulo estis prezenti al lia belulino kolringon, brakringojn kaj orelbukojn, kiuj almenaŭ valoris mil skudojn. Poste li kalkulis per belaj luidoroj la sumon da du mil kvar cent monfuntoj, kiuj faris la duonon de ŝia pensio. Li spicis lian donacon per multe da dolĉaĵoj, laŭ gusto de la malnova kortego. Manon ne povis rifuzi al li kelkajn kisojn : ili estis tiom da rajtoj, kiujn ŝi akiris pri la mono, kiun li metis en ŝiajn manojn. Mi estis malantaŭ la pordo, kie mi streĉis orelon, atendente, ke Lescaut min avertos, ke mi povas eniri.

Li venis kaj min prenis per la mano, kiam Manon estis enpoŝiginta monon kaj juvelojn : min kondukinte al sinjoro de G... M..., li al mi ordonis fari riverencon. Mi faris du aŭ tri tre profundajn

« Senkulpigu lin, sinjoro, li diris ; li estas infano tute nova. Kiel vi vidas, li tre malproksimiĝas el Parizaj manieroj ; sed ni esperas, ke iom da uzado lin pli perfektigos. Vi havos honoron ofte vidi la sinjoron, li aldonis, sin turnante al mi ; zorgu profiti bonan modelon. »

La maljuna amanto ŝajnis trovi plezuron en mia vidado. Li donis al mi du aŭ tri batetojn sur la vango, dirante, ke mi estas beleta knabo, sed ke mi devas min gardi en Parizo, kie junuloj facile sin lasas iri al diboĉo. Lescaut certigis, ke mi estas nature tiel saĝa, ke mi nur parolis fariĝi pastro, kaj ke mia sola plezuro estis fari malgrandajn kapelojn.

« Mi trovas ĉe li la ŝajnon de Manon, respondis la maljunulo, altigante mian mentonon per sia mano. »

Mi respondis per malsprita mieno :

« Sinjoro, tio okazas, tial ke niaj ambaŭ karnoj sin tuŝas tre proksime ; pro tio mi amas mian fratinn Manon'on, kvazaŭ ŝi estus alia mi mem.

— Ĉu vi lin aŭdas ? li diris al Lescaut. Li havas spritecon. Estas domaĝe, ke tiu infano ne konas kutimojn de bonsocietaj homoj.

— Ho ! sinjoro, mi respondis, multe da homoj mi vidis ĉe mia lando en preĝejoj : kaj mi kredas, ke mi trovos en Parizo kelkajn aliajn pli malspritajn ol mi.

— Vidu, li aldonis ; tio estas admirinda por provinca infano. »

Dum vespermanĝo, nia tuta interparolo estis proksimume samspeca. Manon, kiu estis malserioza, pli ol unu fojon preskaŭ ĉion difektis per siaj ridegadoj. Mi trovis okazon vespermanĝante rakonti al li lian propran historion, kaj la malbonan sorton, kiu lin minacas. Lescaut kaj Manon tremis dum mia rakonto, precipe kiam mi faris lian portreton laŭ naturaj trajtoj ; sed memestimo malhelpis, ke li sin rekonu ; kaj mi finis ĝin tiel lerte, ke li unua ĝin trovis tute ridinda. Vi vidus, ke ne sen motivoj mi longe rakontis tiun ridindan scenon. Fine, ĉar horo por dormi alvenis, li senpacience parolis pri amo. Ni foriris, Lescaut kaj mi. Oni lin kondukis al sia ĉambro : kaj Manon, kiu estis elirinta pro ia preteksto,

venis nin trovi ĉe la pordo. La karoso, kiu nin atendis antaŭ la tria aŭ kvara domo malsupera, antaŭeniris por nin ricevi. Post unu momento, ni estis foririntaj for de la kvartalo.

Kvankam laŭ mia opinio tia ago estis vera friponaĵo, tamen ĝi ne estis la pli maljusta, kiun mi devis riproĉi al mi. Mi havis pli da konsciencduboj pri la mono akirita de ludado. Tamen ni ne profitis pli da unu ol da alia : kaj ĉielo permesis, ke la plej malgrava el tiuj maljustaĵoj estu la plej severe punita.

Sinjoro de G... M... post tempo mallonga ekvidis, ke li estis moktrompita. Mi ne scias, ĉu li faris de la vespero mem kelkajn klopodojn por nin malkovri, sed li havis sufiĉe da influo, por ke ili ne estu longatempe senutilaj, kaj ni sufiĉe de nesingardemo por tro konfidi al la vasteco de Parizo kaj al la malproksimeco ekzistanta inter nia kvartalo kaj la lia. Ne nur li estis informita pri nia loĝejo kaj pri niaj nunaj aferoj, sed li sciis ankaŭ, kia mi estas, la vivmanieron de mi plenumitan en Parizo, la malnovan kunligon de Manon kun B..., la trompon al li faritan de ŝi, unuvorte ĉiujn skandalajn partojn de nia historio. Pro tio li decidis, ke li nin arestigos, kaj ke li agos kun ni malpli, kiel oni agas kun krimuloj ol kun malĉasteguloj. Ni estis ankoraŭ en lito, kiam policano eniris en nian ĉambron kun duondekduo da gardistoj. Unue ili ekkaptis nian monon aŭ prefere la monon de sinjoro de G... M... ; kaj, nin tuje ellitiginte, ili nin kondukis al la pordo, ĉe kiu ni trovis du karosojn, en unu el kiuj la kompatinda Manon estis metita sen ia klarigo, dum oni min trenis en la alia al Saint-Lazare ¹. Necese estas esti suferinta tiajn malprosperojn por juĝi

1. Elparolu : *Sin-Lazar'*.

malesperojn, kiujn ili povas okazigi. Niaj gardistoj havis kruelecon ne permesi, ke mi kisu Manon'on kaj diru al ŝi ian parolon. Longatempe mi ne sciis, kio ŝi fariĝis. Sendube estis por mi feliĉe, ke mi ne tion konis unue ; ĉar tiel terura katastrofo estus perdiginta al mi konsciencon kaj eble vivon.

Mia malfeliĉa amatino estis do formetita for de miaj okuloj kaj alkondukita en rifuĝejon, kiun mi abomenas nomi. Kia sorto por kreitaĵo tute ĉarma, kiu estus okupinta la unuan tronon de l'mondo, se ĉiuj homoj estus havintaj miajn okulojn kaj mian koron ! Oni ne agis kun ŝi barbare, sed ŝi estis enfermita en mallarĝan malliberejon, sola, kondamnita plenumi ĉiutage ian taskon da laboro, kiel kondiĉo necesa por ricevi naŭzigan nutraĵon. Mi eksciis tiujn detalojn nur longatempe poste, kiam mi mem estis suferinta, dum multaj monatoj, malmolan kaj tedigan punadon. Miaj gardistoj min same ne avertis pri la loko, en kiun ili estis ordinitaj min konduki : mi konis mian fatalon nur antaŭ la pordo de Saint-Lazare. En tiu momento, mi estus preferinta morton al stato, en kiun mi kredis, ke mi estis ekfalonta. Mi havis terurajn ideojn pri tiu domo. Mia teruro pligrandiĝis, kiam enirante gardistoj vizitis por la dua fojo miajn poŝojn, por certiĝi, ke restas al mi nek armiloj nek defendrimedoj. La superulo aperis tuje ; li estis sciigita pri mia alveno. Li min salutis kun multe da dolĉeco.

« Mia Patro, mi diris, neniajn indignaĵojn. Mi perdos mil vivojn, antaŭ kiam mi toleros unu insulton.

— Ne, ne, sinjoro, li respondis : vi prenos pli saĝan konduton ; kaj ni estos kontentaj unu de la alia. »

Li petis de mi, ke mi supreniru en altan ĉambron. Mi lin sekvis, ne kontraŭbatalante. Pafarkistoj nin akompanis ĝis la pordo ; kaj la superulo, enirinte en ĝin kun mi, faris signon, ke ili eliru.

« Mi do estas via malliberigato, mi diris. Nu, mia Patro, kion vi intencas fari de mi ? »

Li diris, ke li estas ĉarmita, vidante, ke mi prenas prudentan tonon ; ke lia devo estas laboradi por inspiri al mi inklinon al virto kaj al religio, kaj la mia profiti liajn admonojn kaj liajn konsilojn : se mi volas respondi al amikaĵoj, kiujn li havos por mi, mi trovos nur plezuron en mia solecejo.

« Ha ! plezuron ! mi respondis : vi ne konas, mia Patro, la unikan aferon, kiu estas kapabla ĝin sentigi al mi.

— Mi ĝin konas, li daŭrigis : sed mi esperas, ke via inklino ŝanĝiĝos. »

Lia respondo al mi komprenigis, ke li estas informita pri miaj aventuroj kaj eble pri mia nomo. Mi petis de li, ke li tion al mi klarigu. Kompreneble li diris, ke oni lin instruis pri ĉio.

Tiu kono estis la plej kruela el ĉiuj miaj punoj. Mi ekverŝis rivereton da larmoj kun ĉiuj atestoj de vastegea malespero. Mi ne povis min konsoli pri humiligo, kiu ekfaros min fabelo de ĉiuj de mi konitaj personoj, kaj honto por mia familio. Mi pasigis tiamaniere ok tagojn en la plej profunda senkuraĝiĝo, ne estante kapabla ion aŭdi kaj prizorgi pri io alia ol pri mia honto. Eĉ la memoro al Manon aldonis nenion al mia doloro. Ĝi prefere eniris en ĝin nur kiel sento, kiu estis antaŭirinta tiun ĉagrenon ; kaj la pasio superanta en mia animo estis honto kaj konfuzo. Malmultaj estas personoj, kiuj konas la forton de tiuj sentoj de l'koro. Plimulto da homoj estas sentemaj nur al kvin aŭ ses pasioj, en kies rondo pasadas ilia vivado, kaj en kiujn solviĝas ĉiuj agitaĵoj. Eligu el ili amon kaj malamon, plezuron kaj doloron, esperon kaj timon, ili ne sentos plu ion. Sed personoj, kiuj havas pli noblan karakteron, povas esti

agititaj de mil diversaj manieroj : ŝajnas, ke ili havas pli ol kvin sentojn, kaj ke ili povas ricevi ideojn kaj sentadojn, kiuj preteriras ordinarajn limojn de naturo . Kaj tial ke ili havas senton de tiu grandeco, kiu ilin superigas super vulgaruloj, nenio estas pri kio ili estas pli ĵaluzemaj. De tio devenas, ke ili suferas tiel malpacience malŝaton kaj mokadojn ; kaj honto estas unu el iliaj plej perfortaj agitecoj.

Mi havis en Saint-Lazare tiun malgajan superecon. Mia malĝojeco ŝajnis tiel fortega al la superulo, ke, timante ĝiajn sekvojn, li opiniis, ke li devas agi kun mi dolĉe kaj indulge. Li min vizitis du aŭ tri fojojn en la tago. Ofte li prenis min kun si por promenadi en la ĝardeno ; kaj lia fervoro laciĝis en admonoj kaj savigaj konsiloj. Mi ilin ricevis kun dolĉeco. Mi eĉ montris al li dankecon. El tio li eltiris esperon por mia konvertiĝo.

« Vi havas naturecon tiel dolĉan kaj tiel amindan, li diris ian tagon, ke mi ne povas kompreni la malordojn, pri kiuj oni vin kulpigas. Du aferoj min mirigas : unue, kiamaniere kun tiel bonaj kvalitoj vi povis vin liveri al troeco de malĉasteco ; due, (kaj tion mi pli ankoraŭ admiras) kiamaniere vi ricevas tiel volonte miajn konsilojn kaj miajn instruadojn, vivinte kelkajn jarojn en kutimoj de malordo. Se tio estas pento, vi estas signalinda ekzemplo de ĉielaj kompatoj ; se tio estas natura boneco, vi almenaŭ havas bonegan fundamenton de karaktero, kiu al mi esperigas, ke ni ne bezonos vin longatempe deteni ĉi tie, por vin rekonduki al ordigita kaj honesta vivo. »

Mi estis kontentega, vidante, ke li havas pri mi tian opinion. Mi decidis, ke mi ĝin pligrandigos per konduto, kiu povos lin plene kontentigi, konvinkite, ke tio estas la plej certa rimedo por malplidaŭrigi mian malli-

berecon. Mi petis de li librojn. Li miris, ke, ĉar li lasis al mi elekton pri tiuj, kiujn mi volis legi, mi min turnis al kelkaj seriozaj verkistoj. Mi ŝajnis fervoron kaj plej grandan atentadon al la studado ; kaj tiamniere mi donis al li en ĉiuj okazoj pruvojn de la ŝanĝiĝo, kiun li deziris.

Tamen ĝi estis nur ekstera. Mi tion konfesas, hontante ; mi ludis en Saint-Lazare rolon de hipokritulo. Kiam mi estis sola, mi min okupis nur pri ĝemadoj pri mia fatalo. Mi malbenis mian malliberejon, kaj la tiranecon, kiu min en ĝi detenis. Tuj kiam mi estis elirinta el tiu malkuraĝiga subpremejo, en kiun honto min estis ĵetinta, mi refalis en turmentojn de amo. Foresto de Manon, malcerteco pri ŝia sorto, timo ke mi neniam ŝin revidos, estis la sola objekto de miaj malgajaj meditadoj. Mi ŝin vidis image en brakoj de sinjoro de G... M..., ĉar tio estis la penso, kiun mi havis unue : kaj ne nur mi ne imagis, ke li estis aginta kun ŝi sammaniere kiel kun mi, sed mi estis konvinkita, ke li min forigis, nur por povi pli trankvile ŝin posedi. Tiele mi pasigis tagojn kaj noktojn, kies longeco ŝajnis al mi eterna. Mi havis esperon nur en la sukceso de mia hipokriteco. Mi zorge observis vizaĝon kaj paroladojn de la superulo, por diveni kion li pensis pri mi : kaj mi atentegis plaĉi al li, kiel al arbitrulo de mia fatalo. Estis facile rekoni, ke min li tute ŝategis. Mi ne dubis plu, ke li estis preta fari al mi servon. Ian tagon, mi estis sufiĉe maltima por peti de li, ĉu mia liberigo dependas de lia bonvolo. Li respondis, ke li ne estas tute estro ; sed li esperas, ke, aŭdinte lian ateston, sinjoro de G... M..., pro kies postulo lia polica generaleŭtenanta Moŝto min enfermigis, konsentos redoni al mi liberecon.

« Ĉu mi povas esperi, mi dolĉe daŭrigis, ke dumonata malliberigado jam tolerita ŝajnos al li sufiĉa puno ? »

Li promesis, ke li parolos al li pri tio, se mi tion deziras. Mi lin kore petegis, ke li faru al mi tiun bonan servon. Post du tagoj, li al mi sciigis, ke G... M... estis tiel kortuŝita pri bonaĵoj aŭditaj pri mi, ke ne nur kred-eble li intencis min redoni al lumo, sed plie li montris grandan deziron min koni pli speciale, kaj decidis, ke li min vizitos en mia malliberejo. Kvankam lia ĉeesto ne povis esti agrabla al mi, tamen mi ĝin rigardis kiel proksiman alpaŝon al mia liberigo.

Efektive li venis al Saint-Lazare. Mi trovis en li ŝajnon pli gravan kaj malpli malspritan ol tiun, kiun li havis en la domo de Manon : li al mi faris prudentajn paroladojn pri mia malbona konduto : li aldonis, kred-eble por justigi siajn proprajn malordojn, ke estas permesite al malforteco de homoj doni al si kelkajn plezurojn, kiujn postulas naturo, sed ke friponeco kaj hontindaj artifikajoj meritas punon. Mi lin aŭskultis kun mieno de submetiĝo, kiu ŝajne lin kontentigis. Mi eĉ ne estis ofendita, lin aŭdinte ellasi kelkajn moketojn pri mia frateco kun Lescaut kaj Manon, kaj pri malgrandaj kapeloj, kiujn, laŭ lia konjekto, li diris, mi devis tari mult-nombre en Saint-Lazare, tial ke mi trovis tiel grandan plezuron en tiu pia okupado. Sed bedaŭrinde por li kaj por mi mem li preterlasis kelkajn parolojn, dirante, ke kredeble Manon estis farinta siaflanke tre beletajn preĝ-ejetojn en Hospitalo. Malgraŭ tremetoj, kiujn al mi kaŭzis tiu nomo Hospitalo, mi havis sufiĉe da potenco por peti de li dolĉe, ke li klarigu siajn dirojn.

« He ! jes, li daŭrigis, de du monatoj ŝi lernas saĝecon en ĝenerala Hospitalo ; kaj mi deziras, ke ŝi estu eltirinta el ĝi tiom da profitoj kiom vi. »

Kiam mi estus havinta eternan malliberejon aŭ eĉ morton antaŭestantan antaŭ miaj okuloj, mi ne estus estinta estro de mia kolerego, aŭdinte tiun teruran nov-

aĵon. Mi min ĵetis sur lin kun tiel furioza rabio, ke mi perdis duonon da miaj fortoj. Tamen mi havis sufiĉe da ili por lin renversi teren kaj lin preni al la gorĝo. Mi lin sufokis, kiam bruo de lia falo kaj kelkaj akraj kriadoj, kiujn mi apenaŭ lasis al li liberecon puŝi, altiris en mian ĉambron la superulon kaj kelkajn monaĥojn. Oni lin liberigis el miaj manoj. Mi mem estis preskaŭ perdinta forton kaj spiron.

« Ho dio ! mi ekkriis, puŝante mil sopirojn ; justeco de ĉielo ! ĉu estas eble, ke mi vivas eĉ momenton post tia malnoblaĵo ! »

Mi volis denove min ĵeti sur la barbarulon, kiu min ekmortigis. Oni min haltigis. Mia malespero, miaj krioj, miaj larmoj preteriris ĉion imageblan. Mi faris aferojn tiel strangajn, ke ĉiuj ĉeestantoj, kiuj nesciis la motivon, rigardis reciproke unu la alian, kun tiom da timo kiom da miro. Dume sinjoro de G... M... reordigis sian perukon kaj sian kravaton ; kaj ĉagrenkolera, ĉar li estis tiel ofendegita, li ordonis al la superulo, ke li min premu pli mallarĝe ol li faris ĝis nun, kaj min punu per ĉiuj punrimedoj, kiujn li sciis esti uzataj en Saint-Lazare.

« Ne, sinjoro, diris al li la superulo, ne kun persono nobelnaskita kia lia kavalira Moŝto mi agos tia maniere. Cetere li estas tiel dolĉa kaj tiel honesta, ke mi malfacile komprenas, ke li estus aginta per tia perforteco, se li ne estus havinta potencajn motivojn. »

Tiu respondo tute konfuzis sinjoron de G... M... Li eliris, dirante, ke li scios faldigi kaj la superulon kaj min mem kaj ĉiujn, kiuj kuraĝos lin kontraŭbatali.

Ordoninte al siaj monaĥoj, ke ili lin rekonduku, la superulo restis sola kun mi. Li min petegis, ke mi al li rapide sciigu kaŭzon de tiu malordo.

« Ho ! mia Patro, mi diris, daŭrigante plori kiel infano, figuru al vi la plej teruran kruelecon, imagu la

plej abomenan el ĉiuj barbaraĵoj ; jen estas ago, kiun malnobla G... M... havis malkuraĝecon fari. Ha ! li traboris mian koron. Neniam mi resaniĝos. Mi volas ĉion rakonti al vi, mi aldonis ploregante. Vi estas bona ; vi min kompatos. »

Mi resumis en mallonga rakonto la longan kaj nevenkeblan pasion, kiun mi sentis al Manon : mi parolis pri la stato tre ŝatinda de mia riĉeco, antaŭ kiam ni estis rabitaj de niaj propraj servistoj ; pri proponoj, kiujn G... M... estis farinta al mia amatino ; pri konkludo de ilia vendokontrakto kaj pri maniero per kiu ĝi estis rompita. Por diri veron, mi prezentis la aferojn laŭ flanko plej favora al ni.

« Jen estas, mi daŭrigis, de kia fonto devenas la fervoro de sinjoro de G... M... por mia konvertiĝo. Li havis sufiĉe da influo por min enfermigi ĉi tien per sola motivo de venĝo. Mi tion pardonas al li : sed, mia Patro, tio ne estas ĉio : li kruele formetigis la plej karan duonparton de mia estaĵo ; li honte ŝin metigis en Hospitalon ; li havis senhontecon tion anonci al mi mem, per sia propa buŝo. En Hospitalo ! mia Patro. Ho ĉielo ! mia ĉarmoplana amatino, mia kara reĝino, en Hospitalon ! kiel la plej malnoblega el ĉiuj kreitaĵoj ! En kio mi trovos sufiĉe da forteco por ne morti per doloro kaj per honto ? »

La bona Patro, min vidante en tiu troeco da ĉagreno, entreprenis min konsoli. Li diris, ke li neniam estis kompreninta mian aventuron laŭ la maniero per kiu mi ĝin rakontis ; ke vere li sciis, ke mi vivis en malordo, sed li sin figuris, ke tio, kio devigis sinjoron de G... M... interesiĝi je tiu afero, estis ia kunligo de estimo kaj de amikeco kun mia familio ; ke li parolis kun li pri tiu temo nur laŭ tiaj motivoj ; ke tio, kion mi al li eksciigis, metis en miajn aferojn grandajn ŝanĝojn ; kaj ke li ne dubis, ke la fidela rakonto, kiun li intencis fari

al lia polica generaleŭtenanta Moŝto multe kunlaboros por min liberigi. Poste li petis de mi, kial mi ne ankoraŭ pensis doni novaĵojn pri mi al mia familio, ĉar ĝi ne partoprenis mian malliberigon. Mi respondis al tiu pripenso per kelkaj motivoj ĉerpitaj el doloro, kiun mi timis okazigi al mia patro, kaj el honto, kiun mi estus sentinta mem. Fine li promesis, ke senprokraste li iros al polica leŭtenanto.

« Kiam eĉ, li aldonis, mia vizito havus nur kiel celon malhelpi, ke sinjoro de G... M... faru kelkajn malbonaĵojn : ĉar li eliris el tiu domo tre malkontenta, kaj li estas sufiĉe potenca por sin timigi. »

Mi atendis la revenon de l'Patro kun ĉiuj agitaĵoj de malfeliĉulo, kiu alproksimiĝas al momento de l'sentenco. Estis por mi neesprimebla turmentego al mi reprezenti Manon'on en Hospitalo. Krom la malnobleco de tiu loĝejo, mi ne sciis kiamaniere oni en ĝi agis kun ŝi ; kaj la memoro de kelkaj specialaĵoj, kiujn mi estis aŭdinta pri tiu abomeninda domo, ĉiumomente renovigis miajn kolerojn. Mi estis tiel decidinta ŝin helpadi, kiaj ajn estus prezo kaj rimedoj, ke mi estus metinta fajron en Saint-Lazare, se al mi estus estinta neeble eliri el ĝi alimaniere. Mi do pripensis pri vojoj uzotaj de mi, se okaze la polica generaleŭtenanto min detenus en ĝi malgraŭ mia volo. Mi provis iujn ecojn de mia industrio ; mi trairis ĉiujn eblaĵojn. Mi vidis nenion, kio povas min certigi pri certa forkuro, kaj mi timis, ke mi estos pli mallarĝe enfermita, se mi farus malfeliĉan ekprovon. Fine mi kredis, ke mi estis forminta planon tiel lertan, ke ĝi povos sukcesi, kaj mi atendis por ĝin aranĝi ankoraŭ pli bone, ke la supera Patro estu reveninta, se la senutil-eco de lia klopodo ĝin igos necesa. Li ne prokrastis reveni. Mi ne vidis sur lia vizaĝo la signojn de ĝojo, kiuj akompanas bonan novaĵon.

« Mi parolis, li diris, kun lia polica generaleŭtenanta Moŝto, sed mi parolis kun li tro malfrue. Sinjoro de G... M... jam lin vizitis, elirante el tiu domo, kaj li tiel kontraŭjuĝis kontraŭ vi, ke li estis preta sendi al mi novajn ordonojn, por vin pli mallarĝe ankoraŭ malliberigi. Tamen kiam mi estis sciiginta lin pri la fundo de viaj aferoj, li ŝajnis multe malseverigi, kaj, iom ridante pri malĉasteco de la maljuna sinjoro de G... M..., li diris, ke necese estas, ke oni lasu vin ĉi tie dum ses monatoj por lin kontentigi, des pli, li aldonis, ke tiu loĝejo ne povas esti al vi senutila. Li rekomendis, ke mi agu kun vi malsevere ; kaj mi certigas, ke vi ne plendos pri miaj agmanieroj. »

Tiu klarigo de bona superulo estis sufiĉe longa, por ke mi havu tempon sufiĉan por fari saĝan pripenson. Mi komprenis, ke mi riskas renversi miajn projektojn, se mi montros tro da fervoro al mia libereco. Kontraŭe mi al li certigis, ke, ĉar neceseco min devigas resti, estas por mi dolĉa konsolo havi ian parton de lia estimo. Poste ne afektante mi petis de li, ke li donu al mi favoron, kiu havus por iu ajn nenian gravecon, sed kiu multe utilis mian trankvilecon : tio estis avertigi unu el miaj amikoj, sanktan ekleziulon, loĝantan en Saint-Sulpice, ke mi estas en Saint-Lazare, kaj permesi, ke mi ricevu kelkafoje lian viziton. Tiu favoro estis donita sen ŝanceliĝo. Estis mia amiko Tiberge tiu, pri kiu mi volis paroli. Certe mi ne esperis ricevi de li helpon necesan al mia liberigo ; sed mi volis lin utiligi kiel ilon malproksiman, je kiu li ne suspektus eĉ ekziston. Unuvorte, jen estas mia projekto : mi volis skribi al Lescaut kaj komisi lin kaj siajn komunajn amikojn pri zorgo min liberigi. Unua malfacileco estis havigi al li mian leteron ; tia devis esti ofico de Tiberge. Tamen, ĉar li konis lin kiel fraton de mia amatino, mi timis, ke li malfacile konsentos ak-

cepti tian komision. Mia projekto estis enfermi la leteron al Lescaut en alian leteron, kiun mi devis adresi al honesta homo de mi konita, petante de li, ke li rapide sendu la unuan al ĝia adresito ; kaj, ĉar necese estis, ke mi vidu Lescaut'on por min akordigi en niaj mezuroj, mi volis skribi al li, ke li venu al Saint-Lazare kaj petu por min viziti, prenante la nomon de mia maljuna frato, kiu speciale estis veninta Parizon por sin informi pri miaj aferoj. Mi ne diris plion, konsiliĝonte kun li pri rimedoj, kiuj ŝajnus al ni plej certaj. La supera Patro avertigis Tiberge'on pri la deziro, kiun mi havis interparoli kun li. Tiu fidela amiko ne min tiel vidperdis, ke li ne sciis mian aventuron : li sciis, ke mi estas en Saint-Lazare ; kaj eble li ne estis malkontenta pro tiu malfavoro, kiun li kredis inda min revenigi al devo. Li tuj alkuris al mia ĉambro.

Nia interparolo estis amikecoplana. Li volis esti informita pri miaj disponoj. Mi malfermis al li mian koron sen malkaŝoj, escepte pri mia projekto al forkuro. /

« Kara amiko, mi ne volas antaŭ viaj okuloj ŝajni tio, kio mi ne estas. Se vi kredis trovi ĉi tie amikon saĝan kaj ordigitan en liaj deziroj, malĉastulon vekitan de punoj de ĉielo, unuvorte koron liberigitan el amo kaj ne plu ensorĉitan de ĉarmoĵ de sia Manon, vi juĝis tro favore pri mi. Vi min revidas tian, kian vi min lasis antaŭ kvar monatoj, ĉiam ameman kaj ĉiam malfeliĉan per tiu fatala amo, en kiu mi ne laciĝas serĉi mian feliĉecon. »

Li respondis, ke la konfeso, kiun mi faras, igas min ne senkulpigebla ; ke ofte oni vidas pekulojn, kiuj tiele ebriiĝas per falsa feliĉeco de malvirto, ke ili ĝin malkaŝe preferas al tiu de virto : sed almenaŭ ili sin alligas al figuroj de feliĉeco, kaj estas trompitaĵ de ŝajno : sed rekoni, kiel mi faras, ke la objekto de miaj alligitecoj

estas kapabla nur min igi kulpa kaj malfeliĉa, kaj daŭrigi mian volan rapidigadon en malfeliĉon kaj krimon, estas kontraŭdiro de ideoj kaj de konduto, kiu ne faras honoron al mia prudento.

« Tiberge, mi respondis, kiel estas facile venki, kiam oni kontraŭmetas nenion kontraŭ viaj armiloj. Lasu min rezoni miavice. Ĉu vi povas pretendi, ke tio, kion vi nomas feliĉeco de virto, estas senigita je ĉagrenoj, je bariloj kaj je maltrankvilaĵoj? Kian nomon vi donos al malliberejo, al krucoj, al turmentegoj kaj kruelaĵoj de tiranoj? Ĉu vi diros, kiel faras mistikuloj, ke tio, kio turmentas korpon, estas feliĉeco por animo? Vi ne kuraĝos tion diri, ĉar tio estas nesubtenebla paradokso. Tiu feliĉeco, kiun vi tiel altigas, estas do miksitita kun miloj da suferoj; aŭ, por paroli pli ĝuste, ĝi estas nur teksaĵo de malfeliĉaĵoj, tra kiuj oni celas al feliĉeco. Sed se forto de imago trovigas plezuron en tiuj malbonaĵoj mem, ĉar ili povas konduki al feliĉa celo, kiun oni esperas, kial vi nomas kontraŭdira kaj malsaĝa en mia konduto disponon tute similan? Mi amas Manon'on: mi celas tra mil doloroj vivon feliĉan kaj trankvilan apud ŝi. La vojo, sur kiu mi marŝas, estas malfeliĉa; sed espero, ke mi alvenos al mia celo, ĉiam verŝas sur ĝin iom da dolĉeco; kaj mi, per momento pasigita apud ŝi, kredos min tro bone pagita de ĉiuj ĉagrenoj, kiujn mi suferas por ŝin ricevi. Do ambaŭ aferoj ŝajnas al mi egalaj, ĉu de via flanko, ĉu de la mia: aŭ, se estas ia diferenco, ĝi estas ankoraŭ por mia profito; ĉar la feliĉeco, kiun mi esperas, estas proksima, sed la alia, malproksima: la mia havas naturecon de sentaĵoj; mi volas diri: ĝi estas sentebla de korpo, dum la alia havas naturecon nekonitan, kiu estas certigita nur per kredo. »

Tiberge ŝajnis terurita de tiu rezono. Li reeniris du paŝojn, dirante per plej serioza mieno, ke ne nur tio,

kion mi ekdiris, vundas komunan prudenton, sed plie estas bedaŭrinda sofismo plena je malpieco kaj malreligieco.

« Ĉar, li aldonis, kompari la celon de viaj suferoj kun la celo, kiu estas proponita de religio, estas ideo tute malĉastega kaj treege monstra.

— Mi konfesas, mi daŭrigis, ke ĝi ne estas ĝusta : sed atentu ; ne sur ĝin ripozas mia rezono. Mi intencis klarigi tion, kion vi opinias kontraŭdiro en la persisteco de malfeliĉa amo : kaj mi kredas, ke mi tre bone pruvis, ke se ĝi estas tia, vi ne povas vin savi el ĝi pli bone ol mi. Nur pri tiu punkto mi opiniis ambaŭ aferojn egalaj ; kaj mi certigas, ke ili estas tiaj. Ĉu vi respondos, ke celo de virto estas treege supera al celo de amo ? Kiu rifuzas tion konsenti ? Ĉu la demando ne estas pri la forto, kiun havas ambaŭ por tolerigi suferojn ? Tion juĝu per efiko. Pri severa virto, kiom multe da forlasintoj vi havas ; sed pri amo, kiom malmulte. Ĉu vi respondos ankaŭ, ke se troviĝas suferoj en plenumado de bono, ili estas nek neeviteblaj nek necesaj ; ke oni ne trovas plu tiranojn kaj krucojn, kaj ke oni vidas multajn virtajn personojn, kiuj havas vivon dolĉan kaj trankvilan ? Mi diros al vi same, ke estas amoj kvietaj kaj feliĉaj ; kaj (tio cetere faras ankaŭ diferencon treege utilplenan por mi) mi aldonos, ke amo, kvankam ĝi trompas sufiĉe ofte, promesas almenaŭ nur kontentojn kaj ĝojojn, dum religio volas, ke oni certiĝu nur pri praktikado malgaja kaj ĉagreniga. Ne timu, mi diris, vidante, ke lia fervoro estas preta incitiĝi, la sola afero, pri kio mi volas nun konkludi, estas jena : ne estas pli malbona metodo por naŭzigi koron pri amo, ol malŝati antaŭ ĝi ĝiajn dolĉaĵojn, kaj promesi al ĝi pli da feliĉeco per ekzercadoj de virto. Laŭ la maniero per kiu ni estas faritaj, estas certe, ke nia feliĉeco konsistas el plezuro ;

mi certigas, ke formi alian ideon pri ĝi estas neeble ; sed koro ne bezonas sin longatempe ekzameni por senti, ke el ĉiuj plezuroj la plej dolĉaj estas tiuj de amo. Baldaŭ ĝi ekvidas, ke oni ĝin trompis, kiam oni al ĝi promesis pli ĉarmoplenajn ĝuadojn ; kaj tiu trompo ĝin instigas malfidi al plej firmaj promesoj. Predikantoj, vi, kiuj volas min rekonduki al virto, diru, ke ĝi estas nediskuteble necesega, sed ne masku, ke ĝi estas severa kaj peniga. Montru bone, ke ĝuadoj de amo estas pasemaj, ke ili estas malpermesitaj, ke ili estos sekvitaj de eternaj punoj, ke (kaj eble tio min pli ankoraŭ impresos) ju pli ili estas dolĉaj kaj ĉarmoplenaj, des pli ĉielo sin montros malavara por rekompensi tiel grandan oferon ; sed konfesu, ke por koroj faritaj kiel la niaj, ili estas sur tiu tero niaj plej perfektaj feliĉecoj. »

Tiu fino de mia parolado redonis kvieton al mia amiko Tiberge. Li konsentis, ke iom da prudento troviĝis en miaj sentoj. La sola kontraŭparolo, kiun li aldonis, estis peti de mi, kial mi almenaŭ ne eniris en miajn proprajn principojn, oferante mian animon al la espero de tiu rekompenco, pri kiu mi faris al mi tiel grandan ideon.

« Ho kara amiko, mi respondis, estas tie ĉi, ke mi rekonas mian mizeron kaj mian malfortecon ; ho ve ! jes, estas mia devo agi kiel mi rezonas ; sed ĉu ago estas en mia potenco ? Kiajn helpadojn mi ne bezonus, por forgesi la ĉarmojn de Manon.

— Dio min pardonu, daŭrigis Tiberge, mi opinias, ke jen estas ankoraŭ unu el niaj ĵansenistoj.

— Mi nescias, kio mi estas, mi respondis ; kaj mi ne vidas tro klare tion, kio necese estus, ke mi estu ; sed mi tro sentas la verecon de tio, kion ili diras. »

Tiu interparolado utilis almenaŭ por renovigi la kompaton de mia amiko. Li komprenis, ke en miaj

malordoj estis pli da malforteco ol da malboneco. Pro tio lia amikeco estis pli inklinema en estonteco, por doni al mi helpojn, sen kiuj mi estus pereinta neeviteble en mizereco. Tamen mi faris al li nenian konfidencion pri la projekto de mi farita, foriri for de Saint-Lazare. Mi nur petis de li, ke li komisiigu pri mia letero. Mi estis ĝin preparinta, antaŭ kiam li venos; kaj ne mankis pretextoj por kolorigi la necesecon, kiu min devigis skribi. Li fidele ĝin portis akurate: kaj Lescaut ricevis, antaŭ fino de l' tago, tiun, kiu estis por li.

Li venis min vidi la morgaŭon; kaj li pasis facile sub la nomo de mia frato. Mia ĝojo estis grandega, kiam mi lin ekvidis en mia ĉambro. Mi zorge fermis la pordon.

« Ni ne perdu unu solan momenton, mi diris: unue sciigu al mi novaĵojn pri Manon; kaj poste donu bonan konsilon por rompi miajn katenojn. »

Li certigis, ke li ne estis vidinta sian fratinnon de la tago, kiu antaŭiris mian malliberigon; ke li estis sciigita pri ŝia sorto kaj pri la mia nur post multaj informiĝoj kaj klopodoj; ke li sin prezentis du aŭ tri fojojn al Hospitalo, sed ke oni rifuzis al li permeson por paroli kun ŝi.

« Malfeliĉa G... M..., mi ekkriis, kiel kare vi al mi pagos tion!

— Pri tio, kio koncernas vian liberigon, daŭrigis Lescaut, tio estas entrepreno malpli facila ol vi pensas. Hieraŭ du el miaj amikoj kaj mi pasigis vesperon, observante ĉiujn eksterajn partojn de tiu domo: kaj ni opiniis, ke, ĉar viaj fenestroj estas ĉe korto ĉirkaŭita de konstruaĵoj, kiel vi skribis tion al ni, estus tre malfacile vin eltiri el tie. Cetere vi estas sur tria etaĝo; kaj ni povas enkonduki ĉi tien nek ŝnurojn nek ŝtuparetojn.

Do mi vidas nenian rimedon sukceseblian de ekstero. Necese estas, ke oni imagu ian artifaĵon en la domo mem.

— Ne, mi respondis ; mi ĉion ekzamenis, precipe de kiam mia enfermigo estas iom malpli severa, dank' al kompatado de la superulo. La pordo de mia ĉambro ne estas plu ŝlosita ; mi havas liberecon promenadi en la galerio de monaĥoj : sed ĉiuj ŝtuparoj estas ŝtopitaj de dikaj pordoj, kiujn oni zorge tenas fermitaj tage kaj nokte ; pro tio, estas neeble, ke sola lerteco povu min savi. Atendu, mi daŭrigis, iom pripensante pri ideo, kiu ŝajnis al mi bonega ; ĉu vi povus alporti al mi pistolon ?

— Facile, diris Lescaut ; sed ĉu vi volas mortigi iun ? »

Mi al li certigis, ke mi tiom malmulte intencis mortigi iun, ke ne eĉ estis necese, ke ĝi estu ŝargita.

« Ĝin alportu morgaŭ, mi aldonis ; kaj ne forgesu troviĝi vespere je la dekunua, antaŭ la pordo de tiu domo, kun du aŭ tri el viaj amikoj. Mi esperas, ke mi povos vin realiri tien. »

Vane li insistis por ke mi konigu plion. Mi diris, ke entrepreno tia, kian mi ĝin meditas, povas ŝajni saĝa nur kiam ĝi sukcesis. Mi petis de li, ke li plimallongigu sian viziton, por ke li trovu pli da facileco por min viziti la morgaŭon. Lin oni akceptis tiel facile kiel en la unua fojo. Lia mieno estis serioza. Estas neniu, kiu ne estus opiniinta lin honesta viro.

Kiam mi estis provizita je la ilo de mia liberigo, mi preskaŭ ne dubis plu pri la sukceso de mia projekto. Ĝi estis stranga kaj multimoplana : sed de kio min ne kapabligis la sentoj, kiuj min instigis ? De kiam estis al mi permesite eliri el mia ĉambro kaj promenadi en galerioj, mi estis rimarkinta, ke la pordisto alportas ĉiutage dum vespero la ŝlosilojn de ĉiuj pordoj al la

superulo, kaj ke poste regadas en la domo profunda silento, kiu montras, ke ĉiuj homoj reeniris en sian loĝejon. Mi povis aliri sen bariloj, per komunika galerio, el mia ĉambro al tiu de tiu Patro. Mia decido estis preni liajn ŝlosilojn, dum mi lin terurus per mia pistolo, se li farus ian malfacilecon por ilin doni, kaj ilin utiliĝi por trafi la straton. Mi atendis la momenton kun malpacienco. La pordisto venis dum ordinara horo, tio estas iom post la naŭa. Mi lasis pasi unu horon ankoraŭ, por certiĝi, ke ĉiuj monaĥoj kaj ĉiuj servistoj estas dormantaj. Fine mi foriris kun mia armilo kaj brulanta kandelo. Unue mi frapis malforte sur la pordon de l' Patro, por lin vekti sen bruo. Li min aŭdis post la dua frapo ; kaj kredeble imagante, ke estas ia monaĥo, kiu estas malsana kaj bezonas helpon, li ellitiĝis por malfermi al mi. Tamen li havis antaŭzorgon peti tra la pordo, kiu estas kaj kion oni volas de li ? Mi estis devigita min nomi, sed mi afekte uzis tonon plendoplenan, por komprenigi al li, ke mi ne troviĝas bonfartanta.

« Ha ! estas vi, mia kara filo, li diris, malfermante pordon. Kio do vin alkondukas tiel malfrue ? »

Mi eniris en lian ĉambron ; kaj lin altirinte ĝis flanko kontraŭ la pordo, mi al li certigis, ke estas al mi neeble resti plilongatempe en Saint-Lazare, ke nokto estas oportuna momento por eliri ne ekvidite, kaj ke mi esperas, ke lia amikeco konsentos malfermi pordojn aŭ pruntedoni al mi liajn ŝlosilojn, por ke ilin mi malfermu mem.

Tia komplimento devis lin mirigi. Li restis kelkatempe sen respondo, min rigardante. Sed, ĉar mi ne havis tempon perdeblan, mi reprenis parolon por diri, ke mi estas tre kortuŝita de ĉiuj liaj bonaĵoj, sed ke, ĉar libereco estas la plej kara el ĉiuj bonoj, precipe por mi al kiu oni ĝin rabis maljuste, mi estis decidinta, ke

mi ĝin donos al mi tiun nokton mem, kĵa ajn estu la prezo ; kaj timante, ke li laŭtigos voĉon por peti helpon, mi al li vidigis honestan motivon de silento, kiun mi tenis sub mia veŝto.

« Pistolo ! li diris. Kio ? mia filo, ĉu vi volas depreni de mi vivon, por min danki pri la ŝateco, kiun mi havis al vi.

— Al Dio ne plaĉu tio, mi respondis. Vi havas tro da spriteco kaj tro da prudento por min meti en tian necesecon : sed mi volas esti libera ; kaj mi tiel estas tion decidinta, ke, se mia projekto malsukcesos pro via kulpo, vi estas pereonta neripareble.

— Sed, mia kara filo, li daŭrigis kun mieno pala kaj terurita, kion mi faris al vi ? Kian motivon vi havas por voli mian morton ?

— He ! ne, mi respondis senpacience, mi ne intencas vin mortigi : se vi volas vivi, malfermu pordon ; kaj mi estas la plej bona el viaj amikoj. »

Mi ekvidis ŝlosilojn, kiuj kuŝis sur la tablo. Mi ilin prenis kaj petis de li, ke li min sekvu, farante kiel eble plej malmulte da bruoj. Li estis devigita tion konsenti. Ju pli ni antaŭiris, des pli, ĉiufoje kiam li malfermis novan pordon, li ripetis sopirante :

« Ha, mia filo ! ha ! kiu estus tion kredinta ?

— Nenian bruon, mia Patro, mi miavice ripetis ĉiumomente. »

Fine ni alvenis al speco de barilo, kiu troviĝas antaŭ la pordego al la strato. Mi min kredis jam libera, kaj alpaŝis malantaŭ la Patro kun mia kandelo en unu mano kaj mia pistolo en alia. Dum li rapide malfermis, servisto, kiu kuŝis en apuda ĉambreto, aŭdante bruon de rigliloj, ellitiĝas kaj metas kapon al sia pordo. La bona Patro kredeble lin opiniis kapabla min haltigi. Li al li ordonis tre singarde, ke li venu por lin helpi. Tiu

viro estis fortika sentaŭgulo, kiu rapidis al mi, ne ŝanceliĝante. Mi ne lin indulgis kaj pafis ŝargon mezen de lia brusto.

« Jen de kio vi estas kaŭzo, mia Patro, mi diris sufiĉe fiere al mia gvidanto. Sed tio ne malhelpu, ke vi plenumu vian taskon, mi aldonis, lin puŝante al la lasta pordo. »

Li ne kuraĝis rifuzi kaj ĝin malfermis. Mi eliris feliĉe kaj trovis, post kvar paŝoj, Lescaut'on kiu min atendis kun du el siaj amikoj, laŭ sia promeso.

Ni foriris. Lescaut petis de mi, ĉu li ne aŭdis pistolan pafon.

« Vi estas kulpa, mi diris : kial vi ĝin alportis al mi ŝargitan ? »

Tamen mi lin dankis, ke li estu havinta tiun antaŭzorgon, sen kiu mi kredeble estus restinta en Saint-Lazare dum longa tempo. Ni iris pasigi nokton ĉe restoraciisto, ĉe kiu mi trovis kompenson al la malbona nutraĵo de mi manĝita de preskaŭ tri monatoj. Tamen mi ne povis min liveri al plezuro. Mi morte suferis pri Manon.

« Necese estas ŝin liberigi, mi diris al miaj tri amikoj. Mi deziris liberecon nur pro tiu celo. Mi petas de vi helpon de via lerteco ; pri mi, mi uzos por tio eĉ mian vivon. »

Lescaut, al kiu mankis nek spriteco nek prudento, al mi rimarkigis, ke oni devas rajdi kun brido en mano, ke mia forkuro for de Saint-Lazare kaj la malfeliĉaĵo, kiu okazis dum mia eliro, neeviteble faros bruon, ke la polica generalleŭtenanto certe min serĉigos, kaj ke li havas la brakon longa, fine ke se mi ne volas riski ion pli malbonan ankoraŭ ol Saint-Lazare, estas taŭge teni min kovritan kaj enfermitan dum kelkaj tagoj, por lasi al la unua fajro de miaj malamikoj tempon necesan por

estingiĝi. Lia konsilo estis saĝa ; sed necese estis, ke mi estu tia por ĝin obei. Tiom da malrapidaĵoj kaj da ŝanceliĝoj ne akordiĝis kun mia pasio. Mia tuta komplezo konsistis el la promeso, ke mi pasigos en dormado la tagon venontan. Li min enfermis en sia ĉambro, en kiu mi restis ĝis vespero.

Mi utiligis parton de tiu tempo por fari projektojn helpontajn al Manon. Mi estis konvinkita, ke ŝia malliberejo estas pli neprenebla ankoraŭ ol la mia. Oni povis uzi nek forton nek perforton, oni bezonis nur artifik-econ : sed la diino mem de l'elpensiteco ne estus sciinta kiamaniere komenci. Mi vidis en tio tiel malmulte da lumo, ke mi prokrastis, por pli bone konsideri aferojn, ĝis kiam mi estos preninta kelkajn informojn pri la interna aranĝeco de Hospitalo.

Tuj kiam nokto estis redoninta al mi liberecon, mi petis Lescaut'on, ke li min akompanu. Ni komencis interparoladon kun unu el la pordistoj, kiu ŝajnis al ni prudenta homo. Mi ŝajnis, ke mi estas alilandulo, kiu aŭdis admire pri ĝenerala Hospitalo kaj pri ordo en ĝi reganta. Mi lin demandis pri plej malgrandaj detaloj, kaj, el cirkonstanco en cirkonstancon, ni alvenis al administrantoj ; kaj mi petis de li, ke li min sciigu pri iliaj nomoj kaj titoloj. La respondoj, kiujn li faris pri tiu lasta temo, naskis en mi penson, pri kiu mi min gratulis tuje, kaj kies plenumon mi ne prokrastis. Mi petis de li, kiel afero ĉefa por mia projekto, ĉu tiuj sinjoroj ne havas infanojn. Li respondis, ke li ne povas doni certan kalkulon, sed ke al sinjoro de T..., kiu estas unu el precipaj, li konas filon havantan aĝon de edziĝo, kiu kelkajn fojojn estis veninta en Hospitalon kun sia patro. Tiu certigo al mi sufiĉis. Preskaŭ tuje mi rompis interparoladon ; kaj mi konigis al Lescaut, revenante al lia hejmo, projekton de mi elpensitan.

« Mi imagas, mi diris, ke sinjoro de T..., la filo, kiu estas riĉa kaj bonfamilia, havas ian inklinon al plezuroj, kiel ĉiuj samaĝaj junuloj. Li ne povas esti malamiko al virinoj, nek tiel mokatinda, ke li rifuzus siajn servojn por ama afero. Mi faris projekton lin interesi al la liberigo de Manon. Se li estas honesta viro kaj se li havas delikatajn sentojn, li donos al ni sian helpon pro grandanimeco. Se li ne estas kapabla esti kondukita de tia motivo, li almenaŭ faros ion por aminda knabino, kiam eĉ li farus tion nur pro espero, ke iam li partoprenos ŝiajn favorojn. Mi ne volas prokrasti mian viziton al li pli longatempe ol ĝis morgaŭ, mi aldonis. Mi sentas min tiel konsolita de tia projekto, ke mi eltiras el ĝi bonan antaŭsignon. »

Lescaut konsentis, ke estas verŝajneco en miaj ideoj, kaj ke ni povas esperi ion per tiu vojo. Pro tio mi pasigis nokton iom pli malgaje.

Kiam mateno alvenis, mi min vestis plej pure, kiel estis eble al mi, en stato de malriĉeco, en kiu mi troviĝis, kaj mi kondukigis min en fiakro al la domo de sinjoro de T... Li estis mirigita, ricevante viziton de nekonatulo. Mi estis bone impresita de lia fizionomio kaj de liaj ĝentilaĵoj. Kompreneble mi al li klarigis mian aferon, kaj, por varmigi liajn naturajn sentojn, mi parolis pri mia pasio kaj pri meritoj de mia amatino, kiel pri du aferoj, kiuj povis esti egalitaj nur unu per la alia. Li diris, ke, kvankam li neniam vidis Manon'on, li tamen aŭdis paroli pri ŝi, se mi parolas pri la junulino, kiu estis amatino de la maljuna G... M... Mi ne dubis, ke li estis informita pri la parto, kiun mi estis havinta en tiu aventuro; kaj por lin gajni pli kaj pli, farante al mi meriton de mia konfido, mi rakontis detale ĉion, kio okazis al Manon kaj al mi.

« Vi vidas, sinjoro, mi daŭrigis, ke la utilo de

mia vivo kaj tiu de mia koro estas mem nun en viaj manoj. La unua ne estas al mi pli kara ol la dua. Mi ne havas por vi kaŝitaĵojn, tial ke mi estas informita pri via grandanimeco ; kaj la simileco de niaj aĝoj al mi esperigas, ke la samo troviĝas en niaj inklinoj. »

Li ŝajnis tre tuŝita de tiu montro de malkaŝeco kaj de sincereco. Lia respondo estis tiu de homo, kiu havas bonsociajn ecojn kaj delikatajn sentojn, kiujn la bon-societo ne donas ĉiam kaj ofte perdigas. Li diris, ke li metas mian viziton sur la rangon de siaj bonfortun-ajoj, ke li rigardas mian amikecon kiel unu el siaj plej feliĉaj akiroj, kaj ke li penos ĝin meriti per la fervoro de siaj servoj. Li ne promesis, ke li redonos al mi Manon'on, tial ke li havas, li diris, influon nur malgrandan kaj malmulte certan ; sed li promesis, ke li donos al mi plezuron ŝin vidi, kaj faros ĉion, kio estas en lia povo por ŝin remeti en miajn brakojn. Mi estis pli kontenta, vidante lin necerta pri lia influo, ol mi estus estinta pro la plena certigo, ke li plenumos ĉiujn miajn dezirojn. Mi trovis en la modereco de liaj proponoj signon de malmensogeco, per kiu mi estis ĉarmita. Unuvorte mi havis plenan konfidon en liaj bonservoj. Nur pro la promeso, ke li al mi vidigos Manon'on, mi estus ĉion entrepreninta por li. Mi al li montris kelkajn similajn sentojn, laŭ maniero, kiu lin konvinkis ankaŭ, ke mi ne havas malbonan naturecon. Ni nin kore kisis reci-proke, kaj ni fariĝis amikoj sen ia alia motivo ol la boneco de niaj koroj kaj tiu simpla kaŭzo, kiu instigas homon ameman kaj grandaniman ami alian homon, kiu al li similas. Li puŝis la signojn de sia estimo pli mal-proksimen ; ĉar, pripensinte pri miaj aventuroj, kaj opi-niante, ke, elirante el Saint-Lazare, mi ne devis trov-iĝi tro riĉa, li prezentis al mi sian monujon, kaj min

instigis, ke mi ĝin akceptu. Mi ne ĝin akceptis, sed diris al li :

« Tio estas tro, kara sinjoro. Se kun tiom da bon-eco kaj tiom da amikeco vi al mi revidigos mian karan Manon'on, mi estos alligita al vi dum mia tuta vivado. Se vi tute redonos al mi tiun karan kreitaĵon, mi ne kredos, ke mi estos liberigita el mia ŝuldo, kiam eĉ mi verŝus mian tutan sangon por vin servi. »

Ni nin disiĝis, nur kiam ni estis interkonsentintaj pri tempo kaj loko, en kiu ni devis nin trovi : li estis sufiĉe komplezema por ne min prokrasti pli malproksimen ol la tagmezo de l'sama tago. Mi lin atendis en kafejo, en kiun li min realiris proksimume je la kvara, kaj ni prenis kune la vojon al Hospitalo. Miaj genuoj estis tremantaj, dum mi trairis la kortojn.

« Potenco de amo ! mi diris ; mi do revidos la idolon de mia koro, la objekton de tiom da ploroj kaj de tiom da maltrankvilecoj. Ĉielo ! konservigu al mi sufiĉe da vivo, por ke mi povu iri ĝis ŝi, kaj poste disponu de mia fortuneo kaj de miaj tagoj ; mi ne havos alian komplezon por peti de vi. »

Sinjoro de T... parolis kun kelkaj pordistoj de la domo, kiuj klopodis por doni al li ĉion, kio dependas de ili, por lin kontentigi. Li montrigis al si la kvartalon, en kiu Manon havis sian ĉambron, kaj oni en ĝin nin kondukis kun ŝlosilo terure grandega, kiu utilis por malfermi pordon. Mi petis de la servisto, kiu nin kondukis, kaj kiu estis tiu, kiu estis komisiita por ŝin servi, kiamaniere ŝi estis pasiginta tempon en tiu loĝejo. Li diris, ke ŝi havas anĝelinan dolĉecon, ke neniam li ricevis de ŝi eĉ unu vorton malafablan, ke ŝi senĉese verŝis larmojn dum la ses unuaj semajnoj post ŝia alveno, sed ke de kelka tempo ŝi ŝajnis preni sian mal-feliĉecon per iom pli da pacienco, ke ŝi estas okupata

kudri de mateno ĝis vespero, escepte dum kelkaj horoj, kiujn ŝi uzas por legado. Mi ankoraŭ petis de li, ĉu ŝi estis zorgita pure. Li certigis, ke necesajoj almenaŭ neniam mankis al ŝi.

Ni alproksimiĝis al ŝia pordo. Mia koro perforte batiĝis. Mi diris al sinjoro de T...

« Eniru sola, kaj avertu ŝin pri mia vizito ; ĉar mi timas, ke ŝi estus tro surprizegita, vidante min subite. »

La pordo estis malfermita antaŭ ni. Mi restis en la galerio. Tamen mi aŭdis iliajn paroladojn. Li diris, ke li venas alporti al ŝi iom da konsolo, ke li estas unu el miaj amikoj, kaj ke li prenas multe da intereso en nia feliĉeco. Ŝi petis de li kun plej viva fervoro, ĉu ŝi ekscios de li tion, kio mi fariĝis. Li promesis, ke li alkondukos al ŝiaj piedoj min tiel ameman, tiel fidelan, kiel ŝi povus tion deziri.

« Kiam ? ŝi petis.

— Hodiaŭ mem : tiu feliĉa momento ne malfruigis ; li ekaperos tuj, se vi tion deziras. »

Ŝi komprenis, ke mi estas malantaŭ la pordo. Mi eniris, kiam ŝi alkuris al ĝi rapidege. Ni nin ŝmacadis reciproke kun tiu elverŝo de amemo, kiun trimonata foresto trovigas tiel ĉarma al perfektaj geamantoj. Niaj sopiroj, niaj interrompitaj ekkrioj, mil amaj nomoj pasige ripetitaj de unu kaj de alia, faris dum kvarono da horo scenon, kiu kortuŝis sinjoron de T...

« Mi vin envias, li diris, nin sidigante : estas nenia glora sorto, al kiu mi ne preferus amantinon tiel belan kaj tiel pasiplenan.

— Pro tio, mi malŝatus ĉiujn imperiojn de l'mondo, mi respondis, por certigi al mi la feliĉecon, ke mi estas amata de ŝi. »

La tuta restaĵo de tiu interparolo tiel dezirita kompreneble ne povis ne esti treege amoplena. Kompatinda

Manon rakontis siajn aventurojn, kaj mi konigis al ŝi la miajn. Mi ploris maldolĉe, interparolante pri stato en kiu ŝi estas, kaj el kiu mi estis elirinta nur de unu momento. Sinjoro de T... nin konsolis, promesante denove, ke li laboros fervore por fini niajn mizerojn. Li konsilis, ke ni ne igu tiun unuan sinvidon tro longa, por ke li trovu pli da facileco, kiam li postulos por ni alian. Li tre malfacile povis ŝatigi de mi tiun konsilon. Manon precipe ne povis konsenti, ke mi eliros. Cent fojojn ŝi min residigis sur mian seĝon. Ŝi min detenis per vestoj kaj per manoj.

« Ho ve ! en kiu loko vi min lasas ? ŝi diris. Kio povas certigi al mi, ke mi vin revidos ? »

Sinjoro de T... al ŝi promesis, ke li ofte venos ŝin vidi kun mi.

« Pri la loko, li aldonis agrable, oni ne devas plu ĝin nomi Hospitalo ; ĝi estas Versailles ¹, de kiam persono, kiu meritas imperion sur ĉiuj koroj, estas en ĝi enfermita. »

Elirante, mi faris kelkajn malavaraĵojn al la lakeo, kiu ŝin servis, por lin instigi, ke li donu al ŝi siajn zorgojn kiel eble plej fervore. Tiu knabego havis animon malpli malaltan kaj malpli malmolan ol siaj similuloj. Li estis ĉeestinta ĉe nia sinvido. Tiu amoplena vidaĵo lin kortuŝis. Unu luidoro, kiun mi al li donacis, lin tute alligis al mi. Li prenis min aparte, kiam ni malsupreniris en la kortojn.

« Sinjoro, li diris, se vi volas min preni en via servistaro, aŭ doni al mi honestan rekompenson kiel kompensaĵon pro la perdo de l'ofico, kiun mi plenumas ĉi tie, mi kredas, ke estos facile liberigi fraŭlinon Manon'on. »

1. Elparolu : *Versaj*.

Mi streĉis orelon, aŭdante tian proponon : kaj, kvankam mi estis senigita je ia ajn monsumo, mi faris al li promesojn, kiuj multe superis liajn dezirojn. Mi esperis, ke ĉiam al mi estos facile rekompenci tiaspecan homon.

« Estu konvinkita, mi diris, amiko mia, ke nenio estas, kion mi ne faros por ci, kaj ke cia fortuna estas tiel certa, kiel la mia. »

Mi volis scii kiajn rimedojn li intencis uzi.

« Neniun alian, li diris, krom malfermi al ŝi vespere la pordon de ŝia ĉambro, kaj ŝin alkonduki al vi ĝis pordego al strato, ĉe kiu necese estas, ke vi estu preta por ŝin ricevi. »

Mi petis de li, ĉu ne estas timeble, ke ŝi estu rekonita, trairante galeriojn kaj kortojn. Li konfesis, ke tie troviĝas ia danĝero ; sed li diris, ke necese estas riski ion. Kvankam mi estis kontentega, vidante lin tiel decida, mi vokis sinjoron de T..., por al li komuniki tiun projekton, kaj la solan motivon, kiu ŝajnis al mi ĝin igi duba. Li trovis pli da malfacilaĵoj ol mi. Li konsentis, ke nepre ŝi povas forkuri per tiu maniero ;

« Sed se ŝi estas rekonita, li daŭrigis, kaj se ŝi estas arestita, dum ŝi forkuras, eble ŝi estos neripareble perdita. Cetere vi estus devigitaj forlasi Parizon tuje ; ĉar neniam vi estus sufiĉe bone kaŝitaj for de ĉiuj serĉadoj. Oni ilin plimultigus, tiom por vi, kiom por ŝi. Unu viro facile malaperas, kiam li estas sola ; sed estas preskaŭ neeble resti nekonita kun beleta virino. »

Kvankam tia rezono ŝajnis al mi pravega, tamen ĝi ne povis superi en mia spirito tiun esperon, ke mi baldaŭ metos Manon'on en libereco. Mi tion diris al sinjoro de T..., kaj petis de li, ke li pardonu al amo iom da nesingardemo kaj de bravegeco. Mi aldonis, ke mia projekto estas efektive forlasi Parizon, por halti,

kiel mi jam faris, en ia apuda vilaĝo. Ni do interkonsentis kun la servisto, ke ni ne prokrastos lian entreprenon pli malproksimen ol en la venonta tago, kaj por ĝin igi tiel certa, kiel tio estis ebla por ni, ni decidis, ke ni alportos virajn vestojn, por faciligi nian eliron. Ne estis facile ilin enirigi; sed mi ne estis senigita je eltrovemo por elpensi la rimedon. Mi nur petis de sinjoro de T..., ke li vestu, la morgaŭon, du maldikajn jakojn unu sur la alian, kaj mi prenis sur mi la restaĵon.

Ni revenis matene al Hospitalo. Mi havis kun mi por Manon tolaĵojn, ŝtrumpojn, ktp., kaj sur mia jako surtuton, kiu ne lasis vidi, ke miaj poŝoj estas tro ŝvelintaj. Mi restis nur unu momenton en ŝia ĉambro. Sinjoro de T... al ŝi lasis unu el ŝiaj jakoj; mi donis al ŝi mian veŝton, ĉar la surtuto al mi sufiĉis por eliri. En ŝia tualeto nenio mankis, krom la kuloto, kiun bedaŭrinde mi estis forgesinta. La forgeso de tiu necesa peco eble nin estus ridiginta, se embaraso, en kiun ĝi nin metis, estus estinta malpli grava. Mi malesperis, ĉar tianatura bagatelo estis kapabla nin haltigi. Fine mi decidis, ke mi mem eliros sen kuloto. Mi lasis la mian al Manon. Mia surtuto estis longa, kaj mi min aranĝis, helpite de kelkaj pingloj, por ke mi povu konvene transiri la pordon. La restaĵo de l'tago ŝajnis al mi netolereble longega. Fine kiam alvenis nokto, ni nin direktis en karoso iom pli malsupren ol la pordo de Hospitalo. Ni ne restis tie longatempe, ĉar baldaŭ ni vidis Manon'on aperantan kun sia kondukanto. Nia ĉarpordo estis malfermita; ni ambaŭ enkarosiĝis tuje: mi ricevis mian karan amatinon en miaj brakoj. Ŝi tremis kiel folio. La veturigisto petis de mi, kien li devas aliri.

« Al ekstremaĵo de l'mondo, mi diris; kaj konduku min ien, kie mi neniam povos esti disigita el Manon. »

Tiu ekscitego, kiun mi ne povis superi, preskaŭ ek-

altiris al mi bedaŭrindan embarason. Pro tia respondo la veturigisto faris pripensojn ; kaj kiam mi poste estis dirinta la nomon de l'strato, en kiun mi volis, ke li min konduku, li respondis, ke li timas, ke mi lin enŝovigos en malbonan aferon ; ke li bone vidas, ke tiu bela junulo, kiu nomiĝas Manon, estas knabino, kiun mi forŝtelas for de Hospitalo, kaj ke li ne havas humoron tia, ke li sin perdos por amo al mi. La delikateco de tiu fripono estis nur deziro pagigi de mi la veturilon pli kare. Ni estis tro proksimaj de Hospitalo, por ke ni ne montriĝu komplezemaj :

« Silentu, mi diris, estas unu luidoro gajnota de ci. »

Post tio, li estus min helpinta bruligi Hospitalon mem. Ni alvenis al la domo, en kiu loĝis Lescaut. Ĉar malfruiĝis, sinjoro de T... nin forlasis meze de vojiro, promesante, ke li nin revidos la morgaŭon.

Mi tenis Manon'on tiel mallarĝe premitan inter miaj brakoj, ke ni okupis en la karoso nur unu lokon. Si ploris pro ĝojo, kaj mi sentis ŝiajn larmojn, kiuj malsekigis mian vizaĝon. Sed kiam ni devis elkarosiĝi, por eniri ĉe Lescaut'on, mi havis kun la veturigisto novan disputon, kies sekvoj estis pereigaj. Mi pentis, ke mi estis promesinta unu luidoron, ne nur ĉar la donaco estis tro granda, sed pro motivo ankoraŭ pli forta, kiu estis la neebleco ĝin pagi. Mi venigis Lescaut'on. Li malsupreniris el sia ĉambro por veni al la pordo ; mi diris al li orele en kiu embaraso mi troviĝas. Tial ke li havis malafablan humoron kaj neniel kutimis esti ĝentila por la fiakristoj, li respondis, ke mi mokas lin :

« Luidoro ! li aldonis ; dekdu bastonbatoj al tiu fripono ! »

Vane mi dolĉe al li klarigis, ke li nin pereigas. Li tiregis mian bastonon, kaj ŝajne volis per ĝi batadi la

veturigiston. Ĉi tiu, kiu eble jam estis okaze falinta sub la mano de ia korpogardisto aŭ de musketario, forkuris pro timo kun sia karoso, kriante, ke mi lin trompis, kaj ke mi havos novaĵojn pri li. Vane mi al li kriis, ke li haltu. Lia forkuro kaŭzis al mi grandegan maltrankvilecon ; mi ne dubis, ke li avertos komisaron.

« Vi min pereigas, mi diris al Lescaut ; ĉe vi, mi ne estus senriska : necese estas, ke ni foriru tuje. »

Mi prezentis al Manon mian brakon por marŝi, kaj rapide eliri el tiu strato danĝeroplena. Lescaut nin akompanis. Estas vere mirinda la maniero, per kiu Providenco enĉenumas fariĝojn. Apenaŭ ni estis marŝantaj dum kvin aŭ ses minutoj, kiam viro, kies vizaĝon mi ne vidis, rekonis Lescaut'on. Kredeble li lin serĉis en apudaĵoj de lia domo, havante la malfeliĉan projekton, kiun li plenumis.

« Jen estas Lescaut, li diris, pafante unu pistolan pafon ; tiuvespere li iros vespermanĝi kun anĝeloj. »

Kaj li malaperis tuj. Lescaut falis, ne havante plu eĉ unu moveton de vivo. Mi instigis Manon'on, ke ŝi forkuru, ĉar niaj helpoj ne povis utili al kadavro, kaj mi timis, ke nin arestos la urbgardistaro, kies alveno ne povis malfrui. Mi min ŝovis kun ŝi kaj kun la servisto en la unuan strateton, kiu kruciĝis. Ŝi estis tiel terurita, ke mi malfacile povis ŝin subteni. Fine mi ekvidis fiakron en ekstremaĵo de l'strato. Ni supreniris en ĝin : sed kiam la veturigisto petis de ni, kien li devas nin konduki, mi estis embarasita por lin respondi. Mi havis nek certan rifuĝejon nek fidindan amikon, al kiu mi kuraĝus min turni : mi estis sen mono, havante en mia monujo apenaŭ pli ol unu duonmonpistolon. Timado kaj laceco tiel malsanigis Manon'on, ke ŝi estis duonsvenanta apud mi. Cetere mi havis mian imagon plenan je la mortigo al Lescaut, kaj mi ne estis sen mal-

trankvilecoj pri la urbogardistaro. Feliĉe mi memoris pri la gastejo de Chaillot, en kiu mi estis pasiginta kelkajn tagojn kun Manon, kiam ni estis irintaj en tiun vilaĝon por loĝi en ĝi. Mi esperis, ke tie, ne nur mi estos senriska, sed plie ke mi povos vivi dum kelka tempo, ne estante devigata pagi.

« Konduku nin al Chaillot, mi diris al la veturigisto. »

Li rifuzis iri tien tiel malfrue, se mi ne pagos unu monpistolon : alia motivo de embaraso. Fine ni interkonsentis po ses frankoj : tio estis la lasta mono restanca en mia monujo.

Dum la vojiro, mi konsolis Manon'on ; sed funde mi sentis malesperon en koro. Mi estus doninta al mi morton, se mi ne estus havinta en miaj brakoj la solan bonaĵon, kiu min alligis al la vivo. Tiu penso min plifortigis.

« Mi ŝin tenas almenaŭ, mi diris ; ŝi amas min, ŝi estas al mi : Tiberge diras vantaĵon ; tio ne estas fantomo de feliĉeco. Mi vidus la tutan universon pereantan, tio ne interesus min ; kial ? tial ke mi ne havas plu amemon al la cetero. »

Tiu sento estis vera ; tamen en momento kiam mi tiel malŝatis la mondajn bonaĵojn, mi sentis, ke mi estus bezoninta malgrandan parton da ili, por malŝati ankoraŭ pli potence ĉion ceteron. Amo estas pli forta ol sufiĉego, pli forta ol trezoroj kaj riĉaĵoj ; sed ĝi bezonas ilian helpon : kaj nenio estas pli naŭziga por delikata amanto ol vidi, ke li estas alkondukita malgraŭvole per tiuj necesajoj al la maldelikateco de plej malaltaj animoj.

Estis la dekunua, kiam ni alvenis al Chaillot. Ni estis akceptitaj en la gastejo, kiel homoj jam konitaj. Oni ne miris, vidante Manon'on kun viraj vestoj, ĉar oni kutimas en Parizo vidi virinojn, kiuj prenas ĉiu-

specajn formojn. Mi ŝin servigis, kiel mi estus farinta, se mi troviĝus en plej bona stato de riĉeco. Ŝi nesciis, ke mi ne havas monon. Mi zorge ne ŝin sciigis pri tio, ĉar mi estis decidinta, ke mi morgaŭ revenos sola Parizon, por serĉi kuracilon al tiu malĝoja speco de malsano.

Ŝi verspermanĝante ŝajnis al mi pala kaj malgrasiĝinta. Mi ne estis ekvidinta tion en Hospitalo, tial ke la ĉambro, en kiu mi ŝin vidis, ne estis tre klara. Mi petis de ŝi, ĉu tio ne estas efiko de la teruro, kiun ŝi havis, vidante mortigi sian fraton. Ŝi certigis, ke, kvankam ŝi estas tre kortuŝita de tiu akcidento, tamen ŝia paleco devenas nur de tio, ke ŝi dum tri monatoj suferis pro mia foresto.

« Ci do min amas treege ? mi demandis.

— Milfoje pli ol mi povus diri, ŝi respondis.

— Do neniam ci min forlasos, mi aldonis.

— Jes, neniam, ŝi daŭrigis. »

Kaj tiu certigo estis akompanita de tiom da karesoj, de tiom da ĵuroj, ke ŝajnis al mi neeble, ke ja ŝi povu iam ilin forgesi. Mi ĉiam estis konvinkita, ke ŝi estis sincera. Kian motivon ŝi estus havinta por sin falsi ĝis tia grado ? Sed ŝi estis ankoraŭ pli malserioza ; aŭ preferu ŝi ne estis plu io, kaj eĉ ŝi ne rekonis sin mem, kiam, havante antaŭ siaj okuloj virinojn, kiuj vivas en sufiĉego, ŝi troviĝis en malriĉeco kaj en bezono. Mi estis en antaŭtago, en kiu mi devis havi pro tio lastan pruvon, kiu superiris ĉiujn aliajn, kaj produktis la pli strangan aventuron, kiu iam alvenis al homo havanta mian nobelnaskiĝon kaj mian socirangon.

Ĉar mi sciis, ke ŝi havas tian humoron, mi rapidis la morgaŭan tagon aliri al Parizo. La morto de ŝia frato kaj la neceseco havi tolaĵojn kaj vestojn por ŝi kaj por mi estis tiel bonaj motivoj, ke mi ne bezonis

pretekstojn. Mi eliris el la gastejo, intencante, mi diris al Manon kaj al mia gastejmastro, preni dungitan karon : sed tio estis fanfaronajo. Ĉar neceseco min devigis piediri, mi marŝis tre rapide ĝis Cours-la-Reine ¹, kie mi intencis halti. Mi bezonis preni momenton da soleco kaj da trankvileco, por min aranĝi kaj antaŭvidi, kion mi estas faronta en Parizo.

Mi sidiĝis sur herbon. Mi eniris en maron da rezonadoj kaj da pripensadoj, kiuj iom post iom plimalgrandiĝis ĝis tri precipaj artikoloj. Mi bezonis nunan helpon por senfina nombro da nunaj necesajoj. Mi estis serĉonta ian vojon, kiu povus almenaŭ malfermi al mi esperojn al estonteco : kaj (afero ne negrava) mi devis preni informojn kaj disponojn por la sendanĝereco de Manon kaj por la mia. Elĉerpinte ĉiujn projektojn kaj ĉiujn kombinaĵojn pri tiuj tri ĉefaj temoj, mi opiniis taŭga, ke mi ankoraŭ eligu la du lastajn. Ni ne estis malbone kaŝitaj en ĉambro de Chaillot ; kaj pri estontaj bezonoj, mi kredis, ke, kiam mi estos kontentiginta la nunajn, tiam estos tempo pensi pri ili.

Do la unua demando estis, plenigi mian monujon. Sinjoro de T... malavare al mi proponis la sian ; sed min treege tedegis lin remeti mi mem sur tiun temon. Kian personon mi farus, almetante mian mizerecon al fremdulo, kaj petante de li, ke li donacu parton de sia posedaĵo ? Estas kapabla por tio nur malkuraĝa animo pro malnobleco, kiu malhelpas, ke ĝi sentu tian malindicon, aŭ humila kristano pro troeco de grandanimeco, kiu lin igas supera al tia honto. Mi estis nek malkuraĝa homo nek bona kristano ; mi estus doninta duonon de mia sango por eviti tian humilon.

1. Elparolu : *Kur'-la-Ren'*.

« Ĉu Tiberge, mi diris, ĉu bona Tiberge al mi rifuzos tion, kion li estas kapabla doni ? Ne ; li estos korduŝita de mia mizereco ; sed li min mortigos per siaj moralajoj. Mi estos devigata toleri liajn riproĉojn, liajn admonojn, liajn minacojn ; li aĉetigos de mi siajn helpojn tiel kare, ke mi donus ankoraŭ parton de mia sango, prefere ol riski tiun malgajigan scenon, kiu lasos en mi konfuzecon kaj konscienciproĉojn. Nu, mi reprenis, do mi devas forlasi ĉian esperon, ĉar ne restas al mi alia vojo ; kaj mi tiel malmulte intencas uzi ĉu la unuan ĉu la duan, ke vi volonte verŝus la duonon de mia sango por ne preni la unuan, kaj la tutecon de tiu sango por ne preni la duan. Jes, mian tutan sangon, mi aldonis post momento da pripensado, mi donus pli volonte ol min malaltigi per malaltaj preĝegoj. Sed ĉu la demando estas pri mia sango ? Ĝi estas pri la vivado kaj pri la vivigo de Manon ; ĝi estas pri ŝia amo kaj pri ŝia fideleco. Ĉu mi havas ion por meti en pesilon kontra ŝi ? Ĝis nun mi metis nenion. Ŝi por mi anstataŭas gloron, feliĉecon, riĉaĵojn. Sendube multaj aferoj estas, por kies ricevo aŭ evito mi donus mian vivon : sed estimi ion pli ol mian vivon ne estas motivo por ĝin estimi tiom, kiom Manon'on. »

Mi ne restis longan tempon por min determini laŭ tiu rezono. Mi daŭrigis mian vojiron, decidinte, ke mi iros unue al Tiberge kaj poste al sinjoro de T...

Enirante en Parizon, mi uzis fiakron, kvankam mi ne havis monon por ĝin pagi : mi konfidis al helpaĵoj, kiujn mi estas petegonta. Mi min kondukigis al Luksemburgo, kie mi sendis averti Tiberge'on, ke mi lin atendas. Li kontentigis mian malpaciencon per sia rapideco. Sen ia ŝanceliĝo, mi al li konigis la grandecon de miaj bezonoj. Li petis de mi, ĉu la cent monpistojoj, kiujn mi estis al li redoninta, al mi sufiĉos ; kaj, ne

kontraŭmetinte eĉ unu vorton de malfacileco, post unu momento li iris ilin serĉi, kun tiu malfermita ŝajno kaj tiu plezuro por donaci, kiu estas konita nur de amo kaj de vera amikeco. Kvankam mi havis nenian dubon pri la sukceso de mia peto, tamen mi estis mirigita, ĉar mi ilin ricevis tiel malkare, tio estas, sen ke li estus riproĉinta min pri mia malpento. Sed mi eraris, kredante min liberigita el liaj admonoj ; ĉar kiam li fine estis kalkulinta al mi sian monon, kiam mi jam lin ekforlasis, li petis de mi, ke mi iom promenadu kun li en aleo. Mi ne parolis al li pri Manon. Li ne sciis, ke ŝi estas libera : pro tio liaj moralajoj sin turnis nur al mia bravega forkuro for de Saint-Lazare, kaj al la timo en kiu li estis, ke, anstataŭ profiti la lecionojn de saĝeco, kiujn mi estis ricevinta en ĝi, mi ne reprenos la vojon al malordoj. Li diris, ke, irinte por min viziti al Saint-Lazare, li estis miregigita, pli ol li povus tion diri, eksciante per kia maniero mi estis elirinta ; ke li havis pri tiu temo interparolon kun la superulo ; ke la bona Patro ne estis ankoraŭ resanigita je sia teruro ; ke tamen li estis sufiĉe grandanima por kaŝi al lia polica general-leŭtenanta Moŝto la cirkonstancojn de mia eliro, kaj ke li zorgis, ke la morto de l'pordisto ne estu konita ekstere ; do ke mi havas je tiu flanko neniun motivon por timi ; sed ke, se restas en mi iom da sento al saĝeco, mi profitos tiun feliĉan aranĝon, kiun ĉielo metas en miajn aferojn ; ke mi devas komence skribi al mia patro kaj repaciĝi kun li ; kaj ke, se mi volas unufoje obei liajn konsilojn, mi revenos al hejmo de mia familio.

Mi aŭskultis lian paroladon ĝis la fino. En ĝi troviĝis multaj kontentigaj aferoj. Unue mi estis feliĉega, vidante, ke mi havas nenion por timi flanke de Saint-Lazare. Stratoj de Parizo refariĝis por mi libera lando. Due mi min gratulis, ke Tiberge havis neniun

ideon pri la liberigo de Manon, kaj pri ŝia reveno kun mi. Mi eĉ rimarkis, ke li evitis paroli pri ŝi. Mi decidis, ne ke mi revenos al mia familio, sed almenaŭ ke mi skribos al mia patro, kiel li tion konsilis, kaj ke mi al li certigos. ke mi intencas reeniri en la ordon de miaj devoj kaj de liaj voladoj. Mi esperis, ke tio lin instigos sendi al mi monon, pretekstante, ke mi faros ekzercojn en akademio; ĉar tre malfacile mi estus lin konvinkinta, ke mi intencas reveni al eklezia profesio: kaj funde mi estis neniel malŝatema por tio, kion mi volis promesi. Kontraŭe mi forte deziris penadi al io honesta kaj prudenta, tiom kiom tiu projekto povus akordiĝi kun mia amo. Mi intencis vivi kun mia amatino kaj samtempe fari miajn ekzercojn. Tiuj ambaŭ aferoj estis tute interkonsentablaj. Mi estis tiel kontenta pri ĉiuj tiuj ideoj, ke mi promesis al Tiberge, ke mi dum tiu tago mem sendos leteron al mia patro. Efektive, lin forlasinte, mi eniris en skriboficejon, kaj mi skribis laŭ tiel amema kaj tiel submetita maniero, ke, religinte mian leteron, mi esperegis, ke mi ricevos ion de la patra koro.


Kvankam, kiam mi lasis Tiberge'on, mi estis sufiĉe riĉa por dungi fiakron, tamen mi donis al mi plezuron piediri fiere, irante al sinjoro de T... Mi trovis ĝojon en tiu ekzercado de mia libereco, por kiu mia amiko al mi certigis, ke restis nenio por timi. Tamen subite revenis al mia sprito, ke liaj certigoj rilatis nur kun Saint-Lazare, sed ke mi havis sur la brakoj la aferon de Hospitalo, ne kalkulante la morton de Lescaut, en kiu mi partoprenis almenaŭ kiel atestanto. Tiu memoro min tiel forte timigis, ke mi flankeniris en la unuan aleon, en kiun mi venigis karoson. Mi iris rekte al sinjoro de T..., kiu min ridigis pro mia teruro. Ĝi ŝajnis ridinda al mi mem, kiam mi estis eksciinta, ke mi havas ion por timi nek flanke de Hospitalo, nek flanke

de Lescaut. Li diris, ke, pensante, ke oni povas suspekti, ke li partoprenis la formeton de Manon, li estis irinta tiumatene al Hospitalo, kaj ke li petis por ŝin vidi, ŝajnigante ne scii tion, kio okazis ; ke oni tiel malmulte pensis kulpigi ĉu lin ĉu min, ke oni kontraŭe rapidis al li konigi tiun aventuron kiel strangan novaĵon, kaj ke oni miris, ke knabino tiel beleta kiel Manon, estis decidinta forkuri kun lakeo ; ke li nur respondis malvarme, ke li ne miras pro tio, ĉar oni faras ĉion por libereco. Li daŭrigis, rakontante, ke de tie li iris al la domo de Lescaut, esperante trovi min kaj mian ĉarmoplenan amatinon ; ke la posedanto de la domo, kiu estas karosisto, al li certigis, ke li vidis nek ŝin nek min ; sed ke ne estas mirinde, ke ni ne eniris en lian domon, se ni devis veni tien nur por vidi Lescaut'on, ĉar sendube ni estis eksciantaj, ke li estis mortigita proksimume en la sama tempo. Antaŭ du horoj ĉirkaŭe, unu el amikoj de Lescaut, korpogardisto kiel li, venis por lin vidi, kaj al li proponis ludi. Lescaut gajnis tiel rapide, ke la alia post unu horo estis malgajninta cent skudojn, tio estas, sian tutan monon. Tiu malfeliĉulo, vidante sin sen unu monero, petis de Lescaut, ke li bonvolu prunti al li la duonon de la sumo de li perditan ; kaj pro ia malfacileco naskita de tiu okazo, ili sin disputis reciproke kun treega kolerero. Lescaut rifuzis ekstereniri por meti la spadon en la manon ; kaj la alia ĵuris, lin forlasante, ke li rompos lian kapon ; kaj li tion plenumis dum vespero mem. Sinjoro de T... havis honestecon aldoni, ke li estis estinta tre maltrankvila pri ni, kaj li daŭrigis proponi al mi siajn servojn. Mi sen ŝanceliĝo al li sciigis la lokon de nia rifuĝejo. Li petis de mi, ke mi opiniu bone, se li venus vespermanĝi kun ni.

Ĉar mi ne havis plu ion por fari, krom preni tolajojn kaj vestojn por Manon, mi diris, ke ni povas eliri

tuje, se li volas havi komplezon halti kun mi momente ĉe iaj komercistoj. Mi ne scias, ĉu li kredis, ke mi faris tiun proponon, por interesigi lian malavarecon, aŭ se tio devenis de simpla ekmovado de bela animo, sed, konsentinte eliri tuje, li min kondukis al la komercistoj, kiuj provizis lian hejmon : li elektigis de mi kelkajn teksaĵojn pli superajn valore ol tion, kion mi intencis fari ; kaj kiam mi min preparis pagi, li absolute malpermesis, ke vendisto ricevnu de mi eĉ unu moneron. Tiu ĝentilaĵo estis farita tiel afable, ke mi kredis povi profiti tion senhonte. Ni prenis kune la vojon al Chaillot, en kiun mi alvenis kun malpli da maltrankvileco, ol kiam mi estis elirinta. »

Ĉar la kavaliro des Grieux estis uzinta pli ol unu horon por fari tiun rakonton, mi petis de li, ke li iom ripozu kaj kun ni sociĝu en la vespermanĝo. Nia atento opiniigis al li, ke ni estis aŭskultintaj lin plezure. Li certigis, ke ni trovos ion ankoraŭ pli interesan en la sekvo de lia historio : kaj kiam ni estis finintaj la vespermanĝon, li daŭrigis laŭ tiuj terminoj :





PARTO DUA



ia ĉeesto kaj la ĝentilaĵoj de sinjoro de T... vaporigis ĉiun ĉagrenon, kiu povis ankoraŭ resti en Manon.

« Ni forgesu niajn pasintajn terurojn, mia kara animo, mi diris al ŝi enirante, kaj ni rekomencu vivi pli feliĉaj ol antaŭe. Sendiskuteble amo estas bona mastro. Fortuno ne povus kaŭzi tiom da malfeliĉaĵoj, kiom da plezuroj al ni gustumigis amo. »

Nia vespermanĝo estis vera sceno de ĝojo. Mi estis pli fiera kaj kontenta kun Manon kaj miaj cent monpistoloj, ol la plej riĉa partiano de Parizo kun siaj amasigitaj trezoroj. Ni devas ŝati niajn riĉaĵojn, laŭ la rimedoj de ni havigitaj por kontentigi niajn dezirojn. Inter ili, mi ne havis unu solan, kiun mi deziris efektiviĝi. Estonteco eĉ kaŭzis al mi malmulte da embaraso. Mi estis preskaŭ certa, ke mia patro faros nenian malfacilecon por doni al mi sufiĉe da mono, por ke mi vivu dece en Parizo, tial ke, ĉar mi estis en mia dudeka jaro, mi baldaŭ estos rajtigita postuli mian parton el posedaĵoj de mia patrino. Mi ne kaŝis al Manon, ke la tuteco de miaj riĉaĵoj estas nur cent monpistoloj. Tio sufiĉis, por ke

mi povu atendi facile pli bonan fortunon, kiu ŝajne ne povis manki, ĉu per miaj naturaj rajtoj, ĉu per rimedoj de ludo.

Pro tio, dum unuaj semajnoj, mi pensis nur ĝui mian situacion ; kaj, pro forto de honoro same kiel pro restaĵo de timado al polico, de tago al tago mi prokrastis rekomenci miajn rilatojn kun la kunligitoj de la hotelo de T... : mi min kontentigis, ludante en malpli malbonfamaj kunvenejoj, en kiuj favoro de l'sorto ebligis, ke mi ne bezonu min humiligi ĝis helpado de industrio. Mi pasigis en urbo parton de tagmezo, kaj mi revenis vespermanĝi en Chaillot, tre ofte akompanita de sinjoro de T..., kies amikeco por ni pligrandiĝis de tago al tago. Manon trovis rimedojn kontraŭ enuo. Ŝi socialligiĝis en najbareco kun kelkaj junaj fraŭlinoj, kiujn printempo alkondukis en tiun lokon. Promenado kaj malgrandaj ekzercoj, taŭgaj por ilia sekso, faris sinsekve ilian okupadon. Ludado, kies limojn ili reguligis, liveris monsumon por pagi veturilon. Ili iris en Boulogne'an¹ arbaron por spiri aeron : kaj en vespero, kiam mi revenis, mi retrovis Manon'on pli belan, pli kontentan, pli pasiplenan, ol iam ajn ŝi estis.

Tamen altiĝis kelkaj nuboj, kiuj ŝajnis minaci la konstruaĵon de mia feliĉeco. Sed ili malkonfuzo vaporigis ; kaj la petola humoro de Manon igis la finon tiel komika, ke mi trovas ankoraŭ dolĉecon en memoro, kiu al mi prezentas ŝian amemon kaj la agrablecon de ŝia spirito.

La sola servisto, kiu faris nian servistaron, iam min prenis aparte por diri, kun multe da embaraso, ke li havas tre gravan sekreton por konigi al mi. Mi lin

1. Elparolu : *Bulouj*.

kuraĝigis, ke li parolu libere. Post kelkaj ŝanceliĝoj, li komprenigis al mi, ke fremda sinjorego ŝajnis kaptita de granda amo al fraŭlino Manon. La konfuzo de mia sango sin sentigis en ĉiuj miaj vejnoj.

« Ĉu ŝi sentas samon al li? mi interrompis pli rapide, ol ebligis prudento por min sciigi. »

Mia eksciteco lin timigis. Li respondis kun mieno maltrankvila, ke lia sagaceco ne iris tiel malproksimen : sed, rimarkinte, ke de kelkaj tagoj tiu fremdulo venas senmanke en Boulogne'an arbaron, ke li malsupreniras el sia karoso kaj eniras sola en flankan aleon, ŝajnante serĉi okazon por vidi aŭ renkonti la fraŭlinon, li havis ideon, sin kunligi kun liaj servistoj, por ekscii de ili la nomon de ilia mastro, kun kiu ili agas kiel kun itala princo, kaj ke ili mem suspektis ian aman aventuron : li ne povis ricevi aliajn sciigojn, li aldonis tremante, tial ke la princo tiam estis elirinta el arbaro, kaj alpaŝinte al li senfierece, estis petinta de li lian nomon ; poste, kvazaŭ li estus diveninta, ke li partoprenas nian servistaron, li lin gratulis, ke li apartenas al la plej ĉarmoplena persono de la tuta mondo.

Mi malpacience atendis la sekvon de tiu rakonto. Li ĝin finis per timoplenaj senkulpigoj, kiuj, laŭ mia opinio, nur estis kaŭzitaĵoj de miaj malprudentaj agitaĵoj. Vane mi lin instigis, ke li daŭrigu, nenion kaŝante. Li al mi certigis, ke li scias nenion plu, kaj ke, ĉar tio, kion li al mi ekrakontis, estis okazinta dum la antaŭa tago, li ne estis revidinta la servistojn de l'princo. Mi lin kuraĝigis ne nur per laŭdoj, sed plie per grava rekompenco : kaj, ne montrante eĉ la plej malgrandan malfidon al Manon, mi al li rekomendis per plej trankvila tono, ke li observu ĉiujn klopodojn de la fremdulo.

Funde lia teruro lasis en mi kruelajn dubojn. Eble ĝi estis kaŭzo, ke li silentis pri parto de vero. Tamen

post kelkaj pripensoj, min tiel forlasis miaj timadoj, ke mi sentis bedaŭron, ĉar mi estis doninta tiun signon de malforteco. Mi ne povis fari al Manon krimon, ke ŝi estas amata. Tre verŝajne ŝi ne konis sian triumfon : kaj kian vivon mi havos, se mi estas kapabla malfermi tiel facile al ĵaluzeco la enirejon de mia koro ? La morgaŭan tagon mi revenis Parizon, havante nenian projekton krom rapidigi la progreson de mia fortuno, ludante pli gravajn monsumojn, por ke, estante pli riĉa, mi povu sen malfacileco forlasi Chaillot'on, tuj kiam io ajn min maltrankviligos. Vespere mi eksciis nenion kapablan malutili al mia ripozo. La fremdulo estis reveninta en Boulogne'an arbaron : kaj kredante sin rajtigita, per tio, kio okazis en antaŭtago, alpaŝi al mia konfidenciulo, li parolis al li pri sia amo, sed laŭ terminoj, kiuj konjektis nenian konsenton kun Manon. Li lin demandis pri mil detaloj. Fine li provis lin interesi al siaj projektoj, promesante gravegan rekompencon ; kaj, eltirinte leteron, kiun li tenis preta, vane al li proponis kelkajn luidorojn, por ke li ĝin donu al sia mastrino.

Du tagoj pasis sen alia okazintaĵo. La tria estis pli ventega. Mi eksciis, revenante el urbo iom malfrue, ke Manon, dum sia promenado, sin disigis momente for de siaj kunulinoj, kaj ke, ĉar la fremdulo, kiu ŝin sekvis laŭ malgranda interspaco, alproksimiĝis al ŝi post signo farita de ŝi, ŝi al li donis leteron, kiun li ricevis kun ĝojoplenaj elmontroj. Sed li havis tempon ilin montri, nur kisante la literojn, ĉar tuje ŝi estis forkurinta. Sed ŝi ŝajnis eksterordinare ĝoja dum restaĵo de l' tago ; kaj de kiam ŝi estis veninta hejmen, tiu humoro ne ŝin forlasis. Kompreneble mi tremetis je ĉia vorto.

« Ĉu vi estas certa, mi diris malĝoje al mia servisto, ke viaj okuloj vin ne erarigis ? »

Li prenis ateste ĉielon pri sia bonfido. Mi ne scias al kio la turmentoj de mia koro min estus fortirintaj, se Manon, kiu aŭdis min revenantan, ne estus alkurinta al mi kun ŝajno de malpacienco kaj plendoj pro mia malrapideco. Ŝi ne atendis mian respondon por min premi per karesoj ; sed kiam ŝi vidis sin solan kun mi, ŝi min fortege riproĉis, ke mi kutimas reveni tiel malfrue. Ĉar mia silento al ŝi lasis liberecon por daŭrigi, ŝi diris, ke de tri semajnoj mi ne pasigis tagon tutan kun ŝi ; ke ŝi ne povas toleri tiel longajn forestadojn ; ke ŝi petas almenaŭ unu tagon de tempo al tempo, kaj ke morgaŭ ŝi volas min vidi apud ŝi de mateno ĝis vespero.

« Mi ĉeestos tie ĉi, ne dubu pri tio, mi respondis per tono iom kolereta. »

Ŝi ne ŝajnis multe atenti mian ĉagrenon ; kaj en ekmovado de ĝojo, kiu efektive ŝajnis al mi strange vivega, ŝi faris mil plaĉindajn pentraĵojn pri la maniero laŭ kiu ŝi pasigis tagon.

« Stranga knabino, mi diris al mi mem : kion mi devas atendi de tia komenco ? »

La aventuro de nia unua disigo revenis en mian spiriton. Tamen mi kredis vidi en la fundo de ŝia ĝojo kaj de ŝiaj karesoj signojn de vereco, kiuj akordiĝis kun ŝajnoj.

Ne estis malfacile al mi alĵeti la malĝojecon, kontraŭ kiu mi ne povis min defendi dum vespermanĝo, sur malgajnon, kiun mi estis farinta en la ludado. Mi konsideris kiel tre profitplene por mi, ke la ideo ne forlasi Chaillot'on dum sekvanta tago estu deveninta de ŝi mem. Tio al mi gajnis tempon por miaj decidoj. Mia ĉeesto forigis ĉiuspecajn timadojn por la morgaŭo : kaj se mi rimarkos nenion, kiu min devigos eksplodigi miajn eltrovojn, mi jam estis decidinta, ke en la posta tago

mi transportos mian loĝejon en urbon, en kvartalon, en kiu mi havos nenian konatiĝon kun princoj. Tiu aranĝo al mi igis pasigi nokton pli trankvilan : sed ĝi ne demetis de mi la doloron, ke mi estu rajtigita tremi por ia nova malfideleco.

Kiam mi vekigis, Manon al mi anoncis, ke, kvankam mi pasigos tagon en mia apartamento, tamen ŝi pretendas, ke pro tio mi ne havu ŝajnon pli malordigitan ol kutime, kaj ke ŝi volas, ke miaj haroj estu preparitaj de ŝia propra mano. Ili estis tre belaj. Tio estis amuzo, kiun kelkafoje ŝi donis al si. Sed ŝi alportis pli da zorgoj, ol mi neniam ŝin vidis fari en tiu okupado. Por ŝin kontentigi mi estis devigita sidiĝi antaŭ ŝian tualet-tablon kaj toleri ĉiujn malgrandajn serĉadojn, kiujn ŝi provis por min plibeligi. Dum ŝi laboradis, ofte ŝi turnigis mian vizaĝon al si : kaj apogante siajn ambaŭ manojn sur miajn ŝultrojn, ŝi min rigardis kun avida sciivoleco. Poste montrinte sian kontenton per unu aŭ du kisadoj, ŝi reprenigis de mi mian staton por daŭrigi sian agon. Tiu petolaĵo nin okupis ĝis horo de tagmanĝo. La fervoro, per kiu ŝi tion faris, ŝajnis al mi tiel natura, kaj ŝia gajeco tiel malmulte odoris artifikon ke, ne povante akordigi ŝajnojn tiel konstantajn kun projekto de nigra perfido, pli ol unu fojon mi estis tentita malfermi al ŝi mian koron, kaj min liberigi el ŝarĝo, kiu komencis min pezi. Sed ĉiumomente mi esperis, ke tiu malfermigo venos de ŝi, kaj antaŭtempe mi faris al mi pri tio feliĉegan triumfon.

Ni reeniris en ŝian tualetejon. Ŝi ekreordigis miajn harojn ; kaj pro komplezo mi estis cedanta al ĉiuj ŝiaj voladoj, kiam oni venis nin averti, ke la princo de... petas por ŝin vidi. Tiu nomo min varmigis ĝis kolero.

« Kion do ? mi ekkriis, ŝin repuŝante, kiu ? kia princo ? »

Si ne respondis al miaj demandoj.

« Lin suprenirigu, ŝi diris malvarme al la lakeo. »

Kaj sin turnante al mi :

« Kara amato, kiun mi adoras, ŝi daŭrigis per ensorĉanta tono, mi petas de ci unu momenton de komplezo. Unu momenton, unu solan momenton. Pro tio, mi cin amos milfoje pli. Pri tio mi estos dankema dum mia tuta vivado. »

Indigno kaj miro ligis mian langon. Si ripetis siajn petegojn ; kaj mi serĉis esprimojn por ilin forĵeti kun malestimo. Sed, aŭdante, ke la pordo de l'antaŭĉambro malfermiĝas, ŝi ekkaptis per unu mano miajn harojn, kiuj flirtis sur miaj ŝultroj, prenis per alia sian tualetan spegulon, uzis sian tutan forton por min treni en tiu stato ĝis pordo de l'tualetejo, kaj ĝin malferminte per genuo, montris al la fremdulo, kiun verŝajne bruo estis haltiginta en mezo de ĉambro, vidaĵon, kiu kredeble kaŭzis al li grandan miron. Mi vidis viron tre bele vestitan, sed kiu havis malnoblan mienon. Kvankam tiu sceno lin embarasis, tamen li faris profundan reverencon. Manon ne lasis al li tempon malfermi lian buŝon. Si prezentis al li la spegulon.

« Vidu, sinjoro, ŝi diris ; rigardu vin bone, kaj estu justa pri mi. Vi petas de mi amon. Jen estas la viro, kiun mi amas, kaj kiun mi ĵuris ami dum mia tuta vivado. Lin komparu kun vi mem. Se vi kredas, ke vi povas disputi al li mian koron, konigu do al mi sur kian fundamenton vi vin apogas ; ĉar mi certigas vin, ke por okuloj de via tre humila servantino, ĉiuj italaj princoj ne valoras unu el haroj, kiujn mi tenas. »

Dum tiu malsaĝa parolado, kiun sendube ŝi estis meditinta, mi faris senutilajn penadojn por min liberigi : kaj sentante kompaton al viro konsiderinda, mi sentis min ema ripari tiun insulteton per miaj ĝentil-

aĵoj. Sed, ĉar li retrovis facile sian spiritĉeeston, lia respondo, kiun mi opiniis malafabla, al mi perdigis tiun inklinon.

« Fraŭlino, fraŭlino, li diris kun malbonkora rideto, efektive mi malfermas okulojn, kaj mi trovas vin multe malpli novica, ol mi tion figuris al mi. »

Li tuj eliris, ne ĵetinte rigardon al ŝi, kaj aldonante per voĉo mallaŭta, ke francaj ne pli valoras ol italaj virinoj. Nenio min instigis, ke en tiu okazo mi inspiru al li pli bonan ideon pri la bela sekso.

Manon lasis miajn harojn, sin ĵetis en apogseĝon kaj sonorigis la ĉambron per longaj ridegoj. Mi ne kaŝos, ke mi estis tuŝita ĝis fundo de l'koro per ofero, kiun mi povis alkalkuli nur al amo. Tamen la petolaĵo ŝajnis al mi supermezura. Mi ŝin riproĉis pri tio. Ŝi rakontis, ke mia konkuranto, ŝin sieĝadinte dum kelkaj tagoj en Boulogne' a arbaro kaj diveniginte de ŝi siajn sentojn per grimacoj, decidis, ke li faros al ŝi malkaŝitan amkonfeson, akompanitan de lia nomo kaj de ĉiuj liaj titoloj, en letero, kiun li al ŝi donigis per la veturigisto, kiu kondukis ŝin kaj ŝiajn kunulinojn ; ke li promesis trans montoj brilan fortunon kaj eternan adoradon ; ke ŝi estis reveninta en Chaillot'on, decidinte, ke ŝi konigos al mi tiun aventuron, sed ke, pripensante, ke ni povos eltiri el tio ian amuzaĵon, ŝi ne povis kontraŭbatali sian imagon ; ke ŝi donis al la itala princo, per flatanta respondo, la liberecon ŝin vidi en ŝia hejmo, kaj ke ŝi faris al si duan plezuron, min enirigante en sian planon, ne naskiginte en mi eĉ la plej malgrandan suspekton. Mi ne diris al ŝi eĉ unu vorton pri la sciigoj al mi alvenintaj per alia vojo ; kaj ebrieco de triumfanta amo ĉion forgesigis al mi.

Mi rimarkis, en mia tuta vivo, ke ĉiam ĉielo elektis, por min frapi de siaj plej dolorigaj punoj, la tempon

en kiu mia fortuno ŝajnis plej firme starigita. Mi min kredis tiel feliĉa kun amikeco de S-ro de T... kaj kun amemo de Manon, ke neniu estus povinta komprenigi de mi, ke mi estis timonta ian novan malfeliĉon. Tamen unu prepariĝis, tiel pereiga, ke ĝi min malsuprenirigis ĝis la stato, en kiu vi min vidis en Pacy, kaj iom post iom ĝis ekstremoj tiel plorindaj, ke vi malfacile kredos mian fidindan rakonton.

Ian tagon, en kiu ni havis sinjoron de T... kiel kunvespermanĝanton, ni aŭdis bruon de karoso, kiu haltis ĉe la pordo de la gastejo. Scivolo al ni dezirigis koni, kiu povas alveni en tiu horo. Oni diris al mi, ke ĝi estas la juna G... M..., tio estas la filo de nia plej kruela malamiko, de tiu maljuna diboĉulo, kiu metis min en Saint-Lazare'on kaj Manon'on en Hospitalon. Lia nomo suprenirigis ruĝecon al mia vizaĝo.

« Estas ĉielo, kiu lin alkondukas, mi diris al sinjoro de T..., por lin puni pri la malkuraĝeco de lia patro. Li ne min forkuros, antaŭ kiam ni estos mezurintaj niajn spadojn. »

Sinjoro de T..., kiu lin konis kaj kiu eĉ estis unu el liaj plej bonaj amikoj, penadis por prenigi de mi aliajn sentojn al li. Li certigis, ke li estas tre aminda junulo, tute nekapabla esti partopreninto en la ago de lia patro ; kaj ke, tuj kiam mi estos vidinta lin dum unu momento, tuj mi donos al li mian estimon kaj petos de li la lian. Post kiam li estis aldoninta mil aferojn laŭdplenajn por li, li petis de mi, ĉu mi konsentus, ke li iros proponi al li, ĉu li volas preni lokon apud ni kaj sin kontentigi per la restaĵo de nia vespermanĝo. Li refutis tiun pripenson, ke estus danĝere por Manon malkovri nian loĝejon al la filo de nia malamiko, ĵurante sur sian honoron kaj sian bonfidon, ke kiam li nin konos, ni ne havos plu pli fervoran defendanton. Post tiaj cert-

igoj, mi faris kompreneble nenian malfacilecon. Sinjoro de T... lin alkondukis al ni, nur kiam li estis preninta momenton, por al li sciigi, kiaj ni estas. Li eniris kun ŝajno, kiu lin igis favora al ni. Li min kisis. Ni sid-iĝis. Li admiris Manon'on, min, ĉion, kio al ni apartenas, kaj manĝis kun apetito, kiu faris honoron al nia vespermanĝo. Kiam oni estis senmanĝilariginta la tablon, la interparolado fariĝis pli serioza. Li mallevis okulojn por paroli pri la malĝentilaĵoj, kiujn uzis lia patro kontraŭ ni. Li faris al ni la plej submetitajn senkulpigojn.

« Mi ilin mallongigas, li diris, por ne renovigi memoron, kiu kaŭzas al mi tro da honto. »

Se tiuj bedaŭroj estis sinceraj en komenco, ili fariĝis poste multe pli tiaj : ĉar apenaŭ li estis pasiginta duonon da horo en tiu interparolado, tuj mi ekvidis la impreson, kiun faris al li la ĉarmoj de Manon. Liaj rigardoj kaj liaj manieroj iom post iom dolĉiĝis. Tamen en liaj paroladoj li nenion preterlasis ; sed kvankam ĵaluzeco ne min helpis, tamen mi estis tro sperta en amaj aferoj, por ne rimarki tion, kio devenis de tiu fonto. Li kun ni sociiĝis dum parto de nokto, kaj li lasis nin, nur kiam li estis sin gratulinta pri nia konatiĝo, petinte de ni permeson, ke li kelkafoje renovigos la prezenton de siaj servoj. Li eliris matene kun sinjoro de T..., kiu eniris kun li en lian karoson.

Mi sentis, kiel mi jam diris, nenian emon al ĵaluzeco. Pli ol neniam mi havis kredemon al ĵuroj de Manon. Tiu ĉarma kreitaĵo estis tiel absolute estrino de mia animo, ke mi ne havis eĉ la plej malgrandan senton, kiu ne estas estimo kaj amo. Ne nur mi ne faris al ŝi krimon, ke ŝi plaĉis al la juna G... M..., sed plie mi estis ravita pri efiko de ŝiaj ĉarmoj, kaj mi gratulis min, ke mi estas amata de knabino, kiun ĉiuj homoj

trovas aminda. Mi eĉ ne juĝis taŭge konigi al ŝi miajn suspektojn. Ni estis okupitaj dum kelkaj tagoj pro zorgo alĝustigi ŝiajn vestojn, kaj konsiliĝi, ĉu ni povos iri al komediejo sen timo, ke oni nin rekonos. Sinjoro de T... revenis nin vidi antaŭ la fino de la semajno ; ni lin demandis pri tio. Li bone vidis, ke necese estas jesi por plezurigi al Manon. Ni decidis, ke ni iros en ĝin kun li en la vespero mem.

Tamen tiu decido ne povis efektiviĝi ; ĉar, min altirinte tuje aparten :

« De kiam mi vidis vin, li diris, mi estas en plej granda embaraso ; kaj la vizito, kiun mi faras al vi estas sekvo de tio. G... M... amas vian amatinon. Li faris al mi pri tio konfidencion. Mi estas lia intima amiko kaj tute preta lin servi ; sed mi estas same la via. Mi konsideris, ke liaj intencoj estas maljustaj, kaj mi ilin kondamnis. Mi estus konservinta lian sekreton, se li intencus uzi por plaĉi nur komunajn vojojn ; sed li estas tre bone informita pri la humoro de Manon. Li sciis, mi ne scias kiamaniere, ke ŝi amas sufiĉegon kaj plezuron, kaj ĉar li ĝuas grandegajn riĉaĵojn, li konigis al mi, ke li volas ŝin tenti unue per granda donaco kaj per la propono de dek mil monfuntoj da pensio. Se ambaŭ aferoj estus estintaj egalaj, eble mi estus devinta fari al mi multe pli da perforto por lin perfidi : sed, por via profito, justeco kuniĝis kun amikeco, des pli ke, ĉar mi estis la malprudenta kaŭzo de lia pasio, lin enkondukinte ĉi tien, mi estas ju pli devigata antaŭmalhelpi efikojn de malbonaĵo, kiun mi okazigis. »

Mi dankis sinjoron de T... pro tiel gravega servo, kaj mi konfesis, kun perfekta reveno al la konfido, ke la karaktero de Manon estas tia, kian G... M... ĝin figuras al si ; tio estas, ke ŝi ne povas toleri la nomon de malriĉeco.

« Tamen, mi diris, tiel longe kiam la demando estos pri la plio aŭ la malplio, mi ne kredas ŝin kapabla min forlasi por aliulo. Mi estas en situacio tia, ke nenio mankos al ŝi ; kaj mi esperas, ke mia riĉeco pligrandiĝos de tago al tago. Mi timas nur unu aferon, mi aldonis ; ĝi estas, ke G... M... utiligu la konon, kiun li havas pri nia loĝejo, por fari al ni kelkan malbonaĵon. »

Sinjoro de T... certigis al mi, ke mi devas esti sen timo pri tiu flanko ; ke G... M... estas kapabla de ama malsaĝaĵo, sed ne de malnoblaĵo ; ke se li havus malkuraĝecon tion plenumi, li estos la unua, li, kiu parolas, por lin puni kaj sekve ripari la malfeliĉon, kies kaŭzo li bedaŭrinde estis.

« Mi estas danka al vi pri tiu sento, mi daŭrigis ; sed la malbonaĵo estus farita kaj la kuracilo treege necerta. Pro tio la plej saĝa rimedo estas ĝin antaŭbatali kaj forlasi Chaillot'on por preni alian loĝejon.

— Jes, respondis sinjoro de T..., sed vi malfacile tion plenumos tiel rapide, kiel tio estus necesa ; ĉar G... M... devas alveni ĉi tien je la tagmezo : li diris tion al mi hieraŭ : estas tio, kio min instigis veni tiel frumatene, por vin informi pri liaj projektoj. Li povas alveni ĉiun momente. »

Sciigo tiel instigita rigardigis de mi tiun aferon per pli serioza okulo. Ĉar ŝajnis al mi neeble eviti la viziton de G... M..., kaj, ĉar kredeble estus same neeble malhelpi, ke li konigu al Manon siajn projektojn, mi decidis, ke mi mem ŝin informos pri la intencoj de tiu nova konkuranto. Mi imagis, ke, kiam ŝi scios, ke mi estas informita pri la proponoj, kiujn li faros al ŝi, kaj kiujn ŝi ricevos antaŭ miaj okuloj, ŝi havos sufiĉe da forto por ilin forĵeti. Mi malkovris miajn pensojn al sinjoro de T..., kiu respondis, ke tio estas treege delikata.

« Mi tion konfesas, mi diris ; sed ĉiujn motivojn, kiujn oni povas havi pri la fideleco de amatino, mi havas ; kaj mi povas fidi al amemo de la mia. Nur la grandeco de proponoj povus ŝin ŝanceli ; kaj mi diris al vi, ke ŝi ne konas avarecon. Ŝi amas sian konfortecon ; sed ŝi amas min same : kaj en la situacio, en kiu estas miaj aferoj, mi ne povas kredi, ke ŝi preferos al mi la filon de viro, kiu ŝin metis en Hospitalon. »

Unuvorte mi persistis en mia projekto ; kaj min direktinte aparten kun Manon, mi al ŝi konigis nature ĉion, kion mi estis eksciinta antaŭ nelonge.

Ŝi min dankis pro la bona opinio, kiun mi havas pri ŝi ; kaj ŝi promesis, ke ŝi ricevos la proponojn de G... M... per maniero, kiu deprenos de li ĉian deziron ilin renovigi.

« Ne, mi diris ; oni ne devas lin kolerigi per malafablaĵoj : li povas malutili al ni. Sed ci scias sufiĉe bone, friponino, mi aldonis ridante, kiamaniere cin liberigi el malagrabra kaj maloportuna amanto. »

Ŝi rediris, revinte iomete :

« Al mi alvenas mirinda projekto, ŝi ekkriis ; kaj mi estas tute glora pri tiu elpenso. G... M... estas la filo de nia plej kruela malamiko ; mi volas nin venĝi je la patro, ne sur la filon, sed sur lian monujon. Mi volas lin aŭskulti, akcepti liajn donacojn, kaj poste lin moki.

— La projekto estas beleta, mi diris ; sed ci ne pripensas, mia kompatinda infanino, ke ĝi estas la vojo, kiu nin kondukis rekte al Hospitalo. »

Vane mi al ŝi prezentis la danĝerojn de tiu entrepreno : ŝi diris, ke nur sufiĉas bone preni siajn mezurojn, kaj ŝi respondis al ĉiuj miaj kontraŭparoloj. Montru al mi amanton, kiu ne blinde eniras en ĉiujn kapricojn de adorata amatino, kaj mi konsentos, ke mi estis malprava, cedante tiel facile. Ni decidis, ke ni faros

G... M... 'on nia moktrompito: kaj per stranga maliĝo de mia sorto, estas mi, kiu fariĝis la lia.

Ni vidis lian karoson aperantan proksimume je la dekunua. Li faris komplimentojn tre laboritajn pri la libereco, kiun li prenas, venante tagmanĝi kun ni. Li ne miris, trovante sinjoron de T..., kiu promesis al li, la antaŭtagon, ke li venos ankaŭ, kaj kiu ŝajnis kelkajn aferojn por sin liberigi el veturado en la sama kaleŝo. Kvankam neniu inter ni ne portis perfidon en sia koro, tamen ni altablighis kun ŝajno de konfido kaj de amikeco. G... M... trovis facile okazon konigi al Manon siajn sentojn. Mi ne devis ŝajni al li ĝenanta; ĉar mi intence forestis dum kelkaj minutoj. Kiam mi revenis, mi ekvidis, ke oni ne lin senesperigis per troeco da severeco. Li montris grandan gajecon: mi ŝajnis afekte saman kontenton: interne li ridis pro mia naiveco, kaj mi pro la lia. Dum la tuta tagmezo, ni ludis unu por la alia tre agrablan scenon. Mi ebligis por li ankoraŭ, antaŭ lia eliro, momenton de privata interparolo kun Manon; kaj sekve li povis sin gratuli, tiom pro mia komplezo kiom pro la bongusta manĝaĵo.

Tuj kiam li estis enkarosiĝinta kun sinjoro de T..., Manon alkuris al mi kun brakoj malfermitaj, ridegante. Ŝi ripetis liajn paroladojn kaj liajn proponojn, ne ŝanĝante eĉ unu vorton. Ili konsistis el tio: li ŝin adoras; li volas partopreni kun ŝi kvardek mil monfuntojn da rento, kiujn li ĝuas nun, ne kalkulante tion, kion li esperas ricevi post morto de lia patro. Ŝi estos estrino de lia koro kaj de liaj riĉaĵoj; kaj kiel garantiaĵon de siaj bonfaroj, li estas preta doni al ŝi karoson, meblitan hotelon, ĉambristinon, tri lakeojn kaj kuiriston.

« Jen estas filo, mi diris al Manon, multe pli malavara ol lia patro. Ni parolu malkaŝe, mi aldonis; ĉu tia propono ne vin tentas?

— Min ? ŝi respondis, almezurinte al sia penso tiujn du versojn de Racine,

*Min ? Vi min suspektas de tia perfido ?
Mi povus toleri malaman vizagon,
Kiu memorigus ĉiam Hospitalon.*

— Ne, mi respondis, daŭrigante parodion,

*Mi ne povus kredi ja, ke Hospitalo
Estas amsageto fiksita en koro. »*

Sed estas sago tre alloganta meblita hotelo kun karoso kaj tri lakeoj ; kaj amo havas malmulte da tiel potencaj armiloj. Ŝi certigis, ke ŝia koro estas al mi por ĉiam, kaj ke ĝi neniam akceptos aliajn sagojn ol la miajn.

« La promesoj, kiujn li faris al mi, ŝi diris, estas pli pikilo de venĝo, ol sago de amo. »

Mi petis de ŝi, ĉu ŝi intencas akcepti hotelon kaj karoson. Ŝi respondis, ke ŝi postulas nur lian monon. La malfacileco estis ricevi unu sen la alia. Ni decidis, ke ni atendos la plenan klarigon de la projekto de G... M..., en letero, kiun li promesis skribi al ŝi. Efektive ŝi ĝin ricevis, la morgaŭon, per lakeo sen livreo, kiu tre lerte trovis okazon por paroli al ŝi for de atestantoj. Ŝi diris al li, ke li atendu ŝian respondon, kaj tuj ŝi alportis al mi lian leteron. Ni ĝin malfermis kune. Plie de komunaj esprimoj de amemo, ĝi enhavis la detalon de promesoj faritaj de mia konkuranto. Li ne limigis sian elspezon. Li promesis, ke li kalkulos al ŝi dek mil frankojn, kiam ŝi prenos posedon de la hotelo, kaj ke li tiel riparos la malpliigon de tiu monsumo, ke ŝi ĉiam havos ĝin plenan antaŭ si per kalkuleblaj moneroj. La

tago, en kiu tiu hotelo malfermiĝos ne estis tre malproksima. Li petis nur du aŭ tri tagojn por la preparoj, kaj li donis la nomon de la strato enhavanta la hotelon, en kiu li promesis, ke li ŝin atendos dum la tagmezo de la dua tago, se ŝi povas sin liberigi el miaj manoj. Tio estis la sola punkto, pri kiu li ŝin petegis, ke ŝi lin trankviligu ; li ŝajnis certa pri la tuta cetero, sed li aldonis, ke se ŝi antaŭvidas ian malfacilaĵon por min forkuri, li trovos rimedon por igi ŝian forkuron facila.

G... M... estis pli ruza, ol lia patro. Li volis teni ŝian akiron, antaŭ kiam li kalkulos siajn monerojn. Ni diskutis pri la konduto, kiun Manon devos uzi. Mi multe penadis por eligi el ŝia kapo tiun entreprenon, kaj mi montris al ŝi ĉiujn ĝiajn danĝerojn... Nenio estis kapabla ŝanceli ŝian decidon.

Ŝi faris al G.. M.. mallongan respondon, por certigi al li, ke ŝi trovos nenian malfacilecon por iri Parizon en la tago montrita, kaj ke li povas ŝin atendi kun certeco. Ni decidis poste, ke mi eliros tuje por lupreni novan loĝejon en vilaĝo ĉe alia flanko de Parizo, kaj ke mi transportos kun mi mian malgrandan meblaron ; ke, dum la morgaŭa tagmezo, kiu estis la tago de ŝia kunveno, ŝi veturos frue al Parizo ; ke, post kiam ŝi estos ricevinta la donacojn de G... M..., ŝi petos de li insiste, ke li konduku ŝin al la komediejo, prenos sur sin kiel eble plej multe da tiu monsumo, kion ŝi povos porti, kaj ŝarĝos per restaĵo mian serviston, per kiu ŝi volis sin akompanigi. Li estis ĉiam la sama, kiu ŝin liberigis el Hospitalo, kaj estis treege koralligita al ni. Mi devis min trovi en fiakro, komence de la strato Saint-André-des-Arcs ¹, kaj ĝin lasi en tiu loko, je la sepa,

1. Elparolu : *Sint-Andre-des-Ark'*.

por min direkti tra la senlumaĵo ĝis la pordo de komedi-ejo. Manon promesis, ke ŝi elprenos pretekstojn, por eliri momente el sia loĝio, kaj ilin uzos por malsupreniri kaj min realiri. La plenumo de restaĵo estis facila. Post momento, ni estus retrovintaj nian fiakron kaj elirintaj el Parizo per antaŭurbo Saint-Antoine ², kiu estis vojo al nia nova loĝejo.

Tiu projekto, kvankam ĝi estis malsaĝaĵo, tamen ŝajnis al ni sufiĉe bone aranĝita. Sed funde en ĝi troviĝis tiel malprudenta nesingardemo, ke kiam eĉ ĝi estus plej bone sukcesinta, tamen neniam ni estus povintaj nin ŝirmi el konsekvencoj. Tamen ni ĝin riskis kun la plej multimema konfido. Manon foriris kun Marcel ³ : tiel nomiĝis nia servisto. Mi diris al ŝi, ŝin kisante :

« Manon, ĉu vi ne trompos min ? ĉu vi estos fidela al mi ? »

Ŝi ameme plendis pro mia malfido kaj renovigis ĉiujn siajn jurojn.

Sia intenco estis alveni Parizon je la tria. Mi eliris kun ŝi. Mi iris enuegi, la restaĵon de tagmezo, en la kafejo de Feré, je ponto Saint-Michel ⁴. Mi en ĝi restis ĝis nokto. Mi tiam eliris el ĝi por preni fiakron, kiun mi atendigis laŭ mia projekto, en komenco de la strato Saint-André-des-Arcs ; poste mi trafis piede la pordon de komedi-ejo. Mi miris, ne trovante Marcel'on, kiu devis esti ĉi tie, min atendente. Mi havis paciencon dum unu horo, kaŝite meze de aro da lakeoj, havante okulon malfermitan al ĉiuj pasantoj. Fine, ĉar la sepa estis sonorinta, kaj ĝis nun mi estis vidinta nenion, kio rilatas kun niaj projektoj, mi prenis parterbileton por vidi, ĉu mi mal-

2. Elparolu : *Sint-Antoan'*.

3. Elparolu : *Marsel*.

4. Elparolu : *Sin-Miŝel*.

kovros Manon'on kaj G... M...'on en la loĝioj. Nek unu nek alia troviĝis en ili. Mi revenis al la pordo, ĉe kiu mi pasigis ankoraŭ kvaronon da horo, agitegita de malpacienco kaj de maltrankvileco. Ekvidinte nenion aperantan, mi reeniris al mia fiakro, ne povante halti en la plej malgranda decido. Kiam la veturigisto min ekvidis, li faris kelkajn paŝojn al mia renkonto, por diri al mi kun mistera ŝajno, ke de unu horo beleta fraŭlino min atendas en la fiakro ; ke ŝi min portretis per signoj tielaj, ke li tre bone min rekonis, kaj ke, kiam ŝi sciis, ke mi baldaŭ revenos, ŝi diris, ke ŝi min atentos sen malpacienco. Mi tuj figuris al mi, ke ŝi estas Manon. Mi alproksimiĝis. Sed mi vidis beletan malgrandan vizaĝon, kiu ne estis la ŝia. Ŝi estis fremdulino, kiu petis unue, ĉu ŝi ne havas honoron paroli kun kavaliro des Grioux. Mi diris, ke tia estas mia nomo.

« Mi havas leteron por doni al vi, ŝi diris, kiu vin informos pro la motivo, kiu min alkondukas, kaj pro kiaj cirkontancoj mi havas honoron koni vian nomon. »

Mi petis de ŝi, ke ŝi donu al mi tempon necesan por ĝi legi en apuda drinkejo. Ŝi volis min sekvi, kaj al mi konsilis, ke mi petu apartan ĉambron.

« De kiu venas tiu letero ? mi diris, ĝin montrante. »

Ŝi respondis, ke mi ĝin legu.

Mi rekonis la skribecon de Manon. Jen estas proksimume tio, kion ŝi diris. G... M... ŝin ricevis kun ĝentileco kaj luksegeco, kiu preteriris ĉiujn ideojn. Li ŝin plenigis je donacoj. Li al ŝi promesis sorton de reĝino. Ŝi tamen certigis al mi, ke ŝi ne min forgesas meze de tiuj novaj miregindaĵoj, sed ke, ĉar ŝi ne povis konsentigi de G... M..., ke li ŝin konduku tiuvespere al komediejo, ŝi remetas al alia tago la plezuron de mia vizito, kaj ke, por min iom konsoli pri la ĉagreno, kiun ŝi antaŭ-

vidas, ke tiu novaĵo kaŭzos al mi, ŝi trovis rimedon havigi al mi unu el la plej beletaj Parizaj knabinoj, kiu estas la portantino de tiu bileto.

«*Subskribite, via fidela amantino, MANON LESCAUT.*»

Troviĝis en tiu letero io tiel kruela kaj tiel insulta por mi, ke, dum ia tempo restinte pendanta inter kolero kaj doloro, mi provis fari penadon por eterne forgesi mian maldankeman kaj ĵurrompintan amatinon, kaj ĵetis rigardon al la knabino, kiu estis antaŭ mi. Ŝi estis treege beleta; kaj mi estus dezirinta, ke ŝi estus estinta sufiĉe tia, por igi min ĵurrompinta kaj malfidela miavice: sed mi ne trovis en ŝi tiujn delikatajn kaj amoplenajn okulojn, tiun dian iradon, tiun vizaĝkoloron pentritan de amo mem, fine tiun ne elĉerpeblan aron da ĉarmoj, kiujn naturo malŝparis al la perfida Manon.

« Ne, ne, mi diris, ĉesante ŝin rigardi, la maldankulino, kiu vin sendas, tre bone sciis, ke ŝi farigas al vi senutilan klopodon. Revenu al ŝi, kaj diru, parolante anstataŭ mi, ke ŝi ĝuu sian krimon, kaj ke ŝi ĝin ĝuu se eble sen konscienciproĉoj; mi ŝin forlasas sen espero de reveno, kaj samtempe mi forlasas ĉiujn virinojn, kiuj ne povus esti tiel amindaj, kiel ŝi, kaj kiuj estas kredible same malkuraĝaj kaj same malfidindaj. »

Tiam mi komencis malsupreniri kaj eliri, ne pretendante plu al Manon; kaj, ĉar la mortiga ĵaluzeco, kiu disŝiris mian koron, maskiĝis sub malgaja kaj malluma trankvileco, mi kredis min des pli proksima al mia resanigo, ke ju pli mi sentis neniun el tiuj perfortaj movadoj, per kiuj mi estis agitita en samaj okazoj. Ho ve! mi estis tiom moktrompita de amo, kiom mi kredis esti tia de G... M... kaj de Manon.

Tiu knabino, kiu alportis al mi la leteron, vidante, ke mi estis preta malsupreniri ŝtuparon, petis de mi, kion do mi volas, ke ŝi realportu al sinjoro de G... M...

kaj al la sinjorino, kiu estas kun li. Pro tiu demando, mi reeniris en la ĉambron ; kaj per ŝanĝo nekredebla por tiuj, kiuj neniam sentis perfortajn pasiojn, mi pasis subite el la trankvileco, en kiu mi kredis esti, al terura ekscitego de kolerego.

« Iru, mi diris, konigu al perfida G... M... kaj al lia trompema amatino la malesperon, en kiun min ĵetis ŝia malbenita letero ; sed ilin sciigu, ke ili ne tion ĝuos longatempe, kaj ke mi ponardfrapos ilin ambaŭ de mia propra mano. »

Mi min ĵetis sur seĝon : mia ĉapelo falis unuflanke, kaj aliflanke mia bastono. Du riveretoj el maldolĉaj larmoj ekfluis el miaj okuloj. La atako de furiozeco, kiun mi estis sentinta antaŭ nelonge, ŝanĝiĝis en profundan doloron ; mi nur daŭrigis ploradi, puŝante ĝemojn kaj sopirojn.

« Alproksimiĝu, infanino mia, alproksimiĝu, mi ekkriis, parolante al la junulino ; alproksimiĝu, tial ke estas ci, kiun oni sendas por min konsoli. Diru al mi, ĉu ci konas konsolojn kontraŭ kolerego kaj malespero, kontraŭ la deziro doni al si mem morton, post kiam oni mortigis du geperfidulojn, kiuj ne meritas vivi. Jes, alproksimiĝu, mi daŭrigis, vidante, ke ŝi faras al mi kelkajn timemajn kaj necertajn paŝojn. Venu viŝi miajn larmojn, venu redoni pacon al mia koro, venu diri al mi, ke ci amas min, por ke mi kutimu esti amita de virino alia ol de mia malfidelulino. Ci estas beleta ; eble mi povos cin ami miavice. »

Tiu kompatinda infanino, kiu estis apenaŭ dek ses aŭ dek sepjara, kaj kiu ŝajnis havi pli da hontemo ol siaj similulinoj, estis eksterordinare mirigita de tiu stranga sceno. Ŝi tamen alproksimiĝis por fari al mi kelkajn karesojn ; sed mi ŝin forigis tuje, ŝin repuŝante per miaj manoj.

« Kion ci volas de mi? mi diris. Ha! ci estas virino; ci havas sekson, kiun mi malamas kaj kiun mi ne povas toleri. La dolĉeco de cia vizaĝo min ankoraŭ minacas de ia perfido. Eliru, kaj lasu min sola ĉi tie. »

Ŝi faris al mi reverencon, ne kuraĝante diri ion, kaj sin turnis por eliri. Mi kriis, ke ŝi haltu.

« Sed almenaŭ sciigu min, mi diris, kial, kiel, pro kiu projekto ci estis sendita ĉi tien? Kiamaniere ci malkovris mian nomon, kaj la lokon, en kiu ci povis min renkonti? »

Ŝi diris, ke de longa tempo ŝi konas sinjoron de G... M...; ke li sendis lakeon por ŝin venigi je la kvina, ke, sekvinte tiun serviston, kiu ŝin estis avertinta, ŝi eniris en grandan domon, en kiu ŝi trovis lin ludantan je pikedo kun beleta sinjorino; kaj ke ambaŭ ŝin komisiis, ke ŝi donu al mi la leteron, kiun ŝi estis alportinta, ŝin sciiginte, ke ŝi min trovos en karoso, komence de la strato Saint-André. Mi petis, ĉu ili ne diris ion plu: ŝi respondis ruĝiĝante, ke ili esperigis al ŝi, ke mi prenos ŝin, por ke ŝi sociiĝu kun mi..

« Oni cin erarigis, mi diris. Mia kompatinda knabino, oni cin erarigis. Ci estas virino; do ci bezonas viron: sed ci bezonas viron riĉan kaj feliĉan; kaj ne tie ĉi ci povos lin trovi. Revenu, revenu al sinjoro de G... M... Li havas ĉion, kio taŭgas por esti amata de belulinoj. Li havas meblitajn hotelojn kaj karosojn, por ilin doni. Pri mi, kiu posedas nur amon kaj konstantecon por oferi, virinoj malŝatas mian mizerecon, kaj faras min ludilo de mia simpleco. »

Mi aldonis mil aferojn jen malgajajn jen perfortajn, laŭ ke la pasioj, kiuj min sinsekve agitis, cedis aŭ trimfis. Tamen post kiam mi estis min multe turmentinta, miaj ekscitaĵoj malplifortiĝis sufiĉe por esti anstataŭitaj de kelkaj pripensoj. Mi komparis tiun lastan mal-

feliĉaĵon kun la aliaj samspecaj, kiujn mi jam estis suferinta, kaj mi trovis, ke ne estas pli malesperinde en ĉi tiu ol en la unuaj. Mi konis Manon'on : kial min ĉagreni tiele por malfeliĉo, kiun mi devis antaŭvidi ? Kial prefere ne klopodi, por serĉi kuracilon ? Ne estis tro malfrue. Almenaŭ mi ne devus malŝpari miajn zorgadojn, se mi ne volus min riproĉi, ke per mia malzorgo mi kunhelpis miajn proprajn ĉagrenojn. Pri tio mi ekpenis konsideri ĉiujn rimedojn, kiuj povus malfermi al mi vojon al espero.

Entrepreni ŝin eltiregi perforte el manoj de G... M... estis malespera decido, kiu estis inda nur por min pereigi, kaj kiu havis nenian ŝajnon de sukceso. Sed ŝajnis al mi, ke se mi estus povinta havigi al mi la plej mallongan interparolon kun ŝi, mi nepre estus ricevinta ion de ŝia koro ; mi tiel bone konis ĉiujn ĝiajn sentemajn lokojn ! Mi estis tiel certa, ke mi estas amata de ŝi ! Tiu strangaĵo mem, t. e. sendi al mi beletan knabinon por min konsoli, mi estus vetinta, ke ĝi devenis de ŝia elpenso, kaj ke ĝi estis efiko de ŝia kompato al miaj ĉagrenoj. Mi decidis, ke mi uzos mian tutan lertecon por ŝin vidi. Inter multenombraj vojoj, kiujn mi ekzamenis unu post la alia, mi haltis sur ĉi tiu : sinjoro de T... jam estis komencinta fari al mi servojn kun tro da amikeco por lasi al mi la plej malgrandan dubon pri lia sincereco kaj lia zorgemo. Mi decidis, ke mi iros al lia hejmo tuje, kaj ke mi lin instigos, ke li venigu G... M... 'on, pretekstante gravan aferon. Mi bezonis nur duonon da horo, por paroli kun Manon. Mia projekto estis min enirigi en ŝian ĉambron mem ; kaj mi kredis, ke tio estos al mi facila, dum forestado de G... M.. Ĉar tiu decido min igis iom trankvila, mi pagis malavare la junulinon, kiu estis ankoraŭ kun mi ; kaj por eligi el ŝi deziron reveni al tiuj, kiuj estis ŝin senditaj, mi prenis

ŝian adreson, esperigante al ŝi, ke mi iros pasigi nokton kun ŝi. Mi supreniris en mian fiakron, kaj mi min kondukigis rapidege al sinjoro de T... Mi estis sufiĉe feliĉa por lin trovi: dum mi veturis, mi estis havinta iom da maltrankvileco pri tio. Unu vorto lin sciigis pri miaj ĉagrenoj, kaj pri la servo, kiun mi venas peti de li. Li estis tiel mirigita, eksciinte, ke G... M... estis povinta delogi Manon'on, ke, nesciante, ke mi mem partoprenis en mia malfeliĉo, li grandanime proponis, ke li kolektu ĉiujn siajn amikojn, kaj uzu iliajn brakojn kaj iliajn spadojn por liberigi mian amatinon. Mi komprenigis al li, ke tia skandalo povus nur malutili Manon'on kaj min.

« Ni konservu nian sangon, mi diris, por ekstremo. Mi meditas vojon pli dolĉan, de kiu mi ne esperas malpli da sukceso. »

Li promesis, nenion esceptinte, ke li faros ĉion, kion mi petos de li; kaj kiam mi estis redirinta, ke la demando estas nur avertigi G... M... 'on, ke li bezonas paroli kun li, li tuj eliris kun mi por min kontentigi.

Ni serĉis kian artifikon li povos uzi, por lin haltigi longatempe. Mi konsilis, ke li unue skribu simplan leteron, datumitan en drinkejo, en kiu li petas de li, ke li aliru al tiu loko tuje poŝ afero tiel grava, ke ĝi ne povas toleri ian prokraston.

« Mi observos, mi aldonis, la momenton de lia eliro; kaj mi min enkondukos sen malfacileco en la domon, ĉar mi estas konita nur de Manon kaj de Marcel, kiu estas mia lakeo. Pri vi, kiu estos dum tiu tempo kun G... M..., vi povos diri, ke tiu grava afero, pri kiu vi deziras paroli kun li, estas bezono al mono; ke vi malgajnis la vian en ludado, kaj ke vi ludis kun sama malfeliĉeco multe pli ol vi posedis, donante kiel garantiaĵon nur vian parolon. Li bezonos tempon por vin konduki al

sia kaso ; kaj mi havos sufiĉe da ĝi por plenumi mian projekton. »

Sinjoro de T... efektivigis tiun aranĝon tre akurate. Mi lasis lin en drinkejo, en kiu li rapide skribis sian leteron. Mi iris min loki je kelkaj paŝoj post la domo de Manon, mi vidis alveni la portanton de la letero ; kaj post momento G... M... eliris piede, sekvite nur de unu lakeo. Lasinte al li tempon necesan por malproksimiĝi for de la strato, mi alpaŝis al la pordo de mia malfidelulino ; kaj malgraŭ mia kolero, mi frapis kun la respekto, kiun oni havas por templo. Feliĉe estis Marcel, kiu venis malfermi al mi. Mi faris signon, ke li silentu : kvankam mi havis nenion por timi de aliaj servistoj, tamen mi petis de li mallaŭte, ĉu mi povas esti kondukita de li en la ĉambron, en kiu estas Manon, ne ekvidite. Li diris, ke tio estas facila, se mi supreniras senbrue per la granda ŝtuparo.

« Do, ni iru rapide, mi diris, kaj ci penu malhelpi, ke iu malsupreniru, dum mi estos en ĝi. »

Mi penetris ne malhelpite ĝis apartamento.

Manon estis okupita de legado. En tiu cirkonstanco, mi povis admiri la karakteron de tiu stranga knabino. Ne nur ŝi ne estis terurita nek ŝajnis timema, min ekvidante, sed ŝi vidigis nur tiujn negravajn montrajn de miro, de kiuj oni ne estas estro, vidante personon, kiun oni kredas malproksima.

« Ha ! estas vi, amato mia, ŝi diris, venante min kiŝi kun ŝia kutima amemo. Bona Dio ! kiel vi estas maltima ! kiu estus atendinta vin hodiaŭ en tiu loko ? »

Mi min eltiris el ŝiaj brakoj ; kaj ne nur mi ne respondiŝ al ŝiaj karesoj, sed kontraŭe mi ŝin repuŝis kun malŝato, kaj faris du aŭ tri paŝojn malantaŭen, por min forigi de ŝi. Tamen tiu movo al ŝi perdigis ŝian memfidon. Ŝi restis en la stato, en kiu ŝi estis, kaj

ĵetis rigardojn al mi, dum ŝanĝigis ŝia vizaĝkoloro. Funde mi estis tiel ĉarmita, ŝin revidante, ke, malgraŭ tiom da justaj motivoj de kolero, mi apenaŭ havis sufiĉe da forto por malfermi buŝon kaj por ŝin riproĉi. Tamen mia koro sangdonis pro la kruela insultego, kiun ŝi faris al mi : vane mi ĝin realvokis en mia memoro por eksciti mian ĉagrenkoleron, kaj penis briligi en miaj okuloj fajron alian ol tiun de amo. Ĉar mi restis silentanta dum ia momento, kaj, ĉar ŝi rimarkis mian agitadon, mi vidis, ke ŝi tremas, kredeble pro la efiko de ŝia timado.

Mi ne povis toleri tiun vidaĵon.

« Ha, Manon, mi diris per tono amema, malfidela kaj ĵurrompita Manon, per kio mi komencos plendi ? Mi vidas vin palan kaj tremantan ; kaj mi estas ankoraŭ tiel sentema al viaj plej malgrandaj suferoj, ke mi timas vin tro ĉagreni per miaj riproĉoj. Sed, Manon, mi ĝin diras al vi, mi havas koron traboritan de la doloro de via perfido. Tio estas frapoj, kiujn oni ne donas al amanto, kiam oni ne decidis, ke li mortos. Jen estas la tria fojo, Manon ; mi ilin tre bone kalkulis : estas neeble, ke tio forgesiĝu. Vi devos ekzameni, en tiu horo mem, kian decidon vi volas preni ; ĉar mia malĝoja koro ne estas sufiĉe kiraskovrita kontraŭ tiel kruela turmento. Mi sentas, ke ĝi subfalas, kaj estas preta fendiĝi pro doloro. Mi estas lacega, mi aldonis, sidiĝante sur seĝon ; mi apenaŭ havas sufiĉe da forto por paroli kaj min subteni. »

Ŝi ne respondis : sed kiam mi estis sidinta, ŝi sin faligis sur genuoj kaj apogis sian kapon sur la miajn, kaŝante ŝian vizaĝon per miaj manoj. Mi sentis, ke dum unu momento ŝi ilin malsekigis per ŝiaj larmoj. Dioj ! ĉu ekzistas kormovadoj, de kiuj mi ne estis agitita ?

« Ha ! Manon, Manon, mi rediris kun sopiro ; estas

tro malfrue por doni al mi larmojn, kiam vi kaŭzis mian morton. Vi ŝajnigas malĝojecon, kiun vi ne povas senti. La plej granda el viaj malbonaĵoj estas kredeble mia ĉeesto, kiu ĉiam estis maloportuna al viaj plezuroj. Malfermu okulojn ; vidu, kia mi estas : oni ne verŝas plorojn tiel amemajn por malfeliĉulo, kiun oni perfidis, kaj kiun oni kruele forlasas. »

Ŝi kisis miajn manojn, ne ŝanĝante sian sintenadon.

« Malkonstanta Manon, mi rediris ankoraŭ, maldankema kaj senbonfida knabino, kie estas viaj promesoj kaj viaj ĵuroj ? Amatino milfoje flirtema kaj kruela, kion vi faris de tiu amo, kiun vi ankoraŭ ĵuris al mi hodiaŭ ? Justa ĉielo, mi aldonis, ĉu tiamaniere malfidelulino vin mokas, post kiam ŝi tiel sankte vin prenis ateste ? Estas do la ĵurrompinto, kiu estas rekompencita ? Malespero kaj forlaso estas do por la konstantulo, por la fidelulo ? »

Tiuj paroloj estis akompanitaj de pripenso tiel maldolĉa, ke malgraŭvole mi lasis ellasi kelkajn larmojn. Manon tion rimarkis, dank'al ŝanĝo de mia voĉo. Fine ŝi rompis silenton.

« Devige mi estas kulpa, ŝi diris malĝoje, tial ke mi povas okazigi al vi tiom da doloro kaj tiom da kortuŝeco : sed ĉielo min punu, se mi kredis esti, aŭ se mi havis penson fariĝi tia. »

Tiu parolado ŝajnis al mi tiel senigita je senco kaj je bonfido, ke mi ne povis min defendi kontraŭ viva ekmovado de kolero.

« Abomeninda kaŝemo ! mi ekkriis. Neniam pli bone mi vidis, ke ci estas nur friponino kaj perfidulino. Sed nun mi konas cian malnoblan karakteron. Adiaŭ, malkuraĝa kreitaĵo, mi daŭrigis, min levante, mi pli amus morti milfoje ol havi de nun la plej malgrandan amrilaton kun ci. Ĉielo min mem punu, se mi iam cin

honoros per la plej eta rigardo ! Restu kun cia nova amanto, amu lin, malamu min, forlasu honoron kaj saĝecon ; mi ridas pri tio ; ĉio min indiferentigas. »

Ŝi estis tiel terurita de tia ekscitego, ke, restante sur genuoj apud la seĝo, el kiu mi estis min levinta, ŝi min rigardis tremante, kaj ne kuraĝante plu spiri. Mi faris ankoraŭ kelkajn paŝojn al pordo, turnante la kapon, kaj havante okulojn fiksitajn al ŝi. Sed estus estinta necese, ke mi estus perdinta ĉian senton al humaneco por min malmoligi antaŭ tiom da ĉarmoj. Tia barbara forteco estis tiel malproksima el mia koro, ke, subite pasante al la mala ekstremo, mi returnis al ŝi aŭ prefere mi rapidegis, ne pripensante. Mi ŝin prenis inter miaj brakoj, mi donis al ŝi mil amoplenajn kisadojn ; mi petis pardonon pro mia kolerego ; mi konfesis, ke mi estas brutulo, kaj ke mi ne meritas feliĉon esti amata de knabino tia, kia ŝi. Mi ŝin sidigis, kaj min metinte miavice sur genuoj, mi ŝin petegis, ke ŝi aŭskultu min en tiu stato. Tie ĉion, kion amanto submetita kaj pasiema povas imagi plej respektan kaj plej ameman, mi enfermis en malmulte da vortoj, min senkulpigante. Mi petis humilge elparolon, ke ŝi min pardonas. Ŝi lasis fali siajn brakojn sur mian kolon, dirante, ke estas ŝi mem, kiu bezonas mian bonecon, por forgesigi de mi la ĉagrenojn, kiujn ŝi al mi okazigis, kaj ke ŝi komencas rajte timi, ke mi ne ŝatos tion, kion ŝi estas dironta por sin senkulpigi.

« Mi ! mi interrompis tuje, ha ! mi ne petas de vi senkulpigon ; mi aprobas ĉion, kion vi faris. Ne estas mi, kiu devas postuli la motivojn de via konduto. Tro kontenta, tro feliĉa, ke mia kara Manon ne deprenas de mi la amemon de sia koro. Sed, mi daŭrigis, ne pripensante pri la stato de mia sorto, potencega Manon ! vi, kiu faras laŭ via bonvolo miajn ĝojojn kaj miajn dolo-

rojn ! nun, ĉar mi vin kontentigis per miaj humiliĝoj kaj per la montroj de mia pento, ĉu ne estos permesate al mi paroli pri mia malĝojeco kaj pri miaj ĉagrenoj ? Ĉu mi ekscios de vi tion, kio mi devas fariĝi hodiaŭ, kaj ĉu sen espero de reveno vi subskribos mian mort-sentencon, pasigante nokton kun mia konkuranto ? »

Dum kelka tempo ŝi meditis sian respondon.

« Mia kavaliro, ŝi diris, reprenante trankvilan ŝajnon, se vi unue estus klariginta vian penson tiel precize, vi estus ŝparinta al vi multe da konfuzaĵoj kaj al mi scenon tre malĝojigan. Tial ke via ĉagreno devenas nur de via ĵaluzeco, mi estus resaniginta ĝin, proponante al vi vin sekvi ĝis ekstremo de l'mondo. Sed mi figuris al mi, ke estis la letero, kiun mi skribis sub okuloj de G... M..., kaj la knabino, kiujn mi sendis al vi, kiuj kaŭzis vian ĉagrenon. Mi kredis, ke vi povis konsideri tiun leteron kiel mokon, kaj tiun knabinon (se vi imagis, ke ŝi iris vin trovi, instigite de mi) kiel sciigon, ke mi vin forlasas por min alligi al G... M... Estas tiu penso, kiu subite min ĵetis en konsternon, ĉar, kvankam mi estas senkulpa, tamen, pripensante al tio, mi trovas, ke la ŝajnoj ne estas al mi favoraj. Pro tio, ŝi daŭrigis, mi volas, ke vi estu mia juĝanto, post kiam mi estos klariginta al vi la verecon pri tio, kio okazis. »

Tiam ŝi konigis al mi ĉiujn aferojn okazintajn al ŝi, de kiam ŝi estis retrovinta G... M... 'on, kiu ŝin atendis en la loko, en kiu ni estas. Li ŝin ricevis efektive, kva-zaŭ ŝi estus la plej altranga princino en mondo. Li montris al ŝi ĉiujn apartamentojn, kiuj estis admirinde puraj kaj bongustaj. Li al ŝi kalkulis dek mil frankojn en ŝia tualetejo, kaj aldonis kelkajn juvelojn, inter kiuj estis la kolringo kaj la brakringo el perloj, kiujn ŝi jam estis ricevinta de lia patro. Poste li ŝin kondukis en salonon, kiun ŝi ne estis vidinta ankoraŭ, kaj en kiu ŝi trovis

bonegan manĝeton. Li ŝin servigis per la novaj servistoj, kiujn li estis dunginta por ŝi, ordonante al ili, ke de nun ili ŝin rigardos kiel sian mastrinon; fine li al ŝi vidigis la karoson, la ĉevalojn, la tutan ceteron de siaj donacoj, kaj poste li proponis al ŝi ludadon, por atendi la vespermanĝon.

« Mi konfesas, ŝi daŭrigis, ke mi estis mirigita de tia luksegeco. Mi pripensis, ke estus domaĝe min senigi subite je tiom da bonaĵoj, kontentigante min nur per la forporto de dek mil frankoj kaj de juveloj; ke tio estas riĉeco tute farita por mi kaj por vi, kaj ke ni povus vivi agrable per la malprofito de G... M... Anstataŭ proponi al li komedion, mi metis en mian kapon, ke mi lin sondos pri vi, por antaŭsenti kiajn facilecojn mi havus por vin vidi, supozante la plenumon de mia sistemo. Mi trovis, ke li havas tre malrigidan karakteron. Li petis de mi, kion mi opinias pri vi, kaj ĉu mi ne estis havinta bedaŭrojn, vin forlasante. Mi diris, ke vi estas tiel aminda, ke vi ĉiam agis kun mi tiel honeste, ke ne estus nature, ke mi povu vin malami. Li konfesis, ke vi havas meriton, kaj ke li sentas sin dezirema al via amikeco. Li volis scii, kiamaniere mi kredas, ke vi akceptos mian eliron, precipe kiam vi ekscios, ke mi estas inter liaj manoj. Mi respondis, ke la dato de nia amo estas jam tre malnova, kaj ke ĝi havis tempon iom malvarmiĝi, cetere ke vi ne estas riĉa kaj eble, ke vi ne rigardos mian perdon kiel grandan malfeliĉon, tial ke ĝi vin liberigos el ŝarĝo, kiu pezas sur viaj brakoj.

• Mi aldonis, ke, ĉar mi estis tute certa, ke vi agos paceme, mi sen ia malkaŝemo diris al vi, ke mi venas Parizon por kelkaj aferoj, ke vi konsentis al tio, kaj ke, ĉar vi mem estis veninta en tiun urbon, vi ne ŝajnis tre maltrankvila, kiam vi min lasis. « Se vi kredus, li diris, ke « li havas humoron tian, ke li bonvolu bone vivi kun

« mi, mi estus tute preta prezenti al li miajn servojn « kaj miajn ĝentilaĵojn. » Mi certigis, ke kun la karaktero, kiu, laŭ mia kono, estas la via, mi ne dubas, ke vi respondos al li honeste. « Precipe, mi diris, se li « povas vin servi en viaj aferoj, kiuj estas tute malbone « ordigitaj, de kiam vi malpaciĝis kun via familio. » Li min interrompis por ĵuri, ke li faros al vi ĉiujn servojn, kiuj dependos de li ; kaj se eĉ vi volus enŝipiĝi en alian amon, li havigus al vi beletan amatinon, kiun li forlasis por sin alligi al mi. Mi aplaudis al lia ideo, ŝi aldonis, por antaŭbatali pli perfekte iliajn suspektojn : kaj, min firmigante pli kaj pli en mian projekton, mi deziris nur trovi rimedon por vin informi, timante, ke vi estos tro ĉagrenita, kiam vi vidos, ke mi ne ĉeestas ĉe nia kunvenejo. Estas pro tiu ideo, ke mi proponis, ke li sendu al vi tiun novan amatinon en la vespero mem, por ke mi havu okazon al vi skribi : mi estis devigita uzi tiun artifikon, ĉar mi ne povis esperi, ke li lasos min libera eĉ unu momenton. Li ridis pri mia propono. Li alvokis sian lakeon, kaj petinte de li, ĉu li povos trovi tuje alian malnovan amatinon, li lin sendis al multaj diversaj lokoj por ŝin serĉi. Li imagis, ke al Chaillot ŝi devis iri por vin trovi ; sed mi lin sciigis, ke, vin lasante, mi promesis al vi, ke mi vin retrovos en komediejo, aŭ ke, se ia ajn motivo malhelpas, ke mi iru en ĝin, vi promesis, ke vi atendos min en karoso, komence de la strato Saint-André ; ke sekve pli bone estus sendi al vi tien vian novan amatinon, kiam oni farus tion nur por malhelpi, ke vi min atendados dum la tuta nokto. Mi diris ankaŭ, ke estus taŭge skribi al vi unu vorton por vin averti pri tiu interŝanĝo, kiun vi malfacile komprenus sen tio. Li tion konsentis ; sed mi estis devigita skribi en lia ĉeesto ; pro tio mi zorge evitis klarigi tro malkaŝe mian penson en mia letero. Jen estas, aldonis

Manon, kiamaniere okazis la afero. Mi kaŝas al vi nenion, nek mian konduton, nek miajn projektojn. La junulino venis ; mi trovis ŝin beleta : kaj, ĉar mi ne dubis, ke mia foresto kaŭzos al vi ĉagrenon, sincere mi deziris, ke ŝi povu utili al vi por vin senenuigi dum kelkaj momentoj ; ĉar la fideleco, kiun mi deziras de vi, estas nur tiu de koro. Mi estus estinta kontentega, se mi estus povinta sendi al vi Marcel'on ; sed mi ne povis trovi unu minuton por konigi al li tion, pri kio mi volis vin instrui. »

Fine ŝi haltigis sian rakonton, sciigante min pri la embaraso, en kiu troviĝis G... M..., ricevante la bileton de sinjoro de T...

« Li ŝanceliĝis, ŝi diris, ĉu li devos min lasi, kaj li certigis, ke lia reveno ne malfruiĝos ; pro tio, mi ne vin vidas ĉi tie sen maltrankvileco ; kaj pro tio mi montris miron, kiam vi eniris. »

Mi aŭskultis tiun paroladon kun multe da pacienco. Certe mi trovis en ĝi multajn sagojn kruelajn kaj mal-estimegajn al mi ; ĉar la projekto pri ŝia malfideleco estis tiel klara, ke ŝi eĉ ne zorgis ĝin maski. Si ne povis esperi, ke G... M... ŝin lasos dum tuta nokto, kvazaŭ ŝi estus vestalo. Do kun li ŝi intencis ĝin pasigi. Kia konfeso por amanto ! Tamen mi konsideris, ke mi estas parte kaŭzo de ŝia kulpo pro la kono, kiun unue mi donis al ŝi pri la sentoj, kiujn G... M... havis, kaj pro la komplezo, kiun mi estis havinta, enirante blinde en la malprudentan planon de ŝia aventuro. Cetere per natura inklino de karaktero, mi estis tuŝita de la naiveco de ŝia rakonto, kaj de tiu maniero malfermita kaj malkaŝema, per kiu ŝi al mi rakontis eĉ cirkonstancojn, de kiuj mi estis plej ofendita.

« Si pekas senmalice, mi diris al mi mem : ŝi estas

malserioza kaj nesingardema, sed sincera kaj malmen-sogema. »

Aldonu, ke amo sufiĉis sola por fermi miajn okulojn sur ĉiuj ŝiaj kulpoj. Mi estis tro kontenta pro la espero, ke la vesperon mem mi ŝin formetos el mia konkuranto. Tamen mi diris al ŝi :

« Kaj la nokto ? kun kiu vi estus ĝin pasiginta ? »

Tiu demando, kiun mi faris al ŝi malgaje, ŝin embarasis. Ŝi nur respondis per : « Sed... », aŭ per : « Se... », ne finante frazon. Mi kompatis ŝian konfuzon, kaj rompante ŝian paroladon, mi kompreneble diris, ke mi postulas de ŝi, ke ŝi min sekvu en horo mem.

« Mi bonvolas, ŝi diris ; sed vi do ne aprobas mian projekton ?

— Ha ! ĉu ne sufiĉas, mi respondis, ke mi aprobas ĉion, kion vi ĝis nun estis farinta ?

— Kio ? Ĉu ni ne forportos la dek mil frankojn ? Ŝi diris : li ilin donis al mi ; ili al mi apartenas. »

Mi konsilis, ke ŝi forlasu ĉion, kaj nur pensu rapide forkuri : ĉar kvankam mi estis kun ŝi de unu duonhoro apenaŭ, tamen mi timis la revenon de G... M... Tamen ŝi faris tiel premantajn petegojn por konsentigi de mi, ke ŝi ne eliru kun manoj malplenaj, ke mi kredis, ke mi devas doni al ŝi ion, post kiam mi estis de ŝi tiom ricevinta.

En tempo, kiam ni nin preparis eliri, mi aŭdis frapon sur la pordon al la strato. Mi neniel dubis, ke ĝi estas G... M... ; kaj en la konfuzo, en kiun min ĵetis tiu penso, mi diris al Manon, ke li estas mortonta, se li sin montras. Efektive mi ne estis ankoraŭ sufiĉe kvietigita el miaj ekscitegoj, por min moderigi, lin vidante. Marcel finis miajn maltrankvilaĵojn, alportante al mi bileton, kiun li estis ricevinta por mi ĉe la pordo. Ĝi estis de sinjoro de T... Li skribis, ke, ĉar G... M..., estis

irinta al sia domo por serĉi monon, li profitis lian foreston, por komuniki al mi tre amuzan penson ; ke ŝajnas al li, ke mi ne povas min venĝi pli agrable de mia konkuranto, ol manĝante lian vespermanĝon, ol kuŝiĝante tiun nokton mem en la liton, kiun li esperis okupi kun mia amatino ; ke tio ŝajnas al li sufiĉe facila, se mi povas dungi tri aŭ kvar virojn sufiĉe maltimajn por aresti lin sur la strato, kaj sufiĉe fidelajn por lin vidgardi ĝis morgaŭ matene ; ke, pri li, li promesas, ke li lin amuzprokrastos ankoraŭ dum unu horo almenaŭ per pretekstoj, kiujn li tenas pretaj por kiam li revenos. Mi montris la bileton al Manon, kaj al ŝi konigis la ruzon, kiun mi uzis por min enkonduki libere en ŝian hejmon. Mia elpenso kaj tiu de sinjoro de T... ŝajnis al ŝi mirindaj. Ni ridis pri tio ĝojege dum kelkaj momentoj. Sed kiam mi parolis pri la lasta artifaĵo kiel pri petolaĵo, mi estis mirigita, ke ŝi insistu serioze ĝin proponi al mi kiel aferon, kies ideo ŝin ravas. Vane mi petis de ŝi, kie ŝi volas, ke mi trovu subite virojn kapablajn aresti G... M... 'on, kaj lin gardi fidele. Ŝi diris, ke almenaŭ oni devas tion provi, tial ke sinjoro de T... al ni garantias ankoraŭ unu horon ; kaj por respondi al miaj aliaj kontraŭparoloj, ŝi diris, ke mi fariĝas tirano, kaj havas al ŝi nenian komplezon. Ŝi trovas nenion pli beleta ol tiun projekton.

« Vi havos lian manĝilon kaj lian vespermanĝaĵon, ŝi ripetis : vi kuŝiĝos en liajn littukojn ; kaj morgaŭ tre frue vi formetos lian amatinon kaj lian monon. Vi estos tre bone venĝita je la patro kaj je la filo. »

Mi cedis al ŝiaj petegoj, malgraŭ la sekretaj movadoj de mia koro, kiuj ŝajnis antaŭmontri malfeliĉan katastrofon. Mi eliris, intencante peti de du aŭ tri korpogardistoj, kun kiuj Lescaut min estis rilatiginta, ke ili prenu sur sin aresti G... M... 'on. Mi trovis en lia loĝ-

ejo nur unu el ili : sed li estis viro entreprenema, kaj, tuj kiam li sciis, pri kio mi parolas, li certigis al mi sukceson : nur li petis de mi dek monpistoĵojn por rekompensi tri gardosoldatojn, kiujn li decidis utiligi, ilin ĉefante. Mi petis de li, ke li ne perdu tempon. Li ilin kolektis post malpli da kvarono da horo. Mi ilin atendis en lia domo ; kaj kiam li estis reveninta kun siaj kunligitoj, mi mem lin kondukis al angulo de strato, sur kiu devige G... M... estis pasonta por reeniri en tiun de Manon. Mi rekomendis, ke li ne suferigu lin, sed ke li lin gardu tiel mallarĝe ĝis la sepa matene, ke mi povu esti certa, ke li ne forkuros for de li. Li diris, ke lia projekto estas lin konduki en lian ĉambron, kaj lin devigi al la senvestiĝo kaj al la kuŝiĝo en lian liton, dum li kaj liaj tri bravuloj pasigos nokton en trikado kaj en ludado. Mi restis kun ili ĝis momento, kiam mi vidis G... M... 'on aperantan ; kaj tiam mi min kaŝis tri paŝojn pli malsupre en malluman lokon, por esti ĉeestanto ĉe tiel eksterordinara sceno. La korpogardisto aliris kun pistolo en la pugno, kaj klarigis al li ĝentile, ke li volas nek lian vivon nek lian monon, sed ke, se li faras la plej malgrandan malfacilecon por lin sekvi, li tuj bruligos lian cerbaĵon. G... M..., vidante, ke li estas helpita de tri soldatoj, kaj timante kredeble la ŝargoŝtopilon de l' pistolo faris nenian kontraŭbatalon. Mi vidis lin dekondukitan kiel ŝafon. Mi tuj revenis al Manon ; kaj por depreni ĉian ajn suspekton, mi diris al ŝi enirante, ke ŝi ne devas atendi sinjoron de G... M... por vespermanĝi ; ke okazis aferoj, kiuj lin nevolan detenas, kaj ke li petis de mi, ke mi venu por fari al ŝi senkulpigojn, kaj por vespermanĝi kun ŝi. Ŝi tre lerte min helpis en mia projekto. Ni altabliĝis. Ni prenis ŝajnon gravan, dum lakeoj restis por nin servi. Fine, ilin forpermesinte, ni pasigis unu el plej ĉarmaj vesperoj de nia vivo. Mi ordonis sekrete

al Marcel, ke li dungu fiakron, kaj avertu la veturigiston, ke li troviĝu la morgaŭon antaŭ la pordo, pli frue ol la sesa matene. Ŝajne, mi lasis Manon'on je la nokto-mezo ; sed estinte reenirinta senbrue, dank'al helpo de Marcel, mi min preparis okupi la liton de G... M..., kiel mi jam estis okupinta lian lokon ĉe la tablo. Dum tiu tempo nia malbona genio laboris por nin pereigi. Ni estis en deliro de plezuro, kaj la glavo estis pendanta super niaj kapoj. Sed por pli bone komprenigi ĉiujn cirkonstancojn de nia ruino, necese estas klarigi la kaŭzon.

G... M... estis sekvita de lakeo, kiam li estis arestita de korpogardistoj. Tiu knabego, terurita pro la aventuro de sia mastro, returneniris forkurante ; kaj la unua klopodo, kiun li faris por lin helpi, estis averti la maljunan G... M...'on pri tio, kio okazis. Tiel malgajiga novaĵo ne povis ne lin multe timigi. Li havis nur tiun filon ; kaj lia ardo estis tre viva por lia aĝo. Li volis unue, ke la lakeo al li konigu ĉion, kion lia filo estis farinta dum la tagmezo : ĉu li disputis kun iu, ĉu li partoprenis la disputon de alia, ĉu li troviĝis en malbonfama domo ? Tiu servisto, kiu kredis sian mastron en grandega danĝero, kaj imagis, ke li devas nenion kaŝi, se li volas doni al li helpadon, malkovris ĉion, kion li konis, pri lia amo al Manon, kaj pri la elspezo de li farita por ŝi ; la manieron laŭ kiu li pasigis tagmezon en ŝia domo ĝis la naŭa ĉirkaŭe, lian eliron kaj la malfeliĉon de lia reveno. Tio sufiĉis, por ke la maljunulo suspektu, ke la afero de lia filo estas ama afero. Kvankam estis almenaŭ duono de la dekunua vespere, tamen li ne ŝanceliĝis, kaj aliris tuj al lia polica leŭtenanta Moŝto. Li petis de li, ke li donigu specialajn ordonojn al ĉiuj rotoj de l'urbogardistaro ; kaj petinte de li unu taĉmenton por lin akompani, li alkuris al la strato, sur kiu lia filo estis arestita : li vizitis ĉiujn lokojn de la

urbo, en kiuj li esperis lin trovi ; kaj ne povinte mal-kovri liajn postsignojn, li sin kondukigis ĝis la domo de lia amatino, en kiun li figuris al si, ke eble li estas reveninta.

Mi estis ekenlitiĝonta, kiam li alvenis. Ĉar la pordo de la ĉambro estis fermita, mi ne aŭdis, ke iu estis frapinta sur la pordon al la strato. Li eniris, sekvite de du pafarkistoj, kaj sin informinte neutile, kio fariĝas lia filo, li havis deziron vidi lian amatinon, por eltiri el ŝi iom da lumo. Li supreniras al la apartamento, ĉiam akompanata de siaj pafarkistoj. Ni estis pretaj enlitiĝi : li malfermas la pordon, kaj frostigas nian sangon per sia vidiĝo.

« Ho dio ! li estas la maljuna G... M., mi diras al Manon. »

Mi saltas al mia spado. Ĉi bedaŭrinde estis embarasita kun mia glavzono. La pafarkistoj, kiuj vidis mian ekmovon, tuj alproksimiĝis por min ekkapti. Viro en ĉemizo estas sen kontraŭbataleco. Ili forprenis de mi ĉiujn rimedojn taŭgajn por min defendi.

G... M..., kvankam konfuzita de tiu vidaĵo, tamen ne prokrastis min rekoni. Li pli facile ankoraŭ rekonis Manon'on.

« Ĉu tio estas iluzio, li diris nepetole ; ĉu mi ne vidas kavaliron des Grioux kaj Manon'on Lescaut ? »

Mi estis tiel kolerega pro honto kaj doloro, ke mi faris nenian respondon. Dum kelka tempo li ŝajnis ruli diversajn pensojn en sia kapo ; kaj kvazaŭ ili subite estus ekbruligintaj lian koleron, li ekkriis, sin turnante al mi :

« Ha ! kulpulo, mi estas certa, ke vi mortigis mian filon ! »

Tia insulto min forte incitegis.

« Maljuna krimulo, mi respondis kun fiereco, se mi

estus mortiginta iun el cia familio, per ci mi estus komencinta.

— Tenu lin bone, li diris al la pafarkistoj; necesege estas, ke li donu novaĵojn pri mia filo : se post unu momento li ne konigos tion, kion li faris je li, morgaŭ mi igos lin pendigi.

— Ci igos min pendigi, malnoblegulo, mi rediris estas ciaj similuloj, kiujn oni devas sendi al la pendigilo. Sciu, ke mi havas sangon pli puran kaj pli nobelan ol ci. Jes, mi aldonis, mi scias tion, kio okazis al cia filo ; kaj se ci min kolerigas, mi lin sufokigos antaŭ kiam estos morgaŭ ; kaj poste mi promesas al ci la saman sorton. »

Mi faris nesingardaĵon, konfesante, ke mi scias, en kiu loko estas lia filo ; sed la troeco de mia kolero al mi farigis tiun maldiskretaĵon. Li tuj alvokis kvin aŭ ses aliajn pafarkistojn, kiuj lin atendis apud la pordo, kaj ordonis, ke ili arestu ĉiujn servistojn de la domo.

« Ha ! sinjoro kavaliro, li aldonis per moka tono, vi scias, kie estas mia filo, kaj vi lin sufokigos, vi diras. Estu certa, ke mi scios tion malhelpi. »

Mi tuj sentis la kulpon, kiun mi estis farinta. Li alproksimiĝis al Manon, kiu estis sidanta sur la lito, plorante : li diris al ŝi kelkajn ironiplenajn ĝentilaĵojn, pri la potencego, kiun ŝi havas sur la patro kaj sur la filo, kaj pri la bona uzado, kiun ŝi faras de tiu povo. Tiu maljuna monstro de malĉastegeco volis provi al ŝi kelkajn senĝenaĵojn :

« Zorgu, ke ci ne ŝin tuŝu, mi ekkriis. Ekzistas nenio eĉ sanktega, kiu povus cin savi el miaj manoj ! »

Li eliris, lasante en la ĉambro tri pafarkistojn, al kiuj li ordonis, ke ili rapide vestigu de mi miajn vestojn.

Mi ne scias, kiaj estis en tiu momento liaj intencoj pri ni. Eble ni estus ricevintaj liberecon, se ni estus sci-

igintaj lin pri la loko, en kiu troviĝis lia filo. Mi meditis, min vestante, ĉu tio ne estas la plej bona decido. Sed se li estis en tiu spiritstato, kiam li lasis nian ĉambron, li montriĝis tute ŝanĝita, kiam li revenis. Li estis irinta por demandi la servistojn de Manon, kiujn estis arestitaj la pafarkistoj. Li povis nenion scii de tiuj lakeoj, kiujn ŝi estis ricevinta de lia filo : sed kiam li sciis, ke Marcel nin servis antaŭe, li decidis, ke li lin paroligos, lin timigante per minacoj.

Li estis fidela sed simplanima kaj maldelikata knabego. La memoro de tio, kion li faris en Hospitalo por liberigi Manon'on, miksitita kun la teruro, kiun G... M... al li inspiris, faris sur lia malforta spirito impreson tian, ke li imagis, ke oni tuj lin kondukos al pendigilo aŭ al punrado. Li promesis, ke li malkovros ĉion, kio estis alveninta al lia kono, se oni bonvolas savi al li vivon. Pro tio G... M... estis konvinkita, ke estis en niaj aferoj io pli grava aŭ pli krima, ol ĝis nun li kredis, ke oni povas figuri al si. Li promesis al Marcel por lia konfeso ne nur vivon, sed plie rekompencojn. Tiu malfeliĉulo al li konigis parton de nia projekto, pri kiu senĝene ni interparolis en lia ĉeesto, tial ke li devis ĝin partopreni en iaj detaloj. Estas vere, ke li tute ne sciis la ŝanĝojn, kiujn en Parizo ni faris en ĝi ; sed li estis informita, elirante el Chaillot, pri la plano de l'entrepreno, kaj pri la rolo, kiun li devis ludi. Li do certigis, ke nia intenco estis moktrompi lian filon ; ke Manon estis ricevonta aŭ jam ricevinta dek mil frankojn, kiuj, laŭ nia projekto, neniam revenos al heredantoj de la G... M... 'a familio.

Post tiu eltrovo, la maljunulo kolerega subite resupreniris al nia ĉambro. Ne parolante, li eniris en la tualetejon, en kiu sen malfacileco li trovis monsumon kaj juvelojn. Li revenis al mi kun flamanta vizaĝo, kaj

montrante tion, kion al li plaĉis nomi nia ŝtelaĵo, li nin premegis de ofendriproĉoj. Li vidigis de proksime al Manon la kolringon el perloj kaj la brakringojn.

« Ĉu vi rekonas ilin ? li diris kun moka rideto. Ne por la unua fojo vi ilin vidas. La samaj, mi ĵuras ! Ili estis laŭ via gusto, etulino mia ; mi facile estas konvinkita pri tio. Kompatindaj geinfanoj ! Ja ili ambaŭ estas tute amindaj, sed iom tro friponoj ! »

Mian koron krevigis pro kolerego tiu insultplena parolado. Mi estus doninta, por esti libera dum unu momento... Justa ĉielo ! kion mi ne estus doninta ? Fine mi faris al mi perforton, por diri kun modereco, kiu estis nur plieco de kolerego :

« Finu, sinjoro, tiujn insultemajn mokegojn. Kion vi postulas ? diru. Kion vi intencas fari de ni ?

— Mi postulas, sinjoro kavaliro, li respondis, ke tuj vi iru al Chatelet ¹. Morgaŭ tagiĝos ; ni vidos pli klare en niaj aferoj ; kaj mi esperas, ke fine vi faros al mi komplezon al mi konigi, en kiu loko estas mia filo. »

Mi komprenis sen multo da pripensoj, ke esti enfermitaj en Chatelet, eĉ unu fojon, estis afero havanta por ni terurajn konsekvencojn. Mi antaŭvidis tremante ĉiujn iliajn danĝerojn. Malgraŭ mia fiereco, mi ekvidis, ke estas necese faldiĝi sub la pezo de miaj malfeliĉaĵoj, kaj flati mian plej kruelan malamikon, por ricevi de li ion per submetiĝo. Mi petis de li per honesta tono, ke li bonvolu min aŭskulti dum unu momento .

« Mi faras al mi justecon, mi diris. Mi konfesas, ke juneco al mi farigis tre gravajn kulpojn, kaj ke vi estas sufiĉe ofendita por prave plendi. Sed se vi konus forton de amo, se vi povus kompreni tion, kion suferas

1. Elparolu : *Satle*.

malfeliĉa junulo, de kiu oni deprenas ĉion, kion li amas, eble vi opinius min pardonebla, ĉar mi serĉis la plezuron de malgrava venĝeto, aŭ prefere vi kredus min sufiĉe punita per la ofendego, kiun mi ricevis antaŭ momento. Vi bezonos nek malliberejon nek turmentegojn por devigi de mi, ke mi malkovru en kiu loko estas sinjoro via filo. Li estas senriska. Mia intenco estis nek malutili al li, nek vin ofendi. Mi estas preta nomi al vi la lokon, en kiu li pasigas nokton trankvile, se vi faras komplezon doni al ni liberecon. »

Ne nur tiu maljuna tigro ne estis kortuŝita de mia petego, sed li turnis al mi dorson ridante. Li nur eligis kelkajn vortojn, por al mi komprenigi, ke li konis nian projekton de ĝia deveno. Pri tio, kio koncernas lian filon, li aldonis, ke li retroviĝos sufiĉe frue, tial ke mi ne lin mortigis.

« Lin konduku al la malgranda Chatelet, li diris al pafarkistoj, kaj zorgu, ke la kavaliro ne vin forlasu. Li estas ruzulo, kiu jam forkuris for de Saint-Lazare. »

Li eliris, kaj min lasis en stato, kiun vi ne povas imagi.

« Ho ĉielo, mi ekkriis, mi ricevos submetite ĉiujn batojn, kiuj venas de via mano ; sed krima fripono havu potencon agi kun mi per tia tiraneco, tio min ĵetas en plej grandan malesperon ! »

La pafarkistoj petis de ni, ke ni ne ilin atendigu pli longatempe. Ili havis karoson antaŭ la pordo. Mi prezentis manon al Manon, por ŝin helpi en malsupreniro.

« Venu, mia kara reĝino, mi diris ; venu vin submeti sub la kruelecon de via sorto. Eble plaĉos al ĉielo nin fari iam feliĉaj. »

Ni eliris en la sama karoso. Ŝi metis sin en miajn brakojn. Mi ne estis aŭdinta ŝin elparolantan unu vorton,

de la alveno de G... M... ; sed kiam ŝi troviĝis sola kun mi, ŝi diris mil amemaĵojn, sin riproĉante, ke ŝi estas kaŭzo de mia malfeliĉo. Mi ŝin certigis, ke neniam mi plendos pri mia sorto, tiel longe kiam ŝi ne ĉesos min ami.

« Ne estas mi, kiu estas plendinda, mi daŭrigis. Kelkaj monatoj de malliberejo neniel min timigas ; kaj ĉiam mi preferos Chatelet'on al Saint-Lazare. Sed estas por vi, mia kara animo, ke mia koro interesiĝas. Kia sorto por kreitaĵo tiel ĉarma ? Ĉielo, kial vi agas per tiom da krueleco kun la plej perfekta el viaj ellaboraĵoj ? Kial ni ambaŭ ne estas naskitaj kun ecoj konformaj kun nia mizereco ? Ni ricevis spritecon, delikatecon, sentojn. Hove ! kian malgajan uzadon ni faras de ili ! Dume tiom da animoj malaltaj kaj indaj je nia sorto ĝuas ĉiujn favorojn de fortune ! »

Tiuj pripensoj min penetris de doloro. Sed tio estis nenio, kompare kun tio, kion al ni rezervis estonteco : kaj mi sekiĝis pro timo por Manon. Ŝi jam estis enfermita en Hospitalon ; kaj kiam eĉ ŝi estus elirinta per la bona pordo, mi sciis, ke tiaspecaj refaloj havas konsekvencojn tre danĝerplenajn. Mi estus volinta al ŝi konigi miajn maltrankvilecojn ; sed mi timis okazigi al ŝi tro grandajn terurojn. Mi tremis por ŝi, ne kuraĝante ŝin averti pri la danĝero ; kaj mi kisis ŝin sopirante, por almenaŭ ŝin certigi pri mia amo, kiu estis preskaŭ la sola sento, kiun mi kuraĝis esprimi.

« Manon, mi diris, parolu sincere ; ĉu vi amos min ĉiam ? »

Ŝi respondis, ke ŝi estas tre malfeliĉa, ĉar mi povas dubi pri tio.

« Nu, mi rediris, mi ne dubas : kun tia certigo, mi volas kontraŭbatali ĉiujn miajn malamikojn. Mi utiligos mian familion por eliri el Chatelet : kaj mia tuta sango

estos utila al nenio, se mi ne vin eltiras el ĝi, tuj kiam mi estos libera. »

Ni alvenis al la malliberejo. Oni metis nin ambaŭ en apartan lokon. Tiu bato ne estis por mi tre doloriga, ĉar mi ĝin estis antaŭvidinta. Mi rekomendis Manon'on al la pordisto, konigante al li, ke mi estas viro iom distinginda, kaj promesante grandegan rekompencan. Mi kisis mian amatinon, antaŭ kiam mi ŝin lasos. Mi ŝin petegis, ke ŝi ne treege ĉagreniĝu, kaj ke ŝi timu nenion, tiel longe kiam mi estos en la mondo. Mi ne estis sen mono. Mi donis al ŝi parton de ĝi ; kaj mi pagis antaŭtempe al la pordisto, per tio, kio al mi restis, unu monaton da grava pensio por ŝi kaj por mi.

Mia mono havis tre bonan efikon. Oni min metis en ĉambron pure meblitan, kaj oni certigis al mi, ke Manon havas similan loĝejon. Mi tuj okupis min pri rimedoj taŭgaj por rapidigi mian liberecon. Estis klare, ke troviĝis en mia afero nenio absolute krima ; kaj kiam eĉ oni supozus, ke mia projekto de ŝtelado estas pruvita, dank'al la atesto de Marcel, mi tre bone sciis, ke oni ne punas simplajn intencojn. Mi decidis, ke mi skribos rapide al mia patro, por peti de li, ke li venu persone en Parizon. Mi multe malpli hontis, kiel mi jam tion diris, estante en Chatelet ol en Saint-Lazare. Cetere kvankam mi ĉiam konservis la respekton ŝulditan al patra aŭtoritato, tamen aĝo kaj sperteco multe malpligrandigis mian timemon. Mi do skribis ; kaj oni faris nenian malfacilecon ĉe Chatelet, por lasi eliri mian leteron. Sed tio estis klopodo, je kiu mi povis min senigi, se mi estus scianta, ke mia patro alvenos Parizon en la morgaŭa tago.

Li estis ricevinta la leteron, kiun mi skribis al li antaŭ ok tagoj. Li sentis pro tio grandegan ĝojon : sed kvankam mi multe lin esperigis pri mia konvertiĝo,

tamen li decidis, ke li venos sin certigi per siaj okuloj pri mia ŝanĝiĝo, kaj akordigos sian konduton laŭ la sincereco de mia pento. Li alvenis la morgaŭon post mia malliberigo. Lia unua vizito estis tiu, kiun li faris al Tiberge, al kiu mi estis petinta, ke li adresu sian respondon. Li povis koni per li nek mian loĝejon, nek mian nunan situacion. Li sciis nur miajn ĉefajn aventurojn, de kiam mi estis foririnta for de Saint-Sulpice. Tiberge parolis tre profite por mi, pri la disponoj al bono, kiujn mi estis montrinta al li en nia lasta intervidiĝo. Li aldonis, ke li kredas min tute liberigita el Manon, sed ke li tamen estas mirigita, ĉar de ok tagoj mi ne ankoraŭ donis al li novaĵojn pri mi. Mia patro ne estis trompita. Li komprenis, ke tiu silento, pro kiu Tiberge plendas, kaŝas ion, kion ĉi tiu ne divenis : kaj li uzis tiom da klopodoj por malkovri miajn postsignojn, ke, du tagojn post lia alveno, li eksciis, ke mi estas en Chatelet.

Antaŭ kiam mi ricevis lian viziton, kiun mi tute ne kredis tiel proksima, mi ricevis tiun de lia polica generaleŭtenanta Moŝto, aŭ por diri aferojn laŭ ilia nomo, mi toleris juĝistdemandon. Li faris al mi kelkajn riproĉojn ; sed ili estis nek severaj nek insultaj. Li diris dolĉe, ke li plendas pri mia malbona konduto ; ke mi ne montris saĝecon, farante al mi malamikon tian, kia G... M... ; ke vere estas facile rimarki, ke en mia afero troviĝas pli da nesingardemo kaj da malseriozeco ol da malico ; sed tamen ke estas la dua fojo, en kiu mi troviĝas antaŭ lia juĝistaro ; kaj ke li esperis, ke mi estus fariĝinta pli prudenta, post kiam mi estis ricevinta en Saint-Lazare punadmonojn dum du aŭ tri monatoj. Ĉar mite, ĉar mi havis antaŭ mi prudentan juĝiston, mi diskutis kun li laŭ maniero tiel modera kaj tiel respekta, ke li ŝajnis treege kontenta pro miaj respondoj. Li diris, ke mi ne devas min tro liveri al ĉagreno, kaj ke li sentas

sin ema fari al mi servon pro mia nobelnaskiĝo kaj mia juneco. Mi provis rekomendi al li Manon'on, kaj mi parolis laŭde pri ŝia dolĉeco kaj ŝia bona natureco. Li respondis ridante, ke li ne ŝin vidis ankoraŭ, se ke oni ŝin prezentis kiel danĝeran personinon. Tiu vorto tiel ekscitis mian amemon, ke mi diris mil pasiplenajn aferojn, por defendi mian plendindan amatinon : eĉ mi ne povis malhelpi, ke mi ne verŝis kelkajn larmojn. Li ordonis, ke oni min rekonduku al mia ĉambro.

« Amo ! amo ! ekkriis tiu grava magistrato, vidante min elirantan, ĉu neniam vi paciĝos kun saĝeco ? »

Mi estis malĝoje enprofundiĝanta en miajn ideojn, kaj pripensanta pri la interparolo, kiun mi estis havinta kun lia polica generaleŭtenanta Moŝto, kiam mi aŭdis, ke la pordo de mia ĉambro malfermiĝas : estis mia patro. Kvankam mi devis esti duone preparita por tiu vidaĵo, tial ke mi ĝin atendis post kelkaj tagoj pli poste, tamen mi estis tiel forte korfrapita, ke mi estus rapidiginta min ĝis fundo de tero, se ĝi estus malfermiĝinta sub miaj piedoj. Mi iris lin kisi kun ĉiuj signoj de grandega konfuzo. Li sidiĝis, antaŭ kiam nek li nek mi estis ankoraŭ malfermitaj la buŝon.

Ĉar mi restis staranta kun okuloj mallevitaj, kun kapo malkovrita :

« Sidiĝu, sinjoro, li diris severtone ; sidiĝu. Dank'al la skandalo de via vivado kaj de viaj friponaĵoj, mi malkovris la lokon de via loĝejo. Havas kiel utilon merito tia, kia la via, ke ĝi ne povas resti kaŝita. Vi iras al famo per neerariga vojo. Mi esperas, ke ĝia limo estos baldaŭ la placo de Grève¹, kaj ke efektive vi havos gloron esti almetita sur ĝi al la admiro de ĉiuj homoj. »

1. Elparolu : *Grev'*.

Mi nenion respondis. Li daŭrigis:

« Kiel patro estas malfeliĉa, kiam aminte filon ameme, nenion malŝparinte por igi lin honesta viro, li fine trovas en li nur friponon, kiu lin malhonoras. Oni sin konsolas pro malfeliĉo de fortuno : tempo ĝin forigas kaj ĉagreno ĝin malpligrandigas : sed kian kuracilon kontraŭ malbono, kiu ĉiutage pligrandiĝas, kontraŭ malbono tia kia la malordoj de malvirtema filo, kiu perdis ĉian senton al honoro ? Vi diras nenion, malfeliĉulo, li aldonis : vidu tiun falsan modestecon kaj tiun ŝajnon de hipokrita dolĉeco : ĉu oni ne opinius lin la plej honesta viro de lia raso? »

Kvankam mi estis devigita rekoni, ke mi meritas parton de tiuj ofendegoj, tamen ŝajnis al mi, ke li ilin supermezure grandigis. Mi kredis, ke al mi estas permesate klarigi nature mian penson:

« Mi certigas al vi, sinjoro, mi diris, ke la modesteco, en kiu vi min vidas antaŭ vi, estas neniel afektita. Ĝi estas la natura stato de nobelnaskita filo, kiu treege respektas sian patron, kaj precipe patron incitetigitan. Mi aliparte ne pretendas ŝajni la plej bonkonduthava viro de nia raso. Mi rekonas min inda je viaj riproĉoj ; sed mi petegas vin, ke vi metu en ilin iom pli da boneco, kaj ne agu kun mi same kiel kun la plej malnoblega el ĉiuj homoj. Mi ne meritas tiel ofendajn nomojn. Estas amo, vi tion scias, kiu kaŭzis ĉiujn miajn kulpojn. Fatala pasio, ho ve ! ĉu vi ne konas ĝian forton ? kaj ĉu estas eble, ke via sango, kiu estas fonto de la mia, neniam sentis samajn ardojn ? Amo faris min tro amema, tro pasia, tro fidela kaj tro komplezema al la deziroj de tute ĉarmoplena amatino ; jen estas miaj krimoj ! Ĉu vi vidas en ili ion, kio vin malhonoras ? Mi vin petegas, mia patro, mi aldonis ameme, havu iom da kompato por filo, kiu ĉiam estis

tre amema kaj tre respektema al vi, kiu ne forlasis, kiel vi pensas, honoron kaj devon, kaj kiu estas milfoje pli plendinda ol vi povas imagi. »

Finante tiujn parolojn, mi lasis fali kelkajn larmojn. Patra koro estas la ĉefverko de la naturo ; ĝi regas en ĝi, se oni povas tiel paroli, kun komplezo, kaj reguligas mem ĉiujn ĝiajn risortojn. La mia, kiu estis krom tio, spritulo kaj delikatulo, estis tiel kortuŝita de la formo donita de mi al miaj senkulpigoj, ke li ne sin sufiĉe regis por kaŝi tiun ŝanĝiĝon.

« Venu, mia kompatinda kavaliro, li diris, venu min kisi : ci inspiras al mi kompaton. »

Mi lin kisis. Li min brakpremis per maniero tia, ke mi facile juĝis tion, kio okazis en lia koro.

« Sed kian rimedon ni uzos, li rediris, por eltiri el tiu loko ? Klarigu al mi ĉiujn ciajn aferojn, nenion al mi kaŝante. »

Car reale troviĝis en la kuneco de mia tuta konduto nenio, kio min povas absolute malhonoru, almenaŭ se oni ĝin mezurus laŭ la vivmaniero de mondumaj junuloj, ĉar, en la jarcento en kiu ni estas, estas konsideritaj kiel malnoblaĵo nek amatino nek iom da lerteco por altiri al si fortunon en ludado, mi sincere rakontis detale al mia patro la vivadon de mi plenumitan. Al ĉia kulpo, pri kiu mi faris konfeson, mi zorgis aldoni famajn ekzemplojn, por de ĝi malprigrandigi la honton.

« Mi vivas kun virino, mi diris, ne estante alligita al ŝi per geedzaj ceremonioj : sed lia duka Moŝto de ... pagas la lukson de du amatinoj antaŭ okuloj de tuta Parizo. De dek jaroj, sinjoro de ... havas unu malrajtulinon, kiun li amas kun fideleco, kiun li neniam montris por sia edzino. La du trionoj inter la francaj junuloj sin honoras, havante unu litkunulinon. M[†] uzis en ludado kelkajn artifikaĵojn : sed lia markiza Moŝto

de ... havas neniajn aliajn rentojn ; lia princa Moŝto de ..., lia duka Moŝto de ... estas ĉefoj de bando de samspecaj kavaliroj. »

Pri tio, kio koncernis miajn projektojn al la monujo de du G... M...oj, mi povis pruvi same facile, ke mi ne estas sen modeloj ; sed al mi restis tro da honoro, por ke mi ne kondamnu min kaj samtempe ĉiujn aliajn, de kiuj mi estus povinta proponi ekzemplon : pro tio, mi petis de mia patro, ke li pardonu tiun krimeton, pro la du perfortaj pasioj, kiuj estis min agitintaj : venĝo kaj amo. Li petis de mi, ĉu mi povas doni kelkajn klarigojn pri la plej rapidaj rimedoj taŭgaj por ricevi mian liberecon, laŭ maniero, kiu povus evitigi tro grandajn famojn. Mi konigis la sentojn de boneco, kiujn la polica generaleŭtenanto havis por mi.

« Se vi trovus kelkajn malfacilaĵojn, mi diris, ili povos deveni nur de du G... M...oj : pro tio, mi kredas, ke estus taŭge, se vi klopodus por ilin vidi. »

Li tion promesis. Mi ne kuraĝis lin peti, ke li favore parolu pri Manon. Tio ne estis manko de braveco, sed efiko de la timo, en kiu mi estis, ke mi lin ribeligu per tia propono kaj naskigu en li ian projekton pereigan al ŝi kaj al mi. Mi estas ankoraŭ nescianta, ĉu tiu timo ne kaŭzis miajn plej grandajn malfeliĉaĵojn, malhelpante, ke mi provu la disponojn de mia patro, kaj ke mi faru penadojn, por inspiri al li sentojn favorajn al mia malfeliĉa amatino. Eble mi estus ankoraŭ instiginta lian kompaton. Mi estus antaŭgardinta lin kontraŭ la impresoj, kiujn li tro facile estis ricevonta de la maljuna G... M... Kion mi scias ? Eble mia malbona fatalo estus triumfinta ĉiujn miajn penadojn ; sed almenaŭ mi estus kulpiginta pri mia malfeliĉeco nur ĝin, kaj nur la kruelecon de miaj malamikoj.

Min lasinte, mia patro iris fari viziton al sinjoro

de G... M... Li trovis lin kun lia filo, al kiu la korpogardisto honeste estis redoninta liberecon. Mi neniam konis la ĉetalojn de ilia interparolado : sed estis tro facile ilin juĝi, dank' al iliaj mortigaj efikoj. Ili aliris kune (mi diras : la du patroj) al lia polica generaleŭtenanta Moŝto, de kiu ili petis du favorojn : la unua, min tuje elirigi el Chatelet ; la alia, malliberigi Manon'on dum la restaĵo de ŝiaj tagoj, aŭ ŝin sendi en Amerikon. En tiu tempo oni komencis enŝipigi al Mississipi multajn ekstersociajn homojn. Lia polica generaleŭtenanto donis al ili sian parolon, ke li marveturigos Manon'on per la unua elironta ŝipo. Sinjoro de G... M... kaj mia patro venis tuj kune min alporti la novaĵon pri mia libereco. Sinjoro de G... M... faris al mi ĝentilan komplimenton pri la estintaj fariĝoj ; kaj min gratulinte pri la feliĉo, kiun mi havas, havante tian patron, li min admonis, ke mi de nun profitu liajn konsilojn kaj liajn ekzemplojn. Mia patro ordonis, ke mi petu senkulpigojn pri la pretendita insulto, kiun mi faris al lia familio, kaj ke mi lin danku, ĉar li klopodis kun li pro mia liberigo. Ni eliris kune, ne dirante unu vorton pri mia amatino. Mi ne kuraĝis paroli pri ŝi kun la karcergardistoj en ilia ĉeesto. Ho ve ! miaj malĝojaj rekomendoj estus estintaj tute senutilaj ! La kruela ordono estis veninta samtempe kun tiu de mia liberigo. Tiu malfeliĉa knabino estis kondukita post unu horo al Hospitalo, por en ĝi esti kunligita kun kelkaj aliaj malfeliĉulinoj, kondamnitaj toleri la saman sorton. Ĉar mia patro min devigis lin sekvi al la domo, en kiu li prenis loĝejon, estis preskaŭ la sesa vespere, kiam mi trovis momenton por realiri al Chatelet. Mi intencis nur havigi al Manon kelkajn trinkaĵojn kaj ŝin rekomendi al la pordisto ; ĉar mi ne esperis, ke la libereco ŝin vidi estos al mi donita. Same mi ne ankoraŭ

estis havinta tempon pripensi al rimedoj taŭgaj por ŝin liberigi.

• Mi petis por paroli kun la pordisto. Li estis kontenta pro mia malavareco kaj pro mia dolĉeco : pro tio, estante ema fari al mi servon, li parolis pri la sorto de Manon kaj pri la malfeliĉo, kiun li multe bedaŭris ; ĉar ĝi povis min ĉagreni. Mi ne komprenis tiun paroladon. Ni interparolis dum kelka momento, ne nin komprenante reciproke. Fine, ekvidinte, ke mi bezonas klarigojn, li ilin donis al mi tiel, kiel mi jam havis la abomenon ilin diri al vi, kaj kiel mi ĝin havas ankoraŭ, ilin redirante. Neniam perforta apopleksio kaŭzis efikon pli subitan kaj pli teruran. Mi falis kun kora batego tiel doloriga, ke, en momento kiam mi perdis konscion, mi kredis min liberigita el vivo por ĉiam. Eĉ restis io de tiu penso, kiam mi rekonsciiĝis. Mi turnis miajn rigardojn al ĉiuj flankoj de la ĉambro kaj al mi mem, por certigi al mi, ĉu mi havas ankoraŭ la malfeliĉan econ de homo vivanta. Estas certe, ke al mi obeanta nur la naturan ekmovon, kiu instigas, ke oni sin liberigu el siaj suferoj, nenio povis ŝajni pli dolĉa ol la morto en tiu momento de malespero kaj de konsterno. La religio mem ne povis prezenti al mi post morto ion pli netolereblan ol tiujn kruelajn konvulsiojn, de kiuj mi estis turmentita. Tamen dank' al miraklo propra al amo, mi baldaŭ retrovis sufiĉe da forto por danki la ĉielon, ke li redonis al mi konscion kaj saĝon. Mia morto estus utila nur al mi. Manon bezonis mian vivon por ŝin liberigi, ŝin helpi, ŝin venĝi. Mi ĵuris, ke mi laborados por tio sen ia indulgo.

La pordisto donis al mi la tutan helpadon, kiun mi estus povinta esperi de la plej bonaj el miaj amikoj. Mi akceptis liajn servojn kun la plej kora dankemo.

« Ho ve ! mi diris, vi do estas kortuŝita de miaj

ĉagrenoj. Mia patro mem estas kredeble unu el miaj plej kruelaj persekutantoj. Neniu min kompatas. Vi sola, en loĝejo de krueleco kaj de barbareco, montras kompaton al la plej mizera inter ĉiuj homoj. »

Li konsilis, ke mi ne min montru sur la strato, kiam mi ne estos iom resaniĝinta el la konfuzo, en kiu mi estis.

« Lasu, lasu, mi respondis elirante ; mi vin revidos pli frue ol vi pensas. Preparu la plej nigran el viaj karceroj ; ĉar mi eklaboros por ĝin meriti. »

Efektive miaj projektoj sin turnis unue al grav-aĵoj : min liberigi el la du G... M...oj kaj el la polica generaleŭtenanto, kaj poste rapidegi kun manoj arm-itaj al Hospitalo, kun ĉiuj, kiujn mi povus dungi por mia entrepreno. Mia patro mem estus estinta apenaŭ respektita en venĝo, kiu ŝajnis al mi tiel justa ; ĉar la pord-isto ne kaŝis, ke li kaj G... M... estis la aŭtoroj de mia pereco. Kiam mi estis farinta kelkajn paŝojn sur stratoj, kaj kiam aero estis iom refreŝiginta mian sangon kaj miajn humorojn, mia kolerego iom post iom estis anstataŭita de sentoj iom pli prudentaj. La morto de miaj mal-amikoj estus estinta por Manon malmulte utila, kaj kredeble ĝi riskigis al mi, ke mi vidos min senigita je ĉiuj rimedoj por ŝin helpi. Kian alian vojon mi povis malfermi al mia venĝo ? Mi kolektis ĉiujn miajn fort-ojn kaj ĉiujn miajn pensojn por unue laboradi al la li-berigo de Manon, remetante la tutan ceteron post la sukceso de tiu grava entrepreno. Al mi restis malmulte da mono. Tio tamen estis la necesa fundamento, per kiu mi devis komenci. Mi vidis nur tri personojn, de kiuj mi povus ĝin esperi : sinjoro de T..., mia patro kaj Tiberge. Estis malmulte verŝajne, ke mi ricevus ion de tiuj du lastaj ; kaj mi hontis lacigi la alian per miaj altrudaĵoj. Sed ne estas en malespero, ke oni konservas

indulgojn. Mi iris tuj al seminario de Saint-Sulpice, ne zorgante, ĉu mi estos en ĝi rekonita. Mi vokis 'Tiberge' on. Liaj unuaj paroloj al mi komprenigis, ke li ne scias ankoraŭ miajn aventurojn. Tiu ideo al mi ŝanĝigis la projekton, kiun mi havis, lin kortuŝi per kompato. Mi ĝeneralmaniere parolis pri la plezuro, kiun mi estis havinta, revidante mian patron; kaj poste mi petis de li, ke li pruntedonu iom da mono, pretekstante, ke mi volas pagi, antaŭ kiam mi eliros el Parizo, kelkajn ŝuldojn, kiujn mi deziras lasi nekonitaj. Li tuje prezentis al mi sian monujon. Mi prenis kvin cent frankojn el ses cent, kiujn mi trovis en ĝi. Mi proponis al li garantibiletan: li estis tro malavara por ĝin akcepti.

De tiu loko mi realiris al sinjoro de T... Mi havis kun li nenian kaŝemon. Mi al li faris elmontron de miaj malfacilaĵoj kaj de miaj ĉagrenoj: li jam ilin konis ĝis ĝiaj plej malgrandaj cirkonstancoj, pro la zorgo, kiun li estis havinta, sekvi la aventuron de la juna G... M... Tamen li min aŭskultis kaj min plendis multe. Kiam mi petis de li konsilojn pri rimedoj taŭgaj por liberigi Manon'on, li respondis malgaje, ke li vidas en tio tiom malmulte da lumo, ke, krom eksterordinara interveno de ĉielo, oni devas forlasi ĉian esperon: ke li speciale aliris al Hospitalo, de kiam ŝi estis en ĝin enfermita; ke li mem ne povis ricevi permeson ŝin vidi; ke ordonoj de la polica generaleŭtenanto estis tute severegaj; kaj ke, por plenigi la malfeliĉon, la mizera bando, en kiun ŝi devas eniri, estas elironta la posttagmezon de l' tago, en kiu ni estas. Mi estis tiel konsternita de lia parolado, ke li estus povinta paroli dum unu horo, kaj mi ne estus pensinta lin interrompi. Li daŭrigis, dirante, ke li ne min vizitis en Chatelet, por doni al si pli da facileco por min servi, se oni kredus lin sen ligo kun mi; ke, de kelkaj horoj, de kiuj mi estis elirinta el ĝi,

li estis havinta ĉagrenon ne scii, en kiun lokon mi rifuĝis, kaj ke li deziris min vidi rapide por doni la solan konsilon, per kiu laŭ ŝajno mi povus esperi ŝanĝojn en la sorto de Manon, sed konsilon tiel danĝeroplanan, ke li petis, ke mi kaŝu eterne lian partoprenon en ĝi : ĝi estis, elekti kelkajn bravulojn, kiuj havus kuraĝon ataki la gardistojn de Manon, kiam ili estos elirintaj el Parizo kun ŝi. Li ne atendis, ke mi parolu pri mia malriĉeco.

« Jen estas cent monpistojoj, li diris, prezentante lian monujon, kiuj povos eble utili al vi. Vi ilin redonos kiam fortune estos restariginta viajn aferojn. »

Li aldonis, ke, se la zorgo pri lia bonfamo estus permesinta, ke li entreprenu mem la liberigon de mia amatino, li estus proponinta sian brakon kaj sian spadon.

Tiu grandega malavareco min kortuŝis ĝis larmoj. Mi uzis, por montri mian dankemon la tutan vivegecon, kiun mia malĝojeco lasis al mi ankoraŭ. Mi petis de li, ĉu nenio estas esperebla per la vojo de propetoj al la polica generaleŭtenanto. Li diris, ke li pensis al tio ; sed li kredas, ke tiu rimedo estas neutila, tial ke tianatura favoro ne povas esti petita sen motivoj ; kaj li ne tre bone vidas, kian motivon oni povas uzi, por igi gravan kaj potencon personon propetanto en ĝi ; ke se oni povas esperi ion en tiu flanko, tio povas fariĝi nur ŝanĝigante la senton de sinjoro de G... M... aŭ de mia patro, kaj ilin admonante, ke ili petu mem de lia polica generaleŭtenanta Moŝto, ke li eksigu sian sentencon. Li proponis al mi, ke li faros ĉiujn siajn penadojn por gajni la junan G... M... 'on, kvankam li kredas lin iom malvarmigita por li, pro iaj suspektoj, kiujn li havis pri li, okaze de nia afero ; kaj li min admonis, ke de mia flanko mi nenion forgesu, por fleksi la spiriton de mia patro.

Tio ne estis por mi malgrava entrepreno ; mi tion diras, ne nur pro la malfacileco, kiun kompreneble mi devis trovi por ĝin venki, sed pro alia motivo, kiu igis min timi eĉ ĝian komencon ; mi estis forkurinta for de lia loĝejo malgraŭ liaj ordonoj ; kaj tuj kiam mi eksciis la malĝojan fatalon de Manon, mi tute decidis, ke mi ne revenos en ĝin. Mi rajte timis, ke li min detenigos malgraŭ mia volo, kaj eĉ ke li min rekondukos en provincon. Mia pli maljuna frato jam estis uzinta kun mi tian farmanieron. Estas vere, ke mi estis fariginta pli maljuna ; sed aĝo estas malforta rimedo kontraŭ forto. Tamen mi trovis vojon, kiu min savis el danĝero : ĝi estis lin vokigi en publikan lokon, kaj min anoncigi al li per alia nomo. Tuj mi prenis tiun decidon. Sinjoro de T... iris ĉe G... M... 'on kaj mi en Luksemburĝon, kie mi sendis averti mian patron, ke ĝentilhomo el liaj servantoj estas lin atendanta. Mi timis, ke li havos ian malfacilecon por veni, ĉar nokto alproksimiĝis. Tamen li aperis post iom da tempo, sekvite de sia lakeo. Mi petis de li, ke ni prenu aleon, en kiu ni povos esti solaj. Ni faris almenaŭ cent paŝojn, ne parolante. Kredeble li imagis, ke tiaj preparoj ne estis faritaj sen grava intenco. Li atendis mian paroladon, kaj mi ĝin meditis.

Fine mi malfermis buŝon.

« Sinjoro, mi diris tremante, vi estas bona patro. Vi min plenigis je favoroj, kaj al mi pardonis nekalkuleblan nombron da kulpoj. Pro tio, ĉielo estas atestanto, ke mi havas por vi ĉiujn sentojn de la plej amema kaj plej respektema filo. Sed ŝajnas..., ke via severeco...

— Nu ! mia severeco ? interrompis mia patro, kiu sendube trovis, ke mi parolas malrapide pro lia malpacienco.

— Ha ! sinjoro, mi rediris, ŝajnas, ke via sever-

eco estas supermezura en la maniero, per kiu vi agas kun la malfeliĉa Manon. Vi fidis al sinjoro de G... M... Lia malamo ŝin prezentis al vi laŭ la plej nigraj koloroj. Vi formis al vi pri ŝi abomenan ideon. Tamen ŝi estas la plej dolĉa kaj la plej aminda kreitaĵo en la tuta mondo. Kial ne plaĉis al ĉielo, ke ĝi inspiru al vi deziron ŝin vidi eĉ unu momenton? Kiel mi estas certa, ke ŝi estas ĉarmoplena, tiel, mi ne dubas pri tio, ŝi estus ŝajninta al vi tia. Vi estus fariĝinta partiano al ŝi. Vi estus malameginta la nigrajn artifaĵojn de G... M... Vi estus kompatinta ŝin kaj min. Ho ve! mi estas certa pri tio; via koro ne estas nesentema: vi estus lasinta vin kortuŝi!»

Li min denove interrompis, vidante, ke mi parolas kun ardo, kiu ne estus ebliginta, ke mi finu tuj. Li volis scii, kion mi intencas trafi per tiel pasia parolado.

«Peti de vi vivon, mi respondis, kiun mi ne povas konservi eĉ unu momenton, se Manon aliras al Ameriko.

— Ne, ne, li diris per tono severa; mi pli amas vidi cin sen vivo, ol sen saĝeco kaj sen honoro.

— Do, ni ne iru pli malproksimen; mi ekkriis, lin haltigante per la brako: tiun malamindan kaj netolerblan vivon demetu de mi; ĉar en la malespero, en kiun vi min ĵetas, morto estos por mi favoro. Ĝi estas donaco inda je la mano de patro.

— Mi donus al ci tion, kion ci meritas, li respondis. Mi konas multe da patroj, kiuj ne estus tiel longatempe atendintaj, por esti mem ciaj ekzekutistoj: sed estas mia boneco tro granda, kiu cin difektis.»

Mi ĵetis min antaŭ liajn piedojn.

«Ha! se restas ankoraŭ iom da ĝi, mi diris, ilin kisante, ne igu vin malmola kontraŭ miaj ploroj. Pri-pensu, ke mi estas via filo... Ho ve! memoru pri mia patrino. Vi ŝin amis tiel ameme! Ĉu vi estus tolerinta,

ke oni ŝin eltiregu el viaj brakoj? Vi estus defendinta ŝin ĝis la morto. Ĉu aliuloj ne havas koron, kiel vi? Ĉu oni povas esti barbara, kiam unufoje oni sentis tion, kio estas amemo kaj doloro?

— Ne parolu pli longe pri cia patrino, li rediris per voĉo kolera; tiu memoro varmigas mian indignon. CIAJ malordoj ŝin mortigus pro doloro, se ŝi estus vivinta sufiĉe da tempo por ilin vidi. Ni finu tiun interparolon, li aldonis; ĝi min tedas, kaj ne ĉesigos mian decidon. Mi revenas al mia loĝejo. Mi ordonas, ke ci min sekvu. »

La tono seka kaj malmola, per kiu li komandis tiun ordonon, al mi komprenigis, ke lia koro estas nefleksebla. Mi malproksimiĝis je kelkaj paŝoj, timante, ke li deziros min aresti per siaj propraj manoj.

« Ne pligrandigu mian malesperon, mi diris, min devigante vin malobei. Estas neeble, ke mi vin sekvu, same neeble, ke mi vivu post la krueleco, per kiu vi agas kun mi. Pro tio, mi diras al vi eternan adiaŭon. Mia morto, kiun vi baldaŭ ekscios, mi aldonis malĝoje, eble reprenigos de vi patrajn sentojn al mi. »

Ĉar mi turnis min por lin forlasi:

« Do ci rifuzas min sekvi? li ekkriis kun vivega kolero. Iru, alkuru al cia pereco. Adiaŭ, maldankema kaj ribelanta filo!

— Adiaŭ, mi diris en mia ekscitego; adiaŭ, barbara kaj malnaturigita patro! »

Mi tuj eliris el Luksemburgo. Mi marŝis sur stratoj kiel furiozulo ĝis la domo de sinjoro de T... Marŝante, mi levis okulojn kaj manojn por alvoki ĉiujn ĉielajn potencaĵojn.

« Ho, ĉielo, mi diris, ĉu vi estas tiel senkompata kiel homoj? Mi ne havas plu helpon atendotan krom de vi! »

Sinjoro de T... ne estis ankoraŭ realirinta en sian hejmon ; sed li revenis, kiam mi estis atendinta lin dum kelkaj minutoj. Liaj klopodoj ne pli bone sukcesis ol la miaj. Li tion diris kun vizaĝo malĝojega. La juna G... M..., kvankam malpli incitegita ol lia patro kontraŭ Manon kaj kontraŭ mi, tamen ne estis volinta entrepreni por mi favoran propeton. Li sin senkulpigis, dirante, ke li mem timas tiun vengeman maljunulon, kiu jam multe estis kolerinta kontraŭ li, lin riproĉante pri liaj intencoj de amkomercado kun Manon. Do al mi restis la vojo de la perforto, kiel sinjoro de T... al mi estis de ĝi desegninta planon : mi en ĝi metis ĉiujn miajn esperojn.

« Ili estas tre necertaj, mi diris ; sed la pli firma el tiuj esperoj kaj la pli konsolanta por mi estas almenaŭ morti en la entrepreno. »

Mi lin lasis, petante de li, ke li min helpadu per siaj bondeziroj ; kaj mi nur pensis kunligi kun mi kamaradojn, al kiuj mi povos komuniki unu fajreron de mia kuraĝo kaj de mia decido.

La unua, kiu prezentiĝis al mia spirito, estis tiu sama korpogardisto, kiun mi jam uzis por aresti G... M... 'on. Mi intencis ankaŭ pasigi nokton en lia ĉambro, ĉar mi ne estis havinta la spiriton sufiĉe liberan dum la tagmezo, por min provizi je loĝejo. Mi lin trovis sola. Li havis ĝojon, vidante, ke mi estis elirinta el Chatelet. Li amike proponis al mi siajn servojn. Mi klarigis al li tiujn, kiujn li povis fari por mi. Li havis sufiĉe da prudento por ekvidi ĉiujn iliajn malfacilecojn ; sed li estis sufiĉe grandanima por ilin superi. Ni uzis parton de la nokto en diskutadoj pri mia projekto. Li parolis pri la tri gardosoldatoj, kiujn li jam uzis en la lasta okazo, kiel pri tri bravuloj tute provitaj. Sinjoro de T... min estis informinta tre akurate pri la nombro de pafarkistoj, kiuj

devis konduki Manon'on : ili estis nur ses. Kvin viroj maltimaj kaj kuraĝaj sufiĉis por doni teruron al tiuj sentaŭguloj, kiuj ne estas kapablaj sin honore defendi, kiam ili povas eviti la danĝeron de batalo per malkuraĝaĵo. Ĉar mono ne mankis al mi, la korpogardisto konsilis, ke mi malŝparu nenion por certigi la sukceson de nia atako.

« Ni bezonas ĉevalojn kaj pistolojn, li diris, kaj por ĉiu el ni unu musketon. Mi prenas sur min min okupi morgaŭ pri tiuj preparaĵoj. Oni bezonas ankaŭ tri komunajn vestojn por niaj soldatoj, kiuj ne kuraĝus sin montri en tiunatura afero kun uniformo de regimento. »

Mi metis en liajn manojn la cent monpistoilojn, kiujn mi estis ricevinta de sinjoro de T... Ili estis utiligitaj la morgaŭon ĝis la lasta monero. La tri soldatoj pasis parade antaŭ mi. Mi ilin instigis per grandaj promesoj ; kaj, por depreni de ili ĉian malfidon, mi komencis fari al ili donacon da dek monpistoiloj. Kiam alvenis la tago por la plenumo de l'entrepreno, mi tre frumatene sendis unu el ili al Hospitalo, por ke li sin sciigu per siaj propraj okuloj pri la momento, en kiu la pafarkistoj eliros kun sia akiraĵo. Kvankam mi estis preninta tiun antaŭzorgon nur pro troeco de maltrankvileco kaj de antaŭvideco, tamen okazis, ke ĝi estis absolute necesa. Mi estis fidinta al kelkaj malveraj informoj, kiujn oni estis doninta al mi pri ilia vojo : kaj estante konvinkita, ke en la Rochelle ¹ tiu plorinda bando estis enŝipigota, mi estus perdinta miajn klopodojn, ĝin atendente sur la vojo al Orléans ². Tamen mi estis informita, dank' al la raporto de la gardosoldato, ke ĝi

1. Elparolu : *Roŝel*.

2. Elparolu : *Orlean*.

prenis la vojon al Normandujo, kaj ke el Havre-de-Grâce ĝi devis aliri al Ameriko.

Ni nin direktis tuj al la pordo Saint-Honoré³, zorgante iri per diversaj stratoj. Ni nin kunigis en la fino de l'antaŭurbo. Niaj ĉevaloj estis freŝaj. Post malmulte da tempo ni ekvidis la ses gardistojn kaj la du malkluksegajn veturilojn, kiujn vi vidis en Pacy antaŭ du jaroj. Tiu vidaĵo preskaŭ deprenis de mi forton kaj konscion.

« Ho fortune, mi ekkriis, kruela fortune ! almenaŭ donu al mi morton aŭ venkon ! »

Momente ni konsiliĝis inter ni pri la maniero, per kiu ni faros nian atakon. La pafarkistoj apenaŭ troviĝis antaŭ kvar cent paŝoj antaŭ ni ; kaj ni povis ilin preteriri, pasante tra malgranda kampo, ĉirkaŭ kiu kurbiĝis la vojo. La korpogardisto opiniis, ke ni prenu tiun vojon por ilin surprizi, rapidegante subite al ili. Mi aprobis lian penson ; kaj mi estis la unua, kiu spronpikis sian ĉevalon. Sed fortune senkompatate forĵetis miajn dezirojn. La pafarkistoj, vidante tiujn rajdantojn, kiuj alkuris al ili, ne dubis, ke ili faris tion por ilin ataki. Ili sin metis en defendo, preparante siajn bajonetojn kaj siajn pafilojn kun ŝajno sufiĉe maltima. Tiu vidaĵo, kiu nin instigis la korpogardiston kaj min, subite formetis la kuragon for de niaj tri malkuraĝaj kunuloj. Ili haltis kvazaŭ akorde, kaj inter si dirinte al si kelkajn vortojn, kiujn mi ne aŭdis, ili turnis la kapojn de siaj ĉevaloj por repreni la vojon al Parizo, bridon faliginte.

« Dioj, diris la korpogardisto, kiu ŝajnis tiel konfuzegita kiel mi pro tiu malnoblega forlaso, kion ni ekfaros ? Ni estas nur du. »

3. Elparolu : *Sint-Honore*.

Mi estis perdinta voĉon pro kolerego kaj pro miro. Mi haltis, ne certa ĉu mia unua venĝo ne devas sin turni al la persekutado kaj al la punado de malkuraĝuloj, kiuj nin forlasis. Mi rigardis ilin forkurantajn, kaj direktis okulojn aliflanken al pafarkistoj. Se estus estinta eble, ke mi min dividu, mi estus rapideginta samtempe sur tiujn du objektojn de mia kolerego : mi ilin ĉiujn estus kune manĝeginta. La korpogardisto, kiu komprenis mian necertecon per la freneza movado de miaj okuloj, petis de mi, ke mi aŭskultu lian konsilon.

« Ĉar ni estas nur du, li diris, estus freneze ataki ses virojn tiel bone armitajn kiel ni, kaj kiuj ŝajnas nin atendi per firma piedo. Ni devas reveni Parizon, kaj peni pli bone sukcesi en la elekto de niaj bravuloj. La pafarkistoj ne povas fari en unu tago longan vojaĝon kun du pezaj veturiloj ; ni ilin realiros morgaŭ sen malfacileco. »

Mi momente pripensis pri tiu decido ; sed, vidante en ĉia flanko nur motivojn por malespero, mi prenis decidon vere malesperan. Ĝi estis danki mian kunulon pro liaj bonservoj : kaj ne nur mi ne atakos la pafarkistojn, sed mi decidis, ke mi iros al ili kun submetiĝo, kaj petos de ili, ke ili min akceptu en sia bando, por akompani kun ili Manon'on ĝis Havre-de-Grâce, kaj poste transiri kun ŝi la marojn.

« Ĉiuj homoj min persekutas aŭ min perfidas, mi diris al la korpogardisto. Mi ne povas plu fidi al ia persono. Mi ne atendas plu ion, ĉu de fortune, ĉu de homoj. Miaj malfeliĉaĵoj estas plenigitaj : al mi restas nur la submetiĝo. Pro tio mi fermas okulojn al ĉia ajn espero. Povu ĉielo vin rekompensi por via grandanimeco. Adiaŭ ; mi iras, helponte mian malbonan sorton, por ke ĝi tute plenumu mian ruinon ; kaj al ĝi tute vole mi mem alkuras. »

Li senutile multe penadis por min instigi, ke mi revenu Parizon. Mi petis de li, ke li lasu min sekvi miajn decidojn, kaj ke li min tuje forlasu ; ĉar mi timis, ke la pafarkistoj daŭrigos kredi, ke mia decido estas ilin ataki.

Mi iris sola al ili per malrapida paŝado kun vizaĝo tiel malĝojega, ke ili devis trovi nenion timindan en mia alproksimiĝo.

« Rekuraĝigu vin, sinjoroj, mi diris, alirante al ili : mi ne alportas al vi militon ; mi venas peti de vi favoron. »

Mi petis de ili, ke ili daŭrigu sian vojaĝon ne malfidante ; kaj mi ilin sciigis, dum la marŝado, pri la favoro, kiun mi esperis de ili. Ili konsiliĝis inter si, laŭ kia maniero ili devas akcepti tiun proponon. La ĉefo de la bando prenis parolon por la aliaj. Li respondis, ke la ordonoj, kiujn ili havis pri la observado al siaj kaptitinoj, estas severegaj ; sed ke mi ŝajnis tiel beleta junulo, ke li kaj liaj kunuloj iomete malstreĉos sian devon ; sed ke mi devas kompreni, ke tio kostos al mi iom da mono. Restis al mi ĉirkaŭ dekkvino da monpistojoj : kompreneble mi diris al ili el kio konsistis la enhavo de mia monujo.

« Nu, diris la pafarkisto, ni agos malavare. Al vi kostos unu horo unu skudon por interparoli kun ia ajn el niaj knabinoj, kiu plej plaĉos al vi : tio estas la prezaro en Parizo. »

Mi ne estis parolinta al ili speciale pri Manon, ĉar mi ne intencis, ke ili konu mian pasion. Ili unue imagis, ke tio estas junula fantazio, kiu min instigis serĉi iom da tempopasigo kun unu el tiuj kreitaĵoj : sed kiam ili kredis ekvidi, ke mi estas amanta, ili tiel forte pli-grandigis la prezon, ke mia monujo troviĝis elĉerpita,

kiam ni eliris el Mantes¹, en kiu ni estis enlitiĝintaj, dum la tago, en kiu ni alvenis Pacy'on.

Cu mi diros al vi, kia estis la plorinda temo de miaj interparoloj kun Manon, dum tiu vojaĝo, aŭ kian impreson ŝia vidiĝo faris al mi, kiam mi estis ricevinta de gardistoj la liberecon alproksimiĝi al ŝia ĉareto. Ha! esprimoj ĉiam tradukas nur duone la sentojn de l' koro: sed figuru al vi mian kompatindan amatinon enkatenumitan en mezo de korpo, sidantan sur amaseto de pajlo, kun kapo malenergie apogiĝanta sur flankon de la veturilo, kun vizaĝo pala kaj malsekigita de rivereto da larmoj, kiuj faris al si eliron tra ŝiaj palpebroj, kvankam ŝi senĉese havis okulojn fermitajn. Ŝi eĉ ne estis havinta sciemon ilin malfermi, kiam ŝi estis aŭdinta la bruon de gardistoj, kiuj timis, ke oni ilin atakos. Ŝia tolaĵo estis malpura kaj malordigita; ŝiaj delikataj manoj almetitaj al ofendoj de l' aero; fine tiu ĉarmoplena kunmetaĵo, tiu vizaĝo, kapabla rekonduki universon al idolservado, ŝajnis esti en malordo kaj en senkuraĝeco neesprimeblaj. Mi uzis kelkan tempon por ŝin konsideri, rajdante flanke de la ĉareto. Mi tiel malmulte atentis al mi mem, ke multajn fojojn mi preskaŭ ekfalas danĝere. Miaj sopiroj, miaj oftaj ekkrioj al mi aliris kelkajn rigardojn de ŝi. Ŝi min rekonis, kaj mi rimarkis, ke en la unua ekmovo, ŝi provis rapidi for de la veturilo por alveni al mi; sed estante detenita de sia kateneno, ŝi refalis en sian unuan sintenadon. Mi petis de pafarkistoj, ke ili haltu momente pro kompato: ili tion konsentis pro avareco. Mi lasis mian ĉevalon por sidiĝi apud ŝin. Ŝi estis tiel malenergia kaj tiel malfortigita, ke dum longa tempo ŝi ne povis uzi sian

1. Elparolu: *Mant'*.

langon aŭ movi siajn manojn. Dum tiu tempo, mi ilin malsekigis de miaj ploroj ; kaj, ĉar mi mem ne povis elparoli unu solan vorton, ni estis ambaŭ en unu el plej malĝojaj situacioj, je kiu neniam ekzistis ekzemplo. Kiam ni estis retrovintaj liberecon por paroli, niaj esprimoj ne estis malpli malgajaj. Manon parolis malmulte : ŝajnis, ke honto kaj doloro estis difektintaj la organon de ŝia voĉo : la sono estis malforta kaj tremanta. Ŝi dankis min, ĉar mi ne ŝin forgesis, kaj ĉar mi donis al ŝi tiun kontenton, ŝi diris sopirante, ke ŝi vidas min unufoje ankoraŭ, kaj povas diri al mi lastan adiaŭon. Sed kiam mi estis ŝin certiginta, ke nenio estas kapabla min eligi el ŝi, kaj ke mi estas preta ŝin sekvi ĝis ekstremo de l' mondo por prizorgi pri ŝi, por ŝin ami kaj por kunligi nedisigeble mian mizeran fatalon kun la ŝia, tiu kompatinda knabino sin liveris al sentoj tiel amemaj kaj tiel dolorplenaj, ke mi timis, ke ŝia vivo estas minacita de tro perforta kortuŝeco. Ĉiuj movadoj de ŝia animo ŝajnis kuniĝi en ŝiaj okuloj. Ŝi ilin tenis fiksitaj al mi. Kelkafoje ŝi malfermis buŝon, ne havante forton por fini la vortojn, kiujn ŝi estis komencinta. Tamen kelkaj paroloj eliris el ĝi. Ili estis signoj de admiro pro mia amo, amemaj plendoj pri ĝia trograndiĝo, duboj, ĉu ŝi povas esti sufiĉe feliĉa por esti inspirinta al mi tiel perfektan pasion, instigoj, por ke mi forlasu mian intencon ŝin sekvi, kaj por ke mi serĉu aliloke feliĉecon indan je mi, kiun laŭ ŝia diro mi ne povis esperi de ŝi.

Spite plej kruela sorto, mi trovis mian feliĉecon en ŝiaj rigardoj, kaj en la certeco, kiun mi havis, pri ŝia ameco. Vere mi estis perdinta ĉion, kion ceteraj homoj estimas, sed mi estis mastro de la koro de Manon, la sola riĉaĵo, kiun mi ŝatas. Vivi en Eŭropo aŭ en Ameriko min indiferentigis, kia ajn estu la loko, se mi estas certa, ke mi estos feliĉa, en ĝi vivante kun mia amat-

ino. Ĉu la tuta universo ne estas patrujo por du fidelaj amantoj? Ĉu ili ne trovas reciproke unu en la alia patron, patrinon, amikojn, riĉaĵojn kaj feliĉecon? Se io kaŭzis al mi maltrankvilecon, ĝi estis timo, ke mi vidos Manon'on suferantan pro bezonoj naskitaj de malriĉeco. Mi jam supozis min kun ŝi en regiono ne kulturita kaj loĝita de sovaĝuloj.

« Mi estas tre certa, mi diris, ke ne povas ekzisti pli kruelaj sovaĝuloj ol G... M... kaj mia patro. Almenaŭ ili lasos min vivi en paco. Se la rakontoj faritaj pri ili estas fidindaj, ili sekvas leĝojn de naturo. Ili konas nek furiozaĵojn de avareco, kiu posedas G... M... 'on, nek fantaziajn ideojn pri honoro, kiuj faris mian patron mal-amiko al mi. Ili ne malkvietigos du amantojn, kiujn ili vidos vivi kun tiom da simpleco, kiom ili faras. »

Mi do estis trankvila pri tiu flanko. Sed mi ne formis en mi romanajn ideojn pri la komunaj bezonoj de la vivado. Tro ofte mi konstatis, ke estas necesaj, kies manko fariĝas netolerebla, precipe por tro delikata knabino, kiu estis kutiminta vivmanieron oportunan kaj sufiĉegan. Mi malesperis, ĉar senutile mi estis elĉerpinta mian monujon, ĉar la iomo da mono, kiu restis ankoraŭ, estas baldaŭ rabota de la friponeco de pafarkistoj. Mi priensis, ke kun malgranda monsumo, mi estus povinta esperi ne nur min subteni kontraŭ la malriĉeco en Ameriko, en kiu mono estas malofta, sed eĉ formi ian entreprenon por daŭrebla firmo. Tiu konsidero naskigis en mi penson skribi al Tiberge, kiun mi ĉiam estis trovinta tiele rapidema por prezenti al mi la helpadon de amikeco. Mi skribis en la unua urbo, en kiu ni pasis. Mi donis al li nenian alian motivon ol la premantan bezonon, en kiu mi antaŭvidis, ke mi min trovos en Havrede-Grâce, kien, mi tion al li konfesis, mi estis kondukinta Manon'on. Mi petis de li cent monpistoilojn.

« Ilin sendu al mi al Havre mi diris, pere de la poŝtestro. Vi bone scias, ke tio estas la lasta fojo en kiu mi tedas vian amikecon, kaj ke, ĉar mia malfeliĉa amantino estas formetita por ĉiam, mi ne povos lasi ŝin elirantan, ne donante kelkajn helpilojn, kiuj plidolĉigos ŝian sorton kaj miajn mortigajn bedaŭrojn. »

La pafarkistoj fariĝis tiel postulemegaj, kiam ili estis malkovrintaj la perforton de mia pasio, ke, duobligante la prezon de siaj plej malgravaj favoroj, baldaŭ ili min plimalriĉigis ĝis la plej plena mizereco. Cetero amo ne ebligis, ke mi malŝparu mian monujon. De mateno ĝis vespero mi forgesis min apud Manon : kaj ne laŭ horoj la tempo estis mezurita al mi, sed laŭ la tuta longeco de tagoj. Fine kiam mia monujo estis tute malplena, mi troviĝis suferanta kapricojn kaj bestecon de ses sentaŭguloj, kiuj agis kun mi per netolerebla aroganteco. Vi estis atestanto pri tio en Pacy : tiu renkonto estis feliĉa momento de interrompo, kiu estis donita al mi de fortuna. Via kompatato, kiam vi vidis miajn ĉagrenojn, estis mia sola rekomendo por via malavara koro. La helpo, kiun vi donis al mi libere, min utilis atingigi al mi Havre'on : kaj la pafarkistoj respektis sian promeson kun pli da fideleco ol mi esperis.

Mi alvenis al Havre. Unue mi iris al la poŝto. Tiberge ne estis havinta ankoraŭ tempon sufiĉan por respondi. Mi min informis, en kiu tago mi povas akurate atendi lian leteron. Ĝi povis alveni nur post du tagoj : kaj per stranga dispono de mia malbona sorto, okazis, ke nia ŝipo estis elironta en la morgaŭo ¹ de tago, en kiu

1. En la franca teksto legiĝas la vorto : *le lendemain* (*la morgaŭo*). Sed kun tiu vorto la frazo ne havas sencon. Kredeble ĝi estas plumeraro de la aŭtoro, kaj oni devas ĝin anstataŭigi per la vorto : *la veille* (*la hieraŭo*).

mi atendis la poŝtkurieron. Mi ne povas montri al vi mian malesperon.

« Kio? mi diris, ĉu en la malfeliĉo mem, necese estas, ke mi ĉiam estu distingita per malmoderaĵoj? »

Manon respondis :

« Ho ve ! ĉu tiel malĝoja vivo meritas la zorgon, kiun ni havas por ĝi ? Ni mortu en Havre, mia kara kavaliro. Morto finu subite niajn mizeraĵojn ! Ĉu ni iros ilin treni en nekonita lando, en kiu kredeble ni devos toleri terurajn suferojn, tial ke oni volis ilin doni al mi kiel turmentegon ? Ni mortu, ŝi ripetis ; aŭ prefere donu al mi morton, kaj iru serĉi alian sorton en brakoj de pli feliĉa amantino.

— Ne, ne, mi diris : estas por mi enviinda sorto esti malfeliĉa kun vi. »

Sia parolado min tremigis. Mi juĝis, ke ŝi estas premegita de siaj malbonaĵoj. Mi penis preni ŝajnon pli trankvilan por demeti de ŝi tiujn pereigajn pensojn al morto kaj al malespero. Mi decidis, ke mi havos saman konduton en estonteco ; kaj poste mi konstatis, ke nenio estas pli kapabla inspiri al virino kuraĝon, ol la maltimo de la viro, kiun ŝi amas.

Kiam mi estis perdinta esperon ricevi helpadon de Tiberge, mi vendis mian ĉevalon. La mono, kiun mi eltiris el tiu vendo, aldoniĝante kun tio, kio restis ankoraŭ el viaj malavaraĵoj, liveris al mi la malgrandan monsumon da deksep monpistojoj. Mi uzis sep el ili por aĉeti kelkajn helpilojn necesajn al Manon kaj mi enfermis zorge la dek aliajn, kiuj devis esti la fundamento de nia fortuno kaj de niaj esperoj en Ameriko. Mi havis nenian malfacilecon por min akceptigi en la ŝipo. Oni serĉis tiam junulojn, kiuj estis emaj sin vole kunigi kun la kolonio. Transveturado kaj nutraĵo estis donitaj al mi senpage. Ĉar la poŝtkuriero al Parizo estis

elironta la morgaŭon, mi lasis al li leteron por Tiberge. Ĝi estis kortuŝanta kaj kredeble kapabla lin emocii ĝis la lasta grado, ĉar ĝi prenigis de li decidon, kiu povis deveni nur de senfina fundo de amemo kaj de grand-animeco al malfeliĉa amiko.

Oni metis la velaron. La vento ne ĉesis esti favora. Mi ricevis de la kapitano apartan lokon por Manon kaj por mi. Li havis bonecon min rigardi per alia okulo ol la komunon de miaj mizeraj kunligitoj. De la unua tago, mi estis preninta lin aparte ; kaj, por altiri de li ian konsideron, mi estis malkovrinta al li parton de miaj malfeliĉaĵoj. Mi ne kredis igi min kulpa per honta mensogo, dirante, ke mi estas edziĝinta kun Manon. Li ŝajnigis min kredi, kaj donis al mi sian protekton, de kiu ni ricevis pruvojn dum la tuta marveturado. Li zorgis, ke ni estu nutritaj konvene ; kaj la estimontroj, kiujn li havis al ni, utilis nin respektigi de kunuloj de nia mizereco. Mi havis senĉesan atenton, por ke Manon ne suferu la plej malgrandan maloportunajon. Ŝi tion tre bone rimarkis ; kaj tiu vidaĵo, kuniĝante kun la viva sento pri la stranga malsupereco al kiu mi min plimaltigis por ŝi, ŝin igis tiel amema, tiel pasia, tiel zorgoplena al miaj plej malgrandaj bezonoj, ke estis inter ŝi kaj mi senĉesa superemo de servadoj kaj de amo. Mi ne bedaŭris Eŭropon. Kontraŭe ; ju pli ni alproksimiĝis al Ameriko, des pli mi sentis, ke mia koro plilarĝiĝas kaj fariĝas trankvila. Se mi estus estinta certa, ke al mi ne mankos absolutaj necesajoj de l' vivo, mi estus dankinta fortunon, ke ĝi donis al niaj malfeliĉaĵoj tiel favoran direkton.

Post dumonata marveturado, ni fine albordiĝis al tiel dezirita bordo. Unuavide la lando prezentis al ni nenion agrablan. Ĝi estis farita de senfruktaj kaj ne-loĝitaj kamparoj, en kiuj apenaŭ oni vidis kelkajn kan-

ojn kaj kelkajn arbojn senfoliigitajn de vento. Nenia postsigno de homoj aŭ de bestoj. Tamen kiam la kapitano estis pafinta kelkajn kanonojn de nia artilerio, ni post tempo mallonga ekvidis aron da urbanoj de nova Orléans, kiuj alproksimiĝis al ni kun vivaj signoj de ĝojo. Ni ne estis malkovrintaj la urbon. Ĝi estis kaŝita je tiu flanko per malalta monteto. Ni estis akceptitaj kiel homoj malsuprenirintaj el ĉielo. Tiuj malriĉaj loĝantoj rapidis fari al ni mil demandojn pri la stato de Francujo, kaj pri la diversaj provincoj, en kiuj ili estis naskiĝintaj. Ili nin kisis kiel siajn fratojn, kaj kiel karajn kunulojn, kiuj venis partopreni ilian mizerecon kaj ilian solecon. Ni prenis kun ili la vojon al urbo, sed ni estis mirigitaj, malkovrante, dum ni antaŭeniris, ke tio, kion oni estis fanfaroninta al ni kiel bonan urbon, estas nur kolekto de kelkaj malriĉaj dometoj. Ili estis loĝitaj de kvin aŭ ses cert personoj. La domo de la koloniestro ŝajnis iom pli distinginda pro sia alteco kaj sia situacio. Ĝi estas defendita de kelkaj teraj fortikaĵoj, ĉirkaŭ kiuj rondiĝas larĝa fosaĵo.

Unue ni estis prezentitaj al li. Li longatempe interparolis sekrete kun la kapitano, kaj poste, revenante al ni, li konsideris unu post la alia ĉiujn knabinojn, kiuj estis alvenintaj per la ŝipo. Ili estis nombre tridek : ĉar ni estis trovintaj en Havre alian bandon, kiu estis kuniĝinta kun la nia. Post kiam la koloniestro estis ekzameninta ilin dum longa tempo, li alvokis diversajn junulojn de l' urbo, kiuj sekiĝis en atendado de edzino. Li donis al la precipaj la plej beletajn ; kaj la restaĵo estis lotita. Li ne estis ankoraŭ parolinta pri Manon ; sed kiam li estis ordoninta, ke la aliaj eliru, li nin ambaŭ restigis ŝin kaj min.

« Mi eksciis de la kapitano, li diris, ke vi estas geedziĝintaj, kaj ke li, dum la vojaĝo, rekonis en vi

du personojn de spirito kaj de merito. Mi ne eniras en motivojn, kiuj kaŭzis vian malfeliĉon : sed, se estas vere, ke vi havas tiom da bonsocieteco kiom via vizaĝo kredigas al mi, mi nenion ŝparos por plidolĉigi vian sorton ; kaj vi mem kunlaboros por trovi al mi ian plezuron en tiu sovaĝa kaj senhoma loko. »

Mi respondis laŭ la maniero, kiun mi kredis plej inda por plifortigi la ideon, kiun li havis pri ni. Li donis kelkajn ordonojn por preparigi al ni loĝejon en urbo, kaj nin detenis por vespermanĝi kun li. Li ne faris al ni publike demandojn pri la fundo de niaj aventuroj. Interparolado estis ĝenerala ; kaj malgraŭ nia malgajeco ni penadis, Manon kaj mi, por ke ĝi fariĝu agrabla.

Vespere, li nin kondukigis al la loĝejo, kiun oni estis preparinta al ni. Ni trovis malluksegan dometon, faritan el tabuloj kaj el koto, kiu konsistis el du aŭ tri ĉambroj sur teretaĝo kun grenejo supre. Li estis metiginta en ĝin kvin aŭ ses seĝojn kaj iajn oportunaĵojn necesajn al la vivo. Manon ŝajnis timigita, vidante tiel malgajan loĝejon. Estis por mi multe pli ol por ŝi, ke ŝi ĉagreniĝis. Ŝi sidiĝis, kiam ni estis solaj, kaj komencis plori maldolĉege. Mi unue penadis ŝin konsoli. Sed kiam ŝi estis kompreniginta al mi, ke min solan ŝi kompatas, kaj ke ŝi konsideras en niaj komunaj malfeliĉaĵoj nur tion, kio estos suferota de mi, mi afekte montris sufiĉe da kuraĝo kaj da ĝojo, por ilin inspiri al ŝi.

« Pro kio mi plendus ? mi diris. Mi posedas ĉion, kion mi deziras. Vi min amas ; ĉu tio ne estas vera ? ĉu neniam mi proponis al mi alian feliĉecon ? Ni lasu al ĉielo la zorgon pri nia fortune. Mi ne ĝin trovas tiele malesperiga. La koloniestro estas bonsocieta viro : li montris al ni konsideron : li ne permesos, ke al ni manku necesajoj. Pri tio kio rilatas kun la malriĉeco de nia

dometo kaj kun la maldelikateco de niaj mebloj, vi povis rimarki, ke estas ĉi tie malmulte da personoj, kiuj ŝajnas pli bone lokigitaj kaj meblitaj ol ni. Cetere ci estas admirinda ĥemiistino, mi aldonis, ŝin kisante, ĉar ci ĉion aliformigas en oron.

— Vi do estos la plej riĉa persono en la tuta universo, ŝi respondis; ĉar se neniam estis amo tia, kia la via, same estas neeble, ke iu estu pli ameme amita ol vi. Mi redonas al mi justecon, ŝi daŭrigis. Mi bone sentas, ke neniam mi meritis tiun mirindan amecon, kiun vi havas por mi. Mi kaŭzis al vi ĉagrenojn, kiujn vi povis pardoni al mi nur dank' al grandega boneco. Mi estis malserioza kaj malfidela; kaj eĉ vin amante profundkore, kiel mi ĉiam faris, mi estis nur maldankulino. Sed vi ne povas kredi, kiel mi estas ŝanĝita. Miaj larmoj, kiujn, de nia eliro el Francujo, vi vidis tiel ofte fluantajn, ne havis kiel kaŭzon miaj proprajn malfeliĉaĵojn, ne, eĉ unu fojon. Mi ĉesis ilin senti, tuj kiam vi komencis ilin partopreni. Mi ploris nur pro amemo kaj pro kompato al vi. Mi ne min konsolas, ĉar mi povis vin ĉagreni eĉ unu momenton en la vivo. Mi ne ĉesas min riproĉi pro miaj malkonstantaĵoj, kaj min emocii, admirante, de kio amo vin igis kapabla por malfeliĉulino, kiu ne estis inda je ĝi, kaj kiu ne tro pagus per sia tuta sango, ŝi aldonis, plioftigante siajn larmojn, la duonon de ĉagrenoj, kiujn ŝi al vi okazigis. »

Siaj ploroj, ŝia parolado, kaj la tono, per kiu ŝi ĝin elparolis, faris sur mi tiel strangan impreson, ke mi kredis senti en mia animo specon da divido.

« Atentu, mi diris, atentu, mia kara Manon. Mi ne havas sufiĉe da forto por toleri tiel vivajn signojn de cia amemo; mi ne estas kutiminta troecojn da ĝojo. Ho Dio! mi ekkriis, mi ne petas plu de vi ion. Mi estas certigita pri la koro de Manon: ĝi estas tia, kia mi

deziris, ke ĝi estu por esti feliĉa ; de nun mi ne povas ĉesi esti tia. Jen estas mia feliĉeco bone starigita.

— Ĝi estas tia, ŝi rediris, se vi ĝin dependigas de mi ; kaj mi bone scias, ke mi povas esti certa, kie ĉiam mi trovos la mian. »

Mi enlitiĝis kun tiuj ĉarmaj ideoj, kiuj ŝanĝis mian dometon en palacon indan je la plej potenca reĝo en la mondo. Post tio, Ameriko ŝajnis al mi loko de feliĉegaĵoj.

« En novan Orléans'on oni devas veni, mi diris ofte al Manon, kiam oni volas gustumi la verajn dolĉaĵojn de l' amo. Ĉi tie oni sin amas reciproke sen profitdeziroj, sen ĵaluzeco, sen malkonstanteco. Niaj sampatrujanoj ĉi tien venas por serĉi oron ; ili ne imagas, ke ni trovis trezorojn multe pli ŝatindajn. »

Ni zorge kulturis la amikecon de l' koloniestro. Li havis bonecon, kelkajn semajnojn post nia alveno, doni al mi malgrandan oficon, kiu troviĝis neokupita en la fortikaĵo. Kvankam ĝi ne estis tre distingiga, mi ĝin akceptis kiel favoron de ĉielo. Ĝi metis min en staton tian, ke mi povis vivi, estante ŝarĝo por neniu. Mi dungis servistinon por Manon. Nia malgranda fortuno aranĝiĝis. Mi estis reguligita en mia konduto, kaj Manon ne malpli ol mi. Mi ne preterlasis okazon fari servon aŭ bonaĵon al niaj najbaroj. Tiu komplezema dispono kaj la dolĉeco de niaj manieroj altiris al ni la konfidon kaj la amemon de la tuta kolonio. Post kelke da tempo, ni fariĝis tiel ŝatitaj, ke ni estis konsideritaj kiel la unuaj personoj de l' urbo post la koloniestro.

La senkulpeco de niaj okupadoj kaj la trankvileco, en kiu ni estis senĉese, utilis por nin revenigi iom post iom al ideoj de religio. Neniam Manon estis estinta malpia knabino. Mi miavice ne estis unu el tiuj senhontaj malĉastuloj, kiuj sin glorigas, aldonante al sia malreligienco la putriĝon de siaj moroj. Amo, juneco estis kaŭzintaj ĉiujn

miajn malordojn. La sperteco komencis anstataŭi por ni la maljunaĝon : ĝi faris en ni la saman efikon ol multeco da jaroj. Niaj interparoloj, kiuj ĉiam estis seriozaj, nin metis nesentible en deziron de virta amo. Mi estis la unua, kiu proponis al Manon tiun ŝanĝon. Mi konis la principojn de ŝia koro. Ŝi estis rektanima kaj natura en ĉiuj ŝiaj sentoj ; kaj tiaj kvalitoj ĉiam instigas al virto. Mi komprenigis al ŝi, ke io mankas al nia feliĉeco.

« Tio estas, mi diris, ĝin aprobigi de ĉielo. Ni ambaŭ havas tro belan animon kaj koron tro bone faritan por vivi vole en forgeso al devo. Oni komprenas, ke ni vivis tiel en Francujo, en kiu estis same neeble, ĉu ĉesi nin ami reciproke, ĉu nin kontentigi per rajta vojo : sed en Ameriko, en kiu ni dependas nur de ni mem, en kiu ni ne estas plu devigitaj respekti arbitrajn leĝojn de rango kaj de konveneco, en kiu eĉ oni kredas nin geedziĝintaj, kio malhelpas, ke baldaŭ ni estu tiaj efektive, kaj nobligu nian amon per ĵuroj, kiujn rajtigas religio ? Pri mi, mi oferas al vi nenion novan, oferante mian koron kaj mian manon ; sed mi estas preta renovigi tiun donacon piede de altaro. »

Sajnis al mi, ke tiu parolado ŝin penetris de ĝojo.

« Ĉu vi kredus, ŝi respondis, ke milfoje mi pensis al tio, de kiam ni estas en Ameriko. La timo, ke mi malplaĉos al vi, enfermigis de mi tiun deziron en mian koron. Mi ne havas malhumilecon tian, ke mi esperas supreniri ĝis la eco de via edzino.

— Ha ! Manon, mi rediris, baldaŭ ci estus edzino de reĝo, se ĉielo estus naskiĝiginta min kun krono. Ni ne ŝanceliĝu. Ni havas nenian barilon por timi. De hodiaŭ mi volas paroli pri tio al la koloniestro, kaj konfesi, ke ĝis nun ni lin trompis. Ni lasu timi al vulgaraj geamantoj, mi aldonis, la nerompeblajn ĉenojn de la

geedziĝo. Ili ne timus ilin, se ili estus certaj kiel ni, ke ili ĉiam portos la ĉenojn de l' amo. »

Mi lasis Manon'on plenigitan de ĝojo pro tiu decido.

Mi estas certa, ke ne ekzistas en mondo viro honesta, kiu ne estus aprobinta miajn projektojn en la cirkonstancoj, en kiuj mi troviĝis, estante fatale sklavigita de pasio, kiun mi ne povis venki, kaj kontraŭbatalita de konscienciproĉoj, kiujn mi ne povis sufoki. Sed ĉu ekzistas iu, kiu kulpigos miajn plendojn, dirante, ke ili estas maljustaj ; se mi ĝemas pri la severeco de ĉielo forĵetanta projekton, kiun mi estis forminta nur por plaĉi al ĝi ? Ho ve ! Kion mi diras ? Ne nur ĝi ĝin forĵetis, sed ĝi ĝin punis kvazaŭ krimon. Ĝi min toleris pacience, dum mi marŝis blinde sur la vojo al malvirto : kaj ĝiaj plej kruelaj punegoj estis rezervitaj al mi, kiam mi komencis reveni al virto. Mi timas, ke fortoj mankos al mi por fini la rakonton de la plej pereiga fariĝo, kiu estis iam.

Mi iris al la koloniestro, kiel mi estis decidinta tion kun Manon, por peti de li, ke li konsentu la ceremonion de nia geedziĝo. Certe mi estus preferinta paroli pri tio nek al li nek al iu ajn, se mi estus esperinta, ke lia privata pastro, kiu estis la sola pastro en la tuta urbo, estus farinta al mi tiun servon sen lia partopreno : sed ĉar mi ne kuraĝis esperi, ke li bonvolos konservi silenton, mi decidis, ke mi agos malkaŝe. La koloniestro havis nevon nomitan Synnelet¹, kiu estis al li treege kara. Li estis tridekjara viro, brava, sed kolerema kaj perfortema. Li ne estis edziĝinta. De la unua tago de nia alveno, la beleco de Manon estis kortuŝinta lin ; kaj la

1. Elparolu : *Sinele*.

multaj okazoj, kiujn li estis havinta ŝin vidi dum naŭ aŭ dek monatoj estis tiel flamigintaj lian pasion, ke li sekrete konsumiĝis por ŝi. Tamen, ĉar li estis certa, kiel lia onklo kaj la tuta urbanaro, ke mi estas reale edziĝinta, li superis sian amon ĝis tia grado, ke li lasis nenion eksplodi ; kaj eĉ lia zorgo montriĝis por mi en kelkaj okazoj, kiujn li havis, fari al mi servon. Mi lin trovis kun lia onklo, kiam mi alvenis al la fortikaĵo. Mi havis nenian motivon, kiu min devigis fari al li sekreton pri mia intenco : pro tio, mi faris nenian malfacilecon klarigi mian deziron en lia ĉeesto. La koloniestro min aŭskultis kun lia kutima boneco. Mi rakontis al li parton de mia historio, kiun li plezure aŭdis ; kaj kiam mi petis de li, ke li ĉeestu ĉe la ceremonio, kiun mi meditis, li havis la malavarecon promesi, ke li faros la tutan elspezon de la festo. Mi eliris tute kontenta.

Post unu horo, mi vidis la pastron enirantan ĉe min. Mi imagis, ke li venas doni al mi kelkan informon pri mia edziĝo : sed post kiam li estis salutinta min malvarme, li konigis al mi per du vortoj, ke lia koloniestra Moŝto malpermesas, ke mi pensu al tiu geedziĝo, ĉar li havas aliajn projektojn pri Manon.

« Aliajn projektojn pri Manon ! mi diris kun mortiga premeĝo en koro. Kiajn projektojn do ? sinjoro pastro. »

Li respondis, ke mi scias, ke lia koloniestra Moŝto estas estro ; ke, ĉar Manon estas sendita el Francujo por la kolonio, al li apartenas disponi de ŝi ; ke ĝis nun li tion ne faris, tial ke ĝis nun li kredis, ke ŝi estas edziniĝinta ; sed ke, ĉar li eksciis de mi mem, ke ŝi ne estas tia, li opiniis dece ŝin doni al sinjoro Synnelet, kiu ŝin amas. Mia vivegeco superis mian singardemon. Mi ordonis fiere al la pastro, ke li foriru for de mia domo, ĵurante, ke nek koloniestro, nek Synnelet, nek

la tuta urbanaro kune kuraĝos meti la manon sur mian edzinon aŭ sur mian amatinon, kiel ili volos ŝin nomi.

Mi tuj konigis al Manon la pereigan novaĵon, kiun mi ĵus estis ricevinta. Ni opiniis, ke post mia eliro Synnelet estis deloginta la spiriton de sia onklo, kaj ke tio estas efiko de ia projekto meditata jam de longa tempo. Ili estis la plej fortaj. Ni troviĝis en nova Orléans kvaŝaŭ en mezo de maro, tio estas, disigitaj el la restaĵo de mondo per vastegaj spacoj. Kien forkuri, en lando nekoniata, senhoma aŭ loĝita de kruelaj bestoj aŭ de sovaĝuloj tiel kruelaj kiel ili? Mi estis estimita en la urbo; sed mi ne povis esperi, ke mi kortuŝos la popolon sufiĉe favore al mi, por esperi de ĝi helpadon proporciitan kun la malbono. Mono estis necesega; mi estis malriĉa. Cetero la sukceso de popola ribelo estis necerta; kaj se fortune estus perfidinta nin, nia malfeliĉeco estus fariĝinta ne kuracebla. Mi rulis ĉiujn pensojn en mia kapo. Parton de ili mi komunikis al Manon. Mi formis novajn ideojn, ne aŭskultante ŝian respondon. Mi prenis decidon, kiun mi tuj forĵetis por preni alian. Mi parolis sola; mi respondis laŭte al miaj pensoj: fine mi estis en agitiĝo tia, ke mi ne povus ĝin kompari kun io, tial ke neniam ekzistis io simila al ĝi. Manon havis siajn rigardojn direktitajn al mi. Ŝi juĝis per mia maltrankvileco la grandecon de la danĝero; kaj, tremante por mi pli ol por ŝi mem, tiu amema knabino ne eĉ kuraĝis malfermi buŝon por esprimi siajn timadojn. Post multego da pripensoj, mi haltis en tiu decido, ke mi iros trovi la koloniestron, kaj penados lin kortuŝi per konsideroj pri honoro kaj per la memoro de mia respekto kaj de lia amemo. Manon volis kontraŭstari kontraŭ mia eliro. Ŝi diris kun larmoj en okuloj:

« Vi iras al morto. Ili vin mortigos. Mi ne vidos plu vin. Mi volas morti kun vi. »

Mi bezonis uzi multajn penadojn por ŝin konvinki, ke estas necese, ke mi eliru, kaj same ke ŝi restu en loĝejo. Mi promesis, ke ŝi min revidos post unu momento. Si kaj mi same ne sciis, ke sur ŝin mem estis falonta la tuta kolero de ĉielo kaj la furiozeco de niaj malamikoj.

Mi aliris al la fortikaĵo : la koloniestro estis kun sia privata pastro. Por lin kortuŝi mi min malaltigis ĝis submetiĝoj, kiuj estus mortigintaj min pro honto, se mi estus farinta ilin pro ĉia alia kaŭzo ; mi lin prenis per ĉiuj motivoj, kiuj devas fari certan impreson sur koro, kiu ne estas tiu de tigro sovaĝa kaj kruela. Tiu barbarulo faris al miaj plendoj nur du respondojn, kiujn li centfoje ripetis :

« Manon, li diris, dependas nur de li. Li donis sian parolon al sia nevo. »

Mi estis decidinta, ke mi moderigos min ĝis ekstremo. Mi min kontentigis, dirante, ke mi kredas, ke li tro estas unu el miaj amikoj por voli mian morton, al kiu mi konsentus prefere ol al la perdo de mia amatino.

Mi elirinte estis tro konvinkita, ke mi havis nenion por esperi de tiu obstinema maljunulo, kiu milfoje sin estus inferkondamninta por sia nevo. Tamen mi persistis en mia projekto konservi ĝis fino ŝajnon de modereco, decidinte, ke, se oni venus al malmoderaĵoj de maljusteco, mi donos al Ameriko unu el plej sangoplenaj kaj plej teruraj scenoj, kiujn amo estus produktinta. Mi revenis hejmen, meditante tiun projekton, kiam la sorto, kiu volis rapidigi mian ruinon, al mi renkontigis Synnelet'on. Li legis en miaj okuloj parton de miaj pensoj : mi jam diris, ke li estis brava : li venis al mi :

« Ĉu vi ne serĉas min ? li diris : mi rekonas, ke miaj projektoj vin ofendas, kaj mi bone antaŭvidis, ke necese estas, ke ni tranĉu niajn gorgojn kune. Ni iru por vidi kiu estos plej feliĉa. »

Mi respondis, ke li estas prava, kaj ke nur mia morto povas fini niajn disputojn. Ni foriĝis, je kelkaj centoj da paŝoj, for de la urbo. Niaj spadoj kruciĝis : mi preskaŭ samtempe lin vundis kaj senarmigis. Li estis tiel kolerega pro sia malfeliĉaĵo, ke li rifuzis peti de mi vivon kaj forlasi Manon'on. Eble mi estis rajtigita demeti de li subite la unuan kaj la alian : sed grandanima sango neniam mensogas al si mem. Mi ĵetis al li lian spadon.

« Ni rekomencu, mi diris : kaj pripensu, ke tiufoje estos senkompate. »

Li min atakis per neesprimebla furiozeco. Mi devas konfesi, ke mi ne estis tre lerta en spaduzado, havinte nur tri monatojn da skermoĉambro en Parizo. Amo kondukis mian spadon. Tamen Synnelet traboris mian brakon de rando al rando ; sed mi lin prenis sur la tempo ¹, kaj donis al li baton tiel fortikan, ke li falis antaŭ miaj piedoj, senmova.

Malgraŭ la ĝojo, kiun donas venko post mortiga batalo, mi tuj pripensis pri la konsekvencoj de tiu morto. Por mi estis esperinda nek pardono nek prokrasto en punego. Konante, kiel mi sciis, la pasion de la koloniestro al lia nevo, mi estis certa, ke mia morto ne estos prokrastita eĉ de unu horo, post kiam li estos koninta la lian. Kvankam tiu timo estis premanta, tamen ĝi ne estis la plej forta kaŭzo de mia maltrankvileco. Manon, la utiloj de Manon, la danĝero en kiu ŝi estis, kaj la neceseco, ke mi perdos ŝin, min konfuzis tiele, ke mallumaĵo sterniĝis sur miaj okuloj, kaj malhelpis, ke mi rekonu la lokon, en kiu mi estas. Mi bedaŭris la sorton de Synnelet ; rapida morto ŝajnis al mi la sola kuracilo taŭga

1. Skerma teknikajo.

por miaj ĉagrenoj. Tamen estis tiu penso mem, kiu rapide realvokigis de mi miajn spiritojn, kaj faris min kapabla preni decidon.

« Kio? Mi volas morti, mi ekkriis, por fini miajn ĉagrenojn! Do estas doloroj, kiujn mi timas pli ol la perdon de tio, kion mi amas! Ha! Mi suferu ĝis plej kruelaj ekstremajoj por helpadi al mia amatino, kaj mi prokrastu morton ĝis kiam mi estos suferinta ilin neutile!»

Mi reprenis la vojon al urbo. Mi eniris en mian hejmon; mi en ĝi trovis Manon' on duonmortantan pro timado kaj maltrankvileco. Mia ĉeesto ŝin revivigis. Mi ne povis kaŝi la teruran akcidenton, kiu estis okazinta al mi. Ŝi falis svenanta inter miaj brakoj, aŭdante rakonton pri la morto de Synnelet kaj ri mia vundo. Mi uzis pli ol unu kvaronon da horo por ŝin rekonsciigi.

Mi mem estis duonmortanta; mi ne vidis eĉ la plej malgrandan malfermaĵon por ŝia sendanĝereco kaj por la mia.

« Manon, kion ni faros? mi diris, kiam ŝi estis repreninta iom da fortikeco. Ho ve! kion ni ekfaros? Necese estas, ke mi foriru. Ĉu vi volas resti sola en tiu urbo? Jes; restu en ĝi. En ĝi vi povas ankoraŭ esti feliĉa: kaj mi, mi iros for de vi serĉi morton meze de sovaĝuloj aŭ sub la ungegoj de kruelaj bestoj.»

Ŝi leviĝis malgraŭ sia malfortikeco kaj min prenis per la mano por min konduki al la pordo.

« Ni forkuru kune, ŝi diris, kaj ne perdu eĉ unu momenton. Eble la korpo de Synnelet estas jam trovita hazarde, kaj ni ne havus tempon por nin malproksimigi.

— Sed, mia kara Manon, mi rediris, tute emociita, diru do al mi, kien ni povos iri. Ĉu vi vidas ian rimedon? Ĉu ne estus pli bone, se vi penadus vivi ĉi tie sen mi, kaj se mi vole portus mian kapon al la koloniestro?»

Tiu propono nur pligrandigis ŝian ardon por forkuri. Mi devis ŝin sekvi. Mi havis ankoraŭ sufiĉe da spiritĉeesto por preni elirante kelkajn fortajn likvorojn, kiujn mi havis en mia ĉambro, kaj la ĉiujn provizojn, kiujn ni povis enirigi en niajn poŝojn. Ni diris al niaj servistoj, kiuj estis en la apuda ĉambro, ke ni eliras por la vesperpromenado : ĉiutage ni havis tiun kutimon : kaj ni nin malproksimigis el urbo pli rapide ol la delikateco de Manon ŝajnis tion ebligi.

Kvankam mi ne estis elirinta el mia maldecideco pri la loko de nia rifuĝejo, tamen mi havis du esperojn, sen kiuj mi estus preferinta morton al la necerteco pri tio, kio povus alveni al Manon. De preskaŭ dek monatoj, de kiam mi estis en Ameriko, mi estis akirinta sufiĉe da konoj pri la lando, por scii per kia maniero oni mal-krueligas la sovaĝulojn. Oni povas sin meti en iliajn man-ojn, ne kurante al certa morto : mi eĉ estis lerninta kelk-ajn vortojn de ilia lingvo kaj kelkajn el iliaj kutimoj, en diversaj okazoj, en kiuj mi ilin vidis. Kun tiu malgaja rimedo, mi havis alian helpilon flanke de Angloj, kiuj havas kiel ni firmojn en tiu parto de nova mondo : sed mi estis terurita pro la malproksimeco. Ni devis trairi ĝis iliaj kolonioj senfruktajn kamparojn, kies larĝeco devigis multajn tagojn de marŝado, kaj kelkajn mont-ojn tiel altajn kaj tiel krutajn, ke la vojo ŝajnis mal-facila eĉ al la plej maldelikataj kaj la plej fortikaj viroj. Mi esperis tamen, ke mi povus utiligi tiujn du ri-medojn : sovaĝuloj helpus al ni por nin konduki, kaj Angloj nin akceptus en siaj loĝejoj.

Ni marŝadis tiel longatempe kiel la kuraĝo de Ma-non povis ŝin subteni, tio estas ĉirkaŭe dum du mejloj : ĉar tiu nekomparebla amantino konstante rifuzis halti pli frue. Fine premegite de laceco, ŝi konfesis, ke estas al ŝi neeble iri pli antaŭen. Jam noktiĝis. Ni sidiĝis en

mezo de vasta ebenaĵo, ne povinte trovi arbon por nin meti sub ĝia kovrilo. Ŝia unua zorgo estis ŝanĝi la tol-aĵon de mia vundo, kiun ŝi estis bandaĝinta mem antaŭ nia eliro. Vane mi kontraŭbatalis ŝiajn voladojn : sed ŝi, antaŭ kiam ŝi pensos al sia propra konservado, volis esti certa, ke mi troviĝas ne suferanta kaj ne minacita de danĝero : se mi estus rifuzinta al ŝi tiun kontentigon, mi estus mortige frapinta ŝin neripareble. Dum kelkaj momentoj, mi min submetis sub ŝiaj deziroj : mi ricevis ŝiajn flegojn kun silento kaj kun honto. Sed kiam ŝi estis kontentiginta sian amemon, kun kia ardo la mia reprenis sian vicon ! Mi min senigis je ĉiuj miaj vestoj, kaj ilin etendis sub ŝin, por ke ŝi trovu la teron malpli malmola ; mi ŝin konsentigis, malgraŭ ŝia volo, ke ŝi vidu min utiligantan por ŝia uzo ĉion, kion mi povis imagi malpli maloportuna. Mi varmigis ŝiajn manojn per miaj ardantaj ŝmacadoj kaj per la varmeco de miaj sopiroj. Mi pasigis tutan nokton maldormante apud ŝi, kaj preĝante ĉielon, ke ĝi donu al ŝi dolĉan kaj kvietan dormadon. Ho Dio ! kiel miaj deziroj estis vivaj kaj sinceraj ! kaj pro kia severega juĝo vi decidis, ke vi ne ilin aŭskultos.

Pardonu, se mi finas per malmulte da vortoj rakonton, kiu min mortigas : mi rakontas malfeliĉaĵon, kiu neniam havis similan ekzemplon. Mia tuta vivado estas difinita por ĝin plori. Sed kvankam mi senĉese ĝin portas en mia memoro, tamen mia animo ŝajnas reeniri pro abomeno, ĉiufoje kiam mi komencas ĝin esprimi.

Ni estis pasigintaj trankvile parton da nokto ; mi kredis mian karan amatinon dormanta, kaj mi ne kuragis eligi la plej malfortan spirbloveton, timante, ke mi konfuzos ŝian dormadon. Tuj kiam frumateniĝis, mi ekvidis, tuŝante ŝiajn manojn, ke ŝi havas ilin malvarmaj. Mi ilin alproksimigis al mia brusto, por ilin varmigi. Ŝi sentis tiun ekmovon ; kaj, farinte penon por ek-

kapti la miajn, ŝi diris al mi per malforta voĉo, ke ŝi kredas sin en sia lasta horo. Mi unue vidis en tiu parolado nur ordinaran esprimmanieron de malfeliĉeco, kaj mi respondis al ŝi per amemaj konsoloj de amo. Sed ŝiaj oftaj sopiroj, ŝia silento al miaj demandoj, la premado de ŝiaj manoj, en kiuj ŝi daŭrigis teni la miajn, al mi konigis, ke la fino de ŝiaj malfeliĉaĵoj alproksimiĝas. Ne postulu de mi, ke mi priskribu miajn sentojn, kaj ke mi realportu ŝiajn lastajn esprimojn. Mi ŝin perdis: mi ricevis de ŝi signojn de amo en momento mem, kiam ŝi elspiris sian lastan bloveton: jen estas ĉio, kion mi havas forton al vi konigi pri tiu fatala kaj plorinda fariĝo.

Mia animo ne sekvis la ŝian. Kredeble ĉielo opiniis, ke mi ne estis sufiĉe severe punita. Ĝi volis, ke de tiu tempo mi trenu vivon senenergian kaj mizeran. Kaj nun mi ne esperas, ke ĝi estos iam pli feliĉa.

Mi restis pli ol dudek-kvar horoj kun buŝo alligita al vizaĝo kaj al manoj de mia kara Manon. Mia intenco estis morti ĉi tie; sed, komence de la dua tago, mi pripensis, ke, post mia pereco, ŝia korpo riskos fariĝi nutr-aĵo por sovaĝaj bestoj. Mi decidis, ke mi ĝin enterigos, kaj atentos morton sur ŝia fosajo. Mi jam estis tiel proksima al mia vivfino, pro la malfortigo, kiun fasto kaj doloro estis kaŭzintaj en mi, ke mi bezonis multnombrajn penadojn por min starigi. Mi estis devigita peti helpon de likvoroj, kiujn mi estis alportinta. Ili redonis tiom da fortikeco, kiom mi bezonis, por la malgaja laboro, kiun mi devis plenumi. Ne estis malfacile malfermi la teraĵon en la loko, en kiu mi troviĝis. Ĝi estis kamparo kovrita de sablo. Mi rompis mian spadon, por ke ĝi min utilu por fosi; sed mi eltiris el ĝi malpli da utilo ol el miaj manoj. Mi malfermis larĝan fosajojn; mi en ĝin metis la idolon de mia koro, post kiam mi estis

ŝmacadinta ŝin milfoje kun la tuta ardego de plej perfekta amo. Mi sidiĝis ankoraŭ apud ŝi ; mi ŝin longatempe rigardadis : mi ne povis min decidi fermi la fosaĵon. Fine, ĉar miaj fortoj komencis malfortiĝi, timante, ke ili tute mankos al mi antaŭ la fino de mia entrepreno, mi entombigis por ĉiam en bruston de tero tion, kion ĝi estis portinta plej perfektan kaj plej amindan : poste mi kuŝiĝis sur la fosaĵon kun vizaĝo sin turnanta al sablo ; kaj ferminte la okulojn kun decido, ke neniam mi ilin malfermos, mi malpacience atendis morton. Tio, kio ŝajnos al vi malfacile kredinda, estas, ke, dum la tuta plenumado de tiu funebra funkcio, eliris el miaj okuloj nenia larmo, el mia buŝo nenia sopiro. La profunda konsterno, en kiu mi estis, kaj mia neŝanĝebla decido morti, estis rompintaj la fluadon al ĉiuj esprimoj de malespero aŭ de doloro. Pro tio, mi ne restis longatempe en la teniĝo, en kiu mi estis sur la fosaĵo, sen ke rapide mi perdas la iomon da konscio kaj da sento, kiuj restis en mi.

Post tio, kion vi aŭdis, la konkludo de mia historio havas tiel malmulte da graveco, ke ĝi ne meritas la penadon, kion vi bonvolas fari por ĝin aŭskulti. Kiam ia korpo de Synnelet estis realportita al urbo, kaj liaj vundoj zorge ekzamenitaj, okazis, ke ne nur li ne estis malviva, sed ke li ne eĉ estis ricevinta danĝerigan vundon. Li konigis al sia onklo laŭ kia maniero la aferoj okazis inter ni ; kaj lia grandanimeco lin instigis publikigi tuje la efikojn de la mia. Oni min serĉigis, kaj mia foresto kun Manon suspektigis, ke ni ambaŭ estis decidintaj forkuri. Estis tro malfrue por sendi iun post miaj postsignoj : sed la morgaŭo kaj sekvanta tago estis uzitaj por min persekuti. Oni min trovis sen ŝajno de vivo sur la tombo de Manon ; kaj tiuj, kiuj min malkovris en tiu stato, vidante min preskaŭ nudan kaj sangokovritan

pro mia vundo, ne dubis, ke mi estis ŝtelita kaj mortefrapita. Ili min alportis al urbo. La movado de transportado vekis miajn sentojn. La sopiroj, kiujn mi puŝis, malfermante okulojn kaj ĝemante, ĉar mi troviĝis ankoraŭ meze de vivantoj, konigis, ke mi estis ankoraŭ en stato tia, ke mi povis ricevi helpadojn. Tiuj, kiujn oni donis al mi, tro bone sukcesis. Tamen mi estis enfermita en mallarĝa malliberejo. Mia proceso estis komencita ; kaj, ĉar Manon ne montriĝis, oni min kulpigis, ke mi estis mortiginta ŝin en ekmovado de kolerego kaj de ĵaluzeco. Kompreneble mi rakontis mian kompatindan aventuron. Synnelet, malgraŭ la ekscitegoj de doloro, en kiun lin ĵetis tiu rakonto, havis la grandanimecon peti mian senkulpigon. Li ĝin ricevis. Mi estis tiel malfortika, ke oni estis devigita min transporti el la malliberejo en mian liton, sur kiu mi estis detenita dum tri monatoj per perforta malsano. Mia malamo al vivo ne malplifortiĝis ; senĉese mi alvokis morton, kaj longatempe mi obstine forĵetis ĉiujn kuracilojn. Sed ĉielo, post kiam ĝi estis puninta min per tiom da severeco, decidis, ke ĝi igos utilaj por mi miajn malfeliĉaĵojn kaj siajn punegojn. Ĝi min lumigis per siaj lumoj, kiuj rememorigis al mi ideojn indajn je mia nobelnaskiĝo kaj je mia edukiteco. Ĉar trankvileco komencis iom renaskiĝi en mia animo, tiu ŝanĝo estis sekvita de proksime de mia resaniĝo. Mi min tute liveris al inspiroj de l' honoro, kaj daŭrigis plenumi mian malgrandan oficon, atendante la ŝipojn de Francujo, kiuj marveturadas unufoje en la jaro al tiu parto de Ameriko. Mi decidis, ke mi revenos en mian patrujon, por en ĝi ripari per vivado saĝa kaj bone reguligita la skandalon de mia konduto. Synnelet estis zorginta transportigi la korpon de mia kara amatino en honoran lokon.

Ses semajnojn ĉirkaŭe post mia resaniĝo, iam mi

promenadis sola sur la marbordo, kiam mi vidis alveni ŝipon, kiun aferoj de komerco kondukis al nova Orléans. Mi atentis al la elŝipiĝo de la ŝipanaro, kiam mi estis frapita de grandega miro, rekonante Tiberge' on meze de tiuj, kiuj aliris al urbo. Tiu fidela amiko min rekonis de malproksime, malgraŭ la ŝanĝoj, kiujn malgajeco estis farinta sur mia vizaĝo. Li sciigis al mi, ke la sola motivo de lia vojaĝo estis deziro min vidi kaj min instigi, ke mi revenu Francujon ; ke, kiam li ricevis la leteron, kiun mi estis skribinta al li en Havre, li aliris al tiu urbo persone, por alporti al mi la monhelpon, kiun mi bezonis ; ke li sentis tre grandan doloron, eksciinte mian eliron, kaj ke li estus elirinta tuje por min sekvi, se li estus trovinta ŝipon pretan meti velaron ; ke dum multaj monatoj li serĉis unu marveturilon en diversaj havenoj, kaj ke fine, trovinte en Saint-Malo¹ unu barkegon, kiu levis ankron por iri al la Martinique², li en ĝin enŝipiĝis, esperante, ke en tiu insulo li trovos facilan transportilon al nova Orléans ; ke la Malo' a ŝipo estis dum vojaĝo kaptita de hispanaj marrabistoj kaj kondukita en unu el iliaj insuloj, sed ke li forkuris dank' al sia lerteco, kaj ke, post diversaj kuradoj, li trovis la okazon de tiu malgranda ŝipo, kiu estis ĵus alveninta, por sin veturigi feliĉe ĝis mi.

Mi ne povis montri tro da dankeco al amiko tiel grandanima kaj tiel konstanta. Mi lin kondukis al mia hejmo, kaj faris lin mastro de ĉio, kion mi posedis : mi sciigis al li ĉion, kio okazis de mia eliro el Francujo ; kaj por kaŭzi al li ĝojon, kiun li ne atendis, mi al li konigis, ke la semoj de virto, kiujn li iam estis ĵetinta

1. Elparolu : *Siu-Malo*.

2. Elparolu : *Martinik*.

en mian koron, komencas produkti fruktojn, pri kiuj li estos baldaŭ kontenta. Li certigis, ke tiel dolĉa certigo donis al li kompensaĵon por ĉiuj laciĝoj de lia vojaĝo.

Ni pasigis kune du monatojn en nova Orléans, atendente la alvenon de ŝipoj de Francujo ; kaj fine, nin metinte sur maron, ni prenis teron antaŭ dekkvin tagoj ĉe Havre-de-Grâce. Alveninte, mi skribis al mia familio. Mi sciis per la respondo de mia pli maljuna frato malĝojan novaĵon pri la morto de mia patro, al kiu mi tro rajte tremas, ke miaj konduteraroj estas kunhelpintaj. Ĉar vento estis favora por trafi Calais'on, mi tuj enŝipiĝis, intencante aliri, je kelkaj mejloj for de tiu urbo, al ĝentilhomo de mia parencaro, ĉe kiu mia frato al mi skribas, ke li devas atendi mian alvenon. »



